

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084  
Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.  
A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield, N.S.W. 2070  
Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.  
A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 125 (205)

MELBURNO

Jan.-Feb., 1974

## GRATULINDA KONGRESO EN BRIZBANO

La unuan fojon en Kvinŝlando; La unuan fojon Parlamentano malfermis per bonega Esperanto. La 19-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso okazis inter la 2-a kaj 8-a Jan. 1974.

Post streĉa laborado, kun ĉio zorge organizita, la L. K. K. kaj la "Sunbrila Stato" atendis kongresanojn. Se poste sin kaŝis kelkfoje la suno, ofte minacis nuboj kaj falis peza pluvo, tamen neniam mankis varmeco — eĉ troa varmeco de temperaturo — kaj, plej grave, ĉiam sentigis sin varmeco de amikeco, helpemo kaj entuziasmo de lokaj gesamideanoj.

El ĉiuj anguloj de nia vasta kontinento alvenis kongresanoj diversmaniere — per p. opraj aŭtomobiloj kaj dormveturiloj, per aviadiloj, per aŭtobusoj kaj per trajnoj — unuope, duope aŭ grupope, kaj ĉiu tuj trovis varman bonvenon kaj komfortan loĝejon ĉe la "Internacia Domo" de la Kvinŝlanda Universitato ĉe St. Lucia. Ebla plej impona, certe plej brua, estis la alveno ĉe la Interŝtata Fervoja Stacidomo de karavano el la sudo. Komencinte dekkvinope sian veturadon en Melburno, la karavano fariĝis 25 en Sidnejo por alveni kune en Brizbano, kie renkonte atendis ĝin deko da Brizbananoj por transporti kongresanojn kaj al la Universitato. Tie, malgraŭ streĉa okupiteco, la Kongresa Sekretario S-ino W. Greenhalgh, per ĉarma rideto kaj bonvenigaj vortoj persone salutis ĉiun novalveninton. La scenejo estis preta por ĝuinda kongreso.

### Propaganda Laboro

La L. K. K. sendis traŝan informilon al ĉiuj gazetoj, Radio- kaj Televido-Stacioj. Sekve de tiu bona prepar-

laboro, aperis kelkaj artikoloj en la gazetaro. "Brisbane Telegraph" (2/1) aperigis longan artikolon, kaj "The Australian" (3/1) presis fotografajon de Prof. R. Robertson kaj artikolon kun la kaplinio "Esperanto vivas kaj progresas." Raporto pri la prelego de Ralph Harry aperis kun ties bildo. La privat-komerca TV-Stacio TVQ-O televidigis longan intervjuon kun Mal kaj Val Robinson. Ankaŭ la nacia stacio ABQ-Z prezentis intervjuon kun Mal Robinson, Prez. de la L. K. K. La sama stacio, en la vespera novajservo (3/1), montris scenojn el la Solena Malfermo.

### La kongreso komenciĝis

La plimulto de la kongresanoj loĝis komforte en la "Internacia Domo" de la Universitato, kiu konsistis el pluraj kvadatraj, 5-etaĝaj turoj kaj granda manĝalono. Kiel kongresejo servis la bela, teatroforma prelegejo "Abel Smith", proks. unu kilometron for. En ties antaŭhalo troviĝis okulfrapa ekspozicio de Esperantaj, arte aranĝitaj de S-ano O'Grady. Tie ankaŭ Libro-Peranto Tom Elliott konstante deĵoris. Kongresanoj eluzis la oportunon kaj aĉetis librojn en la valoro de \$396.41.

Aliĝis al la kongreso 177 ges-anoj, el kiuj fakte ĉeestis 158. Tio estis ĝis nun la plej granda ĉeestantaro ĉe niaj kongresoj. Laŝtate venis el Kvinŝlando 77, el Nov-Suda Kimrojo 37, el Viktorio 25, el Okcidenta Aŭstralio 7, el Suda Aŭstralio 2, el Norda Teritorio

2, el Canberra 1 kaj el transmaraj landoj 7. Komprenoble, plej grandan intereson vekis 4 japanaj vizitantoj: Ges-roj H. Sakaeda (Tokio), F-ino Sumiko Susumago (Tokio) kaj S-ro H. Nagai (Osaka). El Christchurch (Nov-Zelando) venis Ges-roj I. May kaj la sepa transmara vizitanto estis nia eksprezidanto Am-basadoro Ralph Harry, C.B.E., kiu speciale venis el Bonn (Germanujo).

Merkredon (2/1) okazis la Bonveniga Vespero en la manĝsalono de al "Internacia Domo". Aŭdiĝis konstanta zumado de gaja konversacio, super kiu de tempo al tempo sonis pli laŭte ekscititaj krioj, kiam malnovaj amikoj retrovis unu la alian. Soifaj gorĝoj dankeme akceptis refreŝigajn trinkaĵojn de gastamaj Brizbananoj. Fine, kiam langoj iom laciĝis, la plimulto ripoze ĝuis muzikon kaj kantadon de Kvinslandanoj.

### Inaŭguro de la Kongreso

Ĵaŭde posttagmeze (3/1) okazis la oficiala malfermo de la kongreso. Akurate je la 3-a alvenis la honora gasto, S-ro Nigel Drury, Federacia Parlamentano por la distrikto Ryan. Parolis unue S-ro Mal Robinson, kiu bonvenigis la Estraron laŭnome kaj la kongresanaron amase, atentigis ke ĉi tiu estas la unua A.E.A. kongreso en Kvinslando, sciigis ke la devizo de la Kongreso estas "Homo al Homo per Esperanto" kaj prezentis S-ron Nigel Drury, Parlamentanon, por malfermi la Kongreson. Ankaŭ S-ro Drury, **post E-lingva saluto**, emfazis la unikan karakteron de ĉi tiu kongreso por Kvinslandanoj. Poste li parolis honore al D-ro Zamenhof, kiu sukcesis, kie multaj aliaj malsukcesis, kaj tiel faris pozitivan kontribuon al la forigo de bariloj inter homoj. Deklarinte la Kongreson malferma, li denove uzis la internacian lingvon por adiaŭi la ĉeestantaron.

Prof. R. Robertson, A.E.A. Prez., dankis kaj gratulis la gastparolinton pro lia bonega elparolo de Esperanto, sugestante ke oni invitu lin festparoli ĉe la venonta Zamenhofa Festo de la Brizbana Societo. Post mallonga paŭzo, dum kiu S-ro Mal Robinson gvidis la festgaston eksteren por inspekti la Ekspozicion en la Vestiblo, Prof. R. Robertson invitis la salutojn de la diversaj reprezentantoj. S-ro K. Linton salutis nome de U.E.A., S-ro V. Timmins, nome de Int. Katolika Unuiĝo E-ista, S-ro V. Gueltling, nome de S.A.T., S-ro L. Scott (Fed. de N.S.K.), S-ino E. Jullie (Fed. de Kvinsl), S-ro A. Baldwin (Fed. de Vik.) D-ro T. Einihovici (Perth). (Ĉi tiu transdonis al Prof.

Robertson E-ĉemizon nome de la Okcidentaŭstralia E-Ligo) S-ino G. May (Christchurch) salutis nome de Nov.Zelanda E-Asocio, F-ino Sumiko Susumago (Tokio), S-ro H. Nagai (Osaka), S-ro H. Cohen (Melburna E-Soc.), S-ro C. Lanyon (Malvern E-Grupo), F-ino A. Hearn (Oakleigh E-Grupo), S-ino A. Schepers (Morwell), S-ro N. Gamble (Canberra), S-ro T. Elliott (Sydney E-Soc.), S-ro G. Thatcher (Manly), F-ino M. O'Mara (Toowoomba), S-ino V. Clarke (Redcliffe), S-ro J. Moore (Rockhampton) S-ino M. Jones (St. Lucia), S-ro T. Steele (Brizbana E-Soc.), S-ino Doris Sinclair (A.E.I.A. & Sunshine Coast), S-ro W. Chandler (Ornitologia Rondo E.)

### Labor - Kunsidoj

Okazis 3 A.E.A.-kunvenoj kaj po unu U.E.A., S.A.T. kaj A.I.E.A. (instruista) Fakkunvenoj.

Prof. R. Robertson malfermis la A.E.A. Ĝeneralan Kunvenon. Li speciale salutis S-ron Ralph Harry kaj legis telegramojn de S-ino J. Clarke (Anglujo), S-ino Grace Kirkwood (Coffs Harbour) kaj F-ino A. Godfrey (Melburno). La Prezidanto petis la ĉeestantojn observi unu minuton da silento por la mortintaj gesamideanoj dum la pasintaj 2 jaroj: S-roj C. Goldsmith (Manly), Allan Turner (Shepparton), Ernest Hanks (Melbourne), W. King (Nov-Zelando), S-ino W. Harvey (Toowoomba) kaj F-ino E. Carrick (Brisbane).

La Vic-Sekretario (S-ro H. Koppel) legis la protokolon de la lasta ĝenerala kunveno 1972 en Melburno. (Akceptita). S-ro Ralph Harry dankis pro la financa subteno ricevita el Aŭstralio por la Sporta Terminaro, kiu ĝustatempe aperis por la Olimpiaj Ludoj en Munĥeno. S-ino D. Sinclair dankis pro la premio ricevita por la Kvinslanda Federacio kaj raportas ke 4 kluboj en Kvinslando ricevis libro-premiojn.

Detalan raporton pri la agado de A.E.A. donis Sekretario Russ Baxter. (Legu detalan raporton aliloke) Prof. Robertson dankis la sekretarion pro lia laboro dum la pasintaj 2 jaroj. S-ro C. Lanyon proponis kaj D-ro Einihovici subtenis la akcepton de la raporto. Unuanime akceptita.

A.E.A. Kasisto Les Scott donis detalan raporton pri la financoj de la Asocio. Ĝi aperos en la marta numero de "A.E.". Li atentigis, ke pro la plialtigo de la preskostoj kaj afranko por "Australian Esperantist" (je proks. 50%) la

membroklotizo nepre necesos altiĝi. Li proponis ke la jara kotizo por individuaj membroj, por kluboj kaj Federacioj estu \$5.00. Por pensiuloj la kotizo restas kiel ĝis nun \$1.50. S-ro Woodruff proponas kaj S-ro Chandler sugtenas la proponon. Unuanime akceptita. Bv. sendu kotizon al Russ Baxter au Les Scott.

S-ino Margaret Chaldecott, la Publicoficisto, raportis pri sia laboro dum la pasintaj 2 jaroj. Si petis pli da kunlaboro el aliaj aŭstraliaj ŝtatoj kaj faris utilajn proponojn pri estonta laboro. S-ro K. Linton proponis kaj S-ro V. Gueltling subtenis akcepton de ŝia raporto. Unuanime akceptita.

S-ro Tom Elliott nun raportis pri la Libro-Servo. Li dankis al ĉiuj, kiuj kunlaboris kun li dum la pasintaj 2 jaroj, sed speciale al la grupoj en Brizbano, Toowoomba kaj Perth. Li havas urĝan peton al instruistoj, ke ili ĝustatempe avizu lin kian instrulibron ili uzos en venontaj kursoj por ke la Libro-Servo povu disponigi pri sufiĉe da ekzempleroj. Tute ne eblas havi amason de ĉiu instrulibro ĉiam en stoko. Li raportis, ke li devis aĉeti modernan presmaŝinon por mem presi librolistojn, verbaŝiŝojn k.t.p. Tio ŝparos multe da mono, ĉar dum la lasta dujara periodo li devis elspezi \$400 por presajoj. Kluboj aliĝintaj kun A.E.A. nun povos utiligi la presmaŝinon, ĉar Tom Elliott estos preta presi informilojn por nur 50 cendoj. S-ro J. Matasin proponis kaj S-ro W. Chandler subtenis la raporton. Unuanime akceptita.

Sekvis la elekto de la nova Estraro. Ĉar mankis proponoj pri novaj estraranoj, la ĝisnuna prezidanto, Prof. R. Robertson, proponis la reelekton de la sekvantaj:

- Prezidanto: S-ro R. Robertson (Manly)
- Vic-Prezidantoj: S-ro K. Linton (Melbourne) kaj S-ro. I. T. Maddern (Morwell)
- 1-a Sekretario: S-ro R. Baxter (Manly)
- 2-a Sekretario: S-ro H. Koppel (Melbourne)
- Kasisto: S-ro Les Scott (Manly)
- Libro-Servo: S-ro Tom Elliott (Sydney)
- Publikaj Rilatoj: S-ino M. Chaldecott (Sydney)
- Kunordiganto (por Koresp. Kursoj): S-ino S. Fanos (Sydney)
- Kaskontrolisto: S-ro G. Thatcher (Manly)

S-ro C. Lanyon proponis S-ron Maddern kiel Prezidanton, sed S-ro Maddern diris ke li ne deziras esti kandidato

por la prezidanteco. Oni petis ke S-ro W. Chandler prezidu la kunvenon por la elekto de prezidanto. La membraro elektis Prof. R. Robertson kiel Prezidanton, unuanime. S-ro Linton proponis ke oni elektu la ceterajn estraranojn "en bloc". Tiun proponon subtenis S-ro Harry, kaj la membraro unuanime aprobis.

S-ro T. Elliott proponis centran reklamon en "The Australian", gazeto legata tra tuta Aŭstralio. S-ro Mal Robertson subtenis tiun ideon. S-ro Maddern kaj S-ino D. Sinclair kontraŭis la ideon, ĉar ili opinias, ke tiaspeca reklamo ne taŭgas por kluboj en malgrandaj urboj. La Prezidanto prokrastis diskuton pri ĉi tiu propono, por ke restu tempo por alparolo de S-ro Harry.

S-ro Ralph Harry dankis la membraron pro la financa subteno por la "Sporta Terminaro", eldonita okaze de la lastaj Olimpiaj Ludoj en Munheno. Li raportis, ke la aŭstralia registaro lastatempe subtenis Esperanton kvinfoje: (1-e) La Inform-Servo petis serion da 6 E-sonbendoj kaj nuntempe faras 6 novajn. (2-e) Antaŭ la 57-a U.K., en Portland faris novan E-filmon. (3-e) Pagis la kostojn de S-ro Harry por viziti la 58-an U.K. en Beograd kaj la tutdanan E-tagon en Silkeborg. (5-e) Presigis 50-pagan libreton "Faktoj pri Aŭstralio" en eldonkvanto de 10,000 ekzempleroj. Ni gratulu la Aŭstralian Inform-Servon pro tiu praktika uzo de Esperanto.

S-ro V. Gueltling (Sydney) raportis pri la laboro de la Honoriga Komisiono. Dum la pasintaj 2 jaroj ĝi ricevis 5 proponojn, el kiuj ĝi akceptis tri: Unu estas S-ro Goldsmith, kiun oni jam honoris per la "T. Goldsmith Memoriga Fonduso". La nomojn de la 2 aliaj S-ro Gueltling ne povis publike nomi, ĉar ankoraŭ ne estis decidite, ĉu la honorigo estu per Honora Diplomo aŭ per Honora Insigno. S-ro Woodruff proponis kaj S-ino T. Smith subtenis la akcepton de la raporto kaj la membraro re-elektis la ĝisnunan komisionon (S-ino R. McGrath, S-roj V. Gueltling, V. Timmins).

La Prezidanto malfermis denove la diskutojn pri centra reklamo. S-ro Maddern diris, ke li ne konsentas elspezi monon de sia klubo por tia reklamo. S-ro T. Elliott proponis ke la elektota reklamo-oficisto petu subtenon de ĉiuj kluboj, sed sen rajto dikti al la kluboj. S-ro Moore: "Kial ni bezonas reklamoficiston, ĉu ne la estraro povos fari tiun laboron?". S-ro Elliott "La estraro

estas jam tro okupita". S-ino R. McGrath kontraŭas ĉar mankas detaloj pri la elspezotaj sumoj kaj ankaŭ pro lokaj cirkonstancoj. Tamen, ŝin ne kontraŭas se la kosto estus konata. S-ro Mal Robinson klarigis, ke per reklamoj en tutlanda gazeto kiel "The Australian", la Brizbana Societo fakte ŝparas \$80. S-ro Maddern proponis kaj S-ino D. Sinclair subtenis, ke A.E.A. subtenu la Federaciojn ĝis maksimume \$50. Tiun amendon la membraro malakceptis kaj akceptis la originalan proponon pri centra reklamo (krom 4 voĉoj)

S-ro Les Scott proponis, ke oni altigu la prezon de la Korespondaj Kursoj. La novaj prezoj estu: Populara Kurso \$8, Mezgrada Kurso \$12, Altgrada Kurso \$16. S-ro T. Elliott subtenis la proponon, kiun la membraro akceptis unuanime. S-ro Elliott proponis kaj S-ro M. Robinson subtenis proponon ke la A.E.A.-estraro rajtu, laŭ neceso, altigi la prezon de la Koresp. Kurso. Akceptita (kontraŭ unu voĉo).

S-ino M. Chaldecott faris kelkajn utilajn proponojn por la estonteco. Ŝi proponis, ke, se la Olimpiaj Ludoj 1988 okazus en Sidnejo, tuj poste okazu tie U.E.A.-Kongreso. S-ro Baldwin subtenis tiun proponon, kiun la membraro unuanime akceptis. (Tamen, pli grave, restas du demandoj: Ĉu la Int. Olimpia Komitato elektos Sidnejon kaj ĉu U.E.A. riskus aranĝi Univ. Kongreson en fora Aŭstralio?) Alia propono de S-ino Chaldecott temis pri uzo de speciala poŝtstampo por venontaj E-kongresoj kaj fari ion antaŭ kaj dum la "Int. Vojaĝ-Foiro" 1975 en Sidnejo. (Akceptita) Oni ne akceptis proponon de S-ino Chaldecott presi pagitan reklamon en "The Australian" post ĉiu Universala Kongreso.

S-ro W. Chandler proponis, ke estonte okazu ornitologia fakkunveno ĉe kongresoj. (akceptita). S-ro Linton faris alvokon ke pli da membroj preparu sin por Klereca Diplomo. Ni havas nuntempe nur 4 "Klerecanojn". Li ankaŭ anoncis ke la Zamenhofa Fonduso povas nun kontribui monon al iu klubo, kiu intencos aĉeti propran domon.

Okazis diskuto pri la loko de la venonta (20-a) kongreso. S-ro Mal Robinson proponis kaj S-ro Chandler subtenis Sidnejon. S-ro H. Koppel proponis Melburnon. Li legis leteron ricevitan da la "Melbourne Convention Bureau", en kiu tiu organizo promesis subtenon por la 20-a Kongreso, kiu samtempe estos ankaŭ la unua Pacifika E-Kongreso. S-roj Les Scott kaj Tom Elliott subtenis la kandidatigon de Mel-

burno, ĉar multaj Sydney — kaj Manly —anoj estas jam tro okupitaj pri A.E.A.-aferoj. S-ro Lanyon diris, ke Melburno jam havas taŭgan kongres-stabon, kiu garantios sukceson. S-ro Linton menciis, ke dum pasintaj kongresoj en Sidnejo kongresanoj ofte devis fari longajn vojaĝojn por atingi la diversajn kongreslokojn. Se Sydney estus veninta al Brizbano kun konkretaj proponoj pri la kongresejo kaj la loĝloko de kongresanoj, li volonte voĉdonus por Sidnejo. S-ro Maddern ankaŭ proponis, ke Melburno estu la venonta kongresloko. La membraro, kun kelkaj sindentenoj, fine akceptis Melburnon. Pri la dato, S-ro V. Gueltling proponis la saman periodon, sed ĉar temos ankaŭ pri Pacifika E-Kongreso, ĝi devos daŭri proks. 10 tagojn.

S-ro T. Elliott proponis kaj S-ro H. Koppel subtenis ke S-ino Shirley Fanos estu la nova Reklamisto. S-ro J. Moore (Rockhampton) proponis ke A.E.A. elektu ĉe ĉiu kongreso 2-jaran laborplanon. Li proponis ke por la venontaj 2 jaroj ni laboru por amikeca kontakto kun la skolta movado, speciale kun la Skolta Ligo Esperantista. S-ino Sinclair, Tom Elliott kaj S-ro O'Grady subtenis la ideon kaj S-ro Mal Robinson proponis, ke S-ro J. Moore estu nia skolta komisiito (akceptita).

La **U.E.A.-KUNVENON** prezidis la Ĉef-Delegito S-ro K. Linton. Kelkaj delegitoj, i.a. S-roj Moore, Woodruff, S-ino R. McGrath, raportis pri informpetoj ricevitaj kaj F-ino Ann Hearn rakontis interesan epizodon dum vojaĝo de samklubano tra Italujo kaj la helpon kiun ŝi ricevis de la UEA-delegito en Romo.

La **S.A.T.-KUNVENON** gvidis la Peranto S-ro V. Gueltling. Li klarigis pri la ĉi-jaraj kotizoj kaj li petis S-ro Koppel prelegi pri ties vojaĝo al Kanado. S-ro Koppel mallonge priskribis sian vojaĝon tra Honolulo, Vancouver al Toronto, kie li havis la oportunon ĉeesti la 46-an SAT-Kongreson kaj prelegi pri Canberra antaŭ 200 delegitoj.

La ĝeneralan kunvenon de **A.I.E.A. (INSTRUISTOJ)** prezidis la Prezidanto S-ino Doris Sinclair. Kvankam la financa raporto montris kredit-saldon de \$163.40, la sekretaria raporto montris, ke la membraro malpliigis de 84 al nur 24 pagintaj membroj. Sajnas ke la intereso de multaj perdiĝis pro la malofta aperigo de "Klerigo", kies redaktoro (S-ro I. Maddern) klarigis, ke pro troa okupiteco, precipe pri la Sendependenda Universitato, li ne plu povas redakti la organon. Estas evidente, ke

membroj ne volonte pagas kotizon se ili ne ricevas oficialan organon. Laŭindaj raportoj estis ricevitaj de S-ino Sinclair, S-ro Moore kaj Maddern pri porinstruaj agadoj en la Sunbrila Marbordo, Rockhampton kaj Morwell. Pro manko de redaktoro kaj malpliigo de pagantaj membroj estis unuanime decidite ke la Asocio "paŭzo" dum 2 jaroj, post kiam oni esploras la situacion dum la 1976a kongreso.

### Prelegoj kaj Filmoj

Prof. R. Robertson (3/1) donis detalan skizon pri "**La Malfermita Universitato**", kies administran centron en Anglujo li ĵus vizitis. Li rakontis ke nuntempe 40,000 studentoj partoprenas, kiuj pagas \$500 jare. El ili nur 25% malsukcesas. Kompare, li diris, ke en Aŭstralio kutime 50% malsukcesas. Profesoroj de Oxford kaj Cambridge instruas dum 32 semajnoj jare tute sen prelegoj. Ĉefa celo estas instrui homojn, kiuj antaŭe ne povis viziti Universitaton.

Samvespere, S-ro I. T. Maddern klarigis la celon de la "**Sendependa Universitato de Aŭstralio**", kiun li fondis en januaro 1972, ĉar li estis malkontenta pri la ĝisnunaj universitatoj kaj ilia edukada sistemo. Dum la lasta jaro 60 studentoj elektis Esperanton kiel unu el siaj studtemoj, kaj, la Universitato pagis por ili aliĝojn al U.E.A. (\$480) kaj al A.E.A. (\$180). Instruo okazas nur per korespondo, la kurspagoj estas nur triono de tiuj en aliaj universitatoj kaj ne okazas ekzamenoj. Instruistoj juĝas siajn studentojn laŭ iliaj verkajtoj.

S-ro Ralph Harry, C.B.E., prelegis (4/1) pri "**Libereco de Parolo**" (La homa rajto al komuna internacia lingvo). Li atentigis pri la 25-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Kvankam ĝi ne diras ke oni rajtas paroli iun specifan lingvon, tiu klare kaj ripete asertas ke oni devas havi ĉiujn homajn rajtojn sen ia lingva diferencigo. Laŭ tio, logike sekvas ke ĉiu persono en ĉiu lando havas la rajton povi interkomunikiĝi kun ĉiu alia homo per komuna internacia lingvo. Tial ni proponu al la aŭstralia registaro, ke kiel parton de la programo por plenumi homajn rajtojn ili favorigu la disvastigon de la internacia lingvo Esperanto. (Spaco ne permesas tutan represon ĉi tie, sed ni esperas aperigi la plenan tekston en estonta numero.)

S-ro H. Petley (5/1) prelegis pri "**MAKROKOSMO kaj MIKROKOSMO**" laŭ filozofa studo de la belga verkisto Maeterlinck. Tiu montris ke la homo

en la diversaj stadioj de evoluo, de la koncepto ĝis la naskiĝo", reprezentas ĉiujn stadiojn en la evoluo de kreado.

Samvespere, S-ro H. Koppel prelegis pri "**LA FRANCA SERĈPOETO RAYMOND SCHWARTZ**". Li skizis ties vivon kaj verkadon kaj poste ridigis la aŭdantaron per kvar pensinstigaj poemoj.

S-ro Victor Bourlin (5/1) montris sian artan kolekton da humur-satiraj lumbildoj "**GRIMACOJ de la MONDO**" kun taŭgaj komentoj kaj muzik-ĉerpajoj.

Kongresanoj havis la eblecon vidi aron da filmoj en Esperanto. La filmo "Angoroj" estis parte interesa kultur-filmo pri Parizo kaj parte krimul-intrigo. Bedaŭrinde, la sono kaj la lumo de la filmo ne estis tro bona, kaj multaj ĉeestantoj komprenis nur malmulton. Kontraŭe, la filmo "Norvegujo" estis teknike perfekta kaj montris per belaj koloroj la vidindaĵojn kaj iom de la historio de tiu norda lando. Ni ĝojis vidi du belajn filmojn pri Aŭstralio, faritajn de nia "Novaj- kaj Inform-Servo": "Jen Aŭstralio" kaj "Takto-Aŭstralio, en la sepdekaj jaroj". La lastnoma filmo estas ege moderna en belaj koloroj, kaj estas bonega varbilo por Aŭstralio en eksterlando. La aŭstralia ŝtata filmservo meritas niajn gratulojn.

### Distraĵoj kaj Ekskursoj

Vendredvespere (4/1) okazis la **Dramo-Konkurso**: Du grupoj konkuris pri la Drama Sildo, kaj iliaj kontribuoj konsistigis artan, amuzan kaj pensinstigan programon. Dua kontribuo al la glata prezentado kaj ĝuo de la aŭdantaro estis la bela tre moderna teatro Schonell, en kiu la konkurso okazis. Ĝi estis klimatizita kaj ĉiel ekipita, kies sola malavantaĝo estis la alta luprezco — \$100.

Kvin anoj de la Manly-grupo prezentis komedion "Apartamento por si mem", originale verkitan de Margaret Liston, kiu ankaŭ reĝisoris kaj aktorin en la ĉefa rolo. Dek naŭ anoj de la Brizbana Societo tre gaje kunaktorin en la dua originala teatraĵo, verkita de Trevor Steele. "Jen Nia Mondo" ŝajnis televizian programon de novaj kaj reklamoj laŭvice. Ĉi tiu amuza kaj lerte satira prezentado atentigis pri la homa tendenco emfazi la malgravan pli ol la gravan. Kiel vigla anoncisto rolis la verkinto. Laŭ posta balotado de la aŭdantaro, la Brizbana Societo gajnis la trofeon.

Dank' al la fervora sindediĉo de la Manly-anoj al la drama arto, la aŭdantaro samvespere ĝuis ankoraŭ unu kolorplenan prezentadon — duonburleskan pantomimon "Cindrulino". En ĉi tiu kunludis anoj de la Sidneja Klubo. Denove ne nur kunaktoris, sed ankaŭ lerte reĝisoris Margaret Liston. Al ĉiuj aktoroj kaj verkintoj, koran gratulon.

La unua ekskurso, kiu okazis je la tago de alveno, ebligis, ke kongresanoj, konatiĝu samtempe unuj kun aliaj kaj kun la ĉirkaŭaĵo de Brizbano. Tuj post lunĉo, du aŭtobusoj, plenaj de gaje babilantaj pasaĝeroj ekiris de Internacia Domo, por atingi Monton Coot-tha en la Montaro Taylor. Tie oni ĝuis superban panoramon de la ĉefurbo. Revenante, denove la aŭtobusoj haltis ĉe Bartley's Hill de kie videblis aliaj vidindaj panoramoj de la urbo kaj ties haveno.

Du tagojn poste, dua aŭtobusa ekskurso transportis kongresanojn al la Best-Protektejo ĉe Lone Pine, kie indiĝenaj bestoj vivas sub naturaj kondiĉoj. Ĉefa intereso estas kompreneble la drolotaloga kaj dormetema "Koala", sed ankaŭ multaj kangaruoj estas tute malsovaĝaj kaj amikemaj, dum eble iom da pacienca atento elvokas kompensan saluton de parolema kakatuo.

Dimanĉon, la 6-an, okazis tuttaga ekskurso, unue per aŭtobuso al la rivera kajo, kaj poste per boato sur la rivero Brisbane ĝis la homfarita Insulo Bishop apud la maro. Tre kompleza pruviĝis la pluvo, kiu ĉesis ĝuste, kiam la ekskursantoj devis marŝi de la aŭtobusoj al la boato kaj longe antaŭ ol la boato atingis la insulon, kie oni povis lunci, pikniki, marŝi aŭ naĝi laŭvole en plena sunbrilo aŭ pli milda ombro dum pluraj horoj antaŭ ol reiri laŭ la sama vojo.

La kvara ekskurso (7/1) estis duparta aranĝo. Du aŭtobusoj ekveturis de Internacia Domo por liveri kongresanojn ĉe la enladigejo de Golden Circle. Tie ili partoprenis horlongan inspektadon, observante ne nur la pli sorĉan preparadon de frukto kaj suko ananasaj — ni ne forgesu eĉ permeseblajn gustumojn — sed ankaŭ la fabrikadon de ladaj ujoj kaj kartonaj skatoloj, mallonge la tutan procedon. De "Golden Circle" la aŭtobusoj nun veturis norden al Redcliffe, marbordejo sur duoninsulo, atingebla per longega ponto (1 3/4 mejlojn) kaj ne nur loko de ankoraŭ unu tre aktiva E-grupo, sed la sola aŭstralia urbo kun Strato Esperanto, rezulto de klopodoj de Lady Fraser, bedaŭrinde jam mortinta. Dank' al la klopodoj de

lokaj E-istoj okazis urbestra akcepto. Lia Moŝto mem. Skabeno S. Kroll, bonvenige alparolis la vizitantojn kaj poste pozis kun japanaj kongresanoj por loka ĵurnalisto. Post respondo de Prof. Robertson, la Urbestro invitis al vera luksa regalo, kiu staris jam preta meze de la salono.

La 6-a ekskurso, la postkongresa, denove tuttaga, iris norden al Caloundra, ĉe la Sunbrila Marbordo, hejmurbo de aktiva S-ino Doris Sinclair, kiu survoje donis informplenan komenton pri la pitoreska kamparo kaj urbetoj. Kun la Montaro Glasshouse videbla, ŝi rakontis ankaŭ kelkajn ĉarmajn indiĝenajn legendojn rilate al la stranga formo de individuaj montoj. Lunĉo estis preta ĉe hotelo en Nambour, kie kelkaj E-lernantoj de S-ino Sinclair venis salute. Pluvo akompanis nin preter fruktobienoj kaj urbetoj ĝis Caloundra, kie fine sin montris la suno. Restis nur paŭzeto por adiaŭi S-inon Sinclair kaj saluti ankoraŭ kelkajn ŝiajn lernantojn, antaŭ ol reveturi.

### La Di-Servo

S-ro A. Deutscher estris ekumanan Di-Servon, kiu okazis dimanĉvespere in la Manĝsalono. Al tiu kontribuis per legajoj diversreligiaj la jenaj: S-roj Linton, Timmins, Gueltling, Guenster, D-ro Einihovici kaj F-ino Turner.

### Internacia Koncerto

Guplena muzikfesto okazis (7/1) en la Prelegejo Abel Smith. La Konferansejo (1) estis S-ro R. Ross de la Brizbana Societo. La unua parto, kiun prezentis profesiaj kaj duonprofesiaj geartistoj, konsistis el pianludado, skotaj dancoj, solkantoj kaj germanaj popolkantoj, prezentataj de la horo de la germana klubo. La dua parto estis mikspoto de Esperantajoj, japanaj dancoj kaj moderna orgenludado.

(I) Compere: prezentanto kaj klariganto ĉe muzika programo.

Li komentas pri la verko, aŭtoro kaj ludanto(j).—Red

### Fermo de la Kongreso

Antaŭ ol fermi la kongreso (8/1) Prof. Robertson prezentis 3 parolantojn: S-ro V. Gueltling legis teknikan artikolon el "Heroldo de Esperanto", D-ro T. Einihovici deklamis "Al la Fratoj", de D-ro Zamenhof, kaj S-ro H. Koppel provis instrui al la ĉeestantoj "Kiamaniere fariĝi E-verkisto". En sia fina parolado Prof. R. Robertson dankis al la Brizbananoj pro ĝuinda kaj bela kongreso, instigis al plua laboro por Esperanto kaj esprimis la esperon revidi ĉiun ĉeestanton en Januara 1976 ĉe la 20-a aŭstralia kon-

greso kaj 1-a Pacifika Esperanto-Kongreso en Melburno.

### La Kongresa Bankedo

Mardvespere (8/1) okazis la kongresa bankedo en la granda halo de la "Queensland Lawn Tennis Association". F-ino Beverley Allatt respondecis pri la aranĝoj kaj akceptis la 140 alvenintojn ĉe la enirejo. Post bongustaj manĝaĵoj, miksitaj kun gaja babilado, Prof. R. Robertson proponis la toston al la Reĝino kaj kun interspacoj sekvis aliaj tostoĵoj. S-ro Mal Robinson proponis la toston al A.E.A., kaj S-ro K. Linton tostis la lokan kongresan komitaton. S-ro Herbert Koppel, donacinto de la Dramo-Trofeo, transdonis tiun al S-ro Trevor Steele, kiu akceptis la trofeon en la nomo de la Brizbana Societo. Al Margaret Liston, nome de la Manly-grupo, S-ro Koppel transdonis 3 libretojn kiel konsolpremion.

Tripersona dancorkestro provizis muzikon inter kaj post la diversaj programeroj, kaj multaj ĉeestantoj profitis el la oportunoj por danci ĝis la reveno de la aŭtobusoj.

**Dum ni pretigis ĉi tiun raporton, atingis nin la maltrankviliga novaĵo pri la pluvego kaj la inundoj en Kvinlando.**

**Niaj pensoj kaj kunsento estas kun ĉiuj Kvinlandanoj, sed precipe kun niaj samideanaj amikoj.**

### OFICIALA INFORMILO: A.E.A.

#### NOVAJ ANOJ:

Hoagson, Mr. M. G., Francis Creek, N.T.  
Whitten, Mrs. G., Boambee, N.S.W.  
Edwards, Mrs. R., Coffs Harbour, N.S.W.  
Dransfield, Mrs. B., Coffs Harbour, N.S.W.  
Munro, Mrs. K., St. Lucia, Q.  
Pelly, Mr. P. J., Kenmore, Q.  
Ahrens, Mr. R., Albion, Q.  
Scheper, Mr. and Mrs., Won Wron, Vic.  
Dowling, Mr. N., Cooe, Tas.  
Woodbridge, Mrs. D. A., Victor Harbour, S.A.  
Vella, Mr. C. J., Newborough, Vic.  
**T.G.M.F. (Publicity):**  
Sinclair, Mrs. D., Caloundra, Q. \$5.00  
Koppel, Mr. H., Reservoir, Vic 5.00  
Martin, Mrs. S., Brisbane 1.50  
Strawbridge, Mrs. V. H. Victor Harbour, S.A. 1.00  
Woodbridge, Mrs. D. A., Victor Harbour, S.A. 1.00  
**GEN. FONDUSO:**  
Sinclair, Mrs. D. Caloundra, Q. \$10.00

**ANONCO:** Per unuanimaj voĉdono ĉe la Generala Kunveno de la A.E.A. en la kadro de la Deknaŭa Aŭstralia E-Kongreso: AEA Kotizo: \$5 ĉiujare. Kursoj: Elementa \$8; sen lernolibro sen vortaro \$7. Mezgrada: \$12; sen lernolibro \$10. Supera: 16; sen lernolibro \$14.—Russ Baxter, 18 jan.

### A.E.A. EXAMINATIONS

Supera (Advanced): Mrs. V. Robinson, Aspley, Q.; Mrs. M. Ross, Sunnybank, Q.; Mr. R. Ross, Sunnybank, Q.; Miss B. Allatt, Brisbane; Mrs. D. Sinclair, Caloundra, Q.

Elementa (Elementary): Miss J. Turner, Rockhampton, Q.; Miss J. Lehane, Toowoomba, Q.

Mrs. M. E. Tronerud, Macleod, Vic. gained the Elementary Diploma last January. We regret omission of mention in earlier number.

### A.E.A. RAPORTO: 1972-3


LASTATEMPE, dum preparo de tiu ĉi raporto, la memoro de nia antaŭa, sindonema sekretario ofte anstataŭis la klopodon faratan. Tiu estis sperta kaj lerta E-isto kiu dum multe da jaroj sin dediĉis tute al nia movado. Tia sindediĉo tute superas mian kapablecon, sed kun via helpo kaj la subteno de la Estraro nia Asocio ne disfalos.

**PUBLICIGO:** En 1972-3 membroj distribuis 12,000 verdajn kartojn, kaj ni ricevis 1108 informpetojn; 164 homoj aliĝis al la Elementa Koresponda Kurso. Kompare kun 1970-1 ni distribuis nur kvinonon de la nombro de kartoj, sed ni ricevis kvin sesonojn de la nombro da informpetoj. Krome, la nombro de kurs-aliĝintoj efektive pligrandigis. Tiu rezulto bone aŭguras por la fina venko de nia movado.

**READER'S DIGEST:** En jan. 1972 aperis reklamo en tiu revuo. Ni ricevis 548 informpetojn; 69 personoj aliĝis al la Koresponda Kurso. Kvankam, procente, la R.D. reklama rezulto superis la kartan, tamen, laŭ la kosto, kartoj restas ege preferindaj. Malkontenton montris iuj klubestraroj pri la verdaj kartoj, kaj mi tute konsentas; Por la A.E.A. eble ili estas sufiĉe bonaj, sed arbo estas tiel forta kiel siaj radikoj. Antaŭ nelonge ni presis (per nia propra presmaŝino) tri informilojn. Por la serioza persono (do instruista "materialo") ni liveras ekzempleron de bonega artikolo de Prof. Cavanagh. Por ĝenerala uzado, nome por homoj kiuj kredas, ke E-o estas jam enterigita, ni produktis flugfoliojn pri la tutmonda karaktero de nia lingvo. Pri la tria informilo, ni esperas, ke tiu (aŭ in simila) anstataŭos la verdan karton — eble ni







### PARTO DE LA KONGRESANARO

The zinc plates for these Congress photographs were generously given by Apex Engraving Co. Pty. Ltd., Melbourne, as a mark of sympathy with our movement, through our Vice President, Mr. K. G. Linton.



### LA A.E.A. ESTRARO

De maldekstre dekstren: Vic-Prez. I. Maddern (Morwell), Kasisto Les Scott (Manly), Prez. Prof. R. Robertson (Manly), Vic-Prez. K. Linton (Melbourne) 1-a Sekr. R. Baxter (Manly), 2-a Sekr. H. Koppel. (Melbourne).

## AUSTRALIA KRONIKO

**SYDNEY:** 19/11: Tom Perry paroladis pri la Funkciado de la Korpo. Montriĝis lumbildoj de vivantaj homoj, per kiuj li konsile kaj averte demonstris la ĝustajn kaj malĝustajn korpteniĝojn. Multa malsano rezultas de malĝustaj korp-teniĝoj. Li instruis, kiel bone stari, sidi kaj paŝi, emfazante, ke la muskoloj ne devas esti streĉataj. Ĉeestis 20. Tri membroj sonbendigis bondeziron por societo en Francujo kaj aliaj antaŭprovis teatraĵojn por la Zamenhofa Vespero.

26/11: Shirley Fanos petis, ke la ĉeestantoj (22) faru "rondon", kaj komencis per rakonto pri "La plej bona inventaĵo de la jarcento". Ŝi opiniis, ke ĝi estis la progreso de la medicina scienco kaj menciis rimarkindan resanigon de ŝia filo kiam li estis infano. Aliaj parolis pri siaj ideoj. Ili nomis radion, telefonon, elektran mikroskopon, eĉ tinfirmilon kaj "mini". Volo Gueltling opiniis, ke Esperanto estis la plej bona inventaĵo de la jarcento. Ĉiuj konsentis, ke la preparo de teo, poste, estis ankaŭ bona inventaĵo. (Pri kiu jarcento temas — la 19-a aŭ la 20-a? — Red.)

Oni rimarkis bonan progreson de novaj membroj.

Shirley Fanos proponis havi posttagmezan teon kaj konversacion ĉe Esper-

anto Domo la unuan dimanĉon en la monato. Ĉeestis 20 la unuan okazon 2/12.

3/12: Jean Green prezentis belajn bildojn pri la malfermo de la Operdomo. Ni vidis la Reĝinon kun la Guberniestro-Generala; internajn kaj eksterajn vidaĵojn de la konstruejo; la havenon densan je ĉiaspecaj flotaĵoj. Poste Margaret Chaldecott aranĝis ludon. La okuloj de ĉiu membro laŭvice estis blinde vinditaj. Tiam tiu prenis artiklon (uzata en domo) el sako kaj devis diveni: kio ĝi estas, per fingra ekzameno palpa. Kelkaj el la artikloj, foje strange kuriozaj, ridigis la vidantojn.

9/12: Membroj antaŭprovis teatraĵojn prepare por la Zamenhofa Vespero. Wre Chandler 10/12 estis intervjuita pri Esperanto de Mike Walsh (TV 10) — estis ĝi bona publiko, ĉar Wre lerte, impresis respondis.

15/12: Pli ol 50 alestis la Zamenhofan Vesperon. Esperanto Domo estis plena. Fritz Mueller-Sorau festparoladis pri la laboroj kaj atingoj de la Majstro. Sur muro malantaŭ la parolanto estis la bela nova portreto de Zamenhof, pentrita de Victor Bourlin kaj donacita al la Klubo. Teatraĵo kun Joan Green kaj Gladys Taylor sekvis, membroj legis el la libro: "Winnie-la-Pu", kaj direktate de Marjorie Duncan

la ĉeestantoj komune kantis. Post bona manĝo, ili adiaŭis unu la alian ĝis rekunveno en 21/1.

**MANLY:** La klubanoj de Manly libertempis dum decembro. Okazis ĝuplena societa vespero ĉe la fino de la trimestro. Poste okazis Krisnaska Vespero ĉe Ruth Carruthers post la afer-kunveno. Sekvis 15/12 la Zamenhofa Vespero ĉe Esperanto Domo. Klubanoj de Sidnejo kaj Manly unuiĝis ĉe tiu solene plezura celebrazo. Ĝi finiĝis per bongusta vespermanĝo. En 1/1 klubanoj de Manly iris al Brizbano, kie tiulokaj membroj bonvenigis kaj veturigis nin al la Universitato por alesti la komencon de la Brizbana Kongreso — la plej ĝuplena kongreso. Estis bona vetero ĝis la lasta tago, kiam ekpluviĝis. Laŭ Win Greenhalgh, "la ĉielo vere falis" post kiam ni foriris. La lasta du semajnoj en januaro estis tre okupata tempo. Okazis du malgrandaj ekspozicioj: unu en granda fenestro de butikoj ĉe la Corso, ĉefstrato de Manly, kaj alia en la Commonwealth Bank, kiam klubanoj ĉeestis laŭvice ĉe la Informa tablo. Ŝajnas, ke multaj personoj interesiĝis pri E-o, do kun fido kaj espero ni atendas pli grandan nombron de komencantoj, kiam la klubo malfermiĝos en feb.—K.M.

**SYDNEY:** 21/1: Ni kunvenis por la unua fojo post la Kongreso, kaj iuj membroj raportis entuziasme pri ĝi. La estraro aranĝis reklamojn por la novaj kursoj, kaj ni ĉiuj komencas 1974 kun renovigita inspiro.

**BRISBANE:** La jara ĝenerala kunveno okazis ĉe la klub-kambro, Martin Chambers, januaro 1974. Jen la nova komitato:—

Prezidanto: S-ro Ray Ross; Vic-Prezidanto: S-ro Tom O'Grady; Sekretario: S-ino Val Robinson; Help-Sekretario: F-ino Beverley Allatt; Kasisto: F-ino Cathy Sullivan; Bibliotekisto: S-ro Tom O'Grady; Libro-Peranto: F-ino Desley Clarke; Lernejestro: S-ro Mal Robinson.

**TOOWOOMBA:** Ni okazigis la Zamenhof-datrevenon 15/12 ĉe la hejmo de nia bibliotekisto, S-ino Lehane. Dudek ĉeestis; sendis leterojn ses membroj, kiuj ial ne povis alesti. Inter la ekster-Toowoombaj gastoj estis Ges-roj Ross (Brisbano) kaj S-ino Buchan (St. George). La prezidanto, H. V. Petley, faris la E-an paroladon. S-ro Ross ridamuze rakontis historieton, kaj S-ino Lehane kaj F-ino O'Mara prezentis komikan teatraĵon. F-ino O'Mara

paroladis interese pri la Metrika Sistemo. Sekvis E-diskoj kaj sonbendoj kaj komuna kantado. Tre ĝua vespero.

Evan Simpson (estro de la loka centro por Plenkreskula Edukado) certigis nin, ke niaj klasoj daŭros en 1974.

### A.E.A. PLAN FOR 1974/5 INFORM SCOUTS AND GUIDES

Have you ever felt that you would like to be able to do something for Esperanto, if only it didn't entail too much time or need special knowledge?

The A.E.A. Laborplano is something in which every member, no matter how isolated, can help.

Briefly, it's this: Make friendly contact with your own local Scout and Guide leaders (Clubs, Federations, and AEA officials will see to the Head Office contacts). Tell them something of your own experience with Esperanto, and most important, tell them about their own Esperanto league, the Scout Esperanto League (SKOLTA ESPERANTISTA LIGO)). Most Australian scouts have not yet heard of it, and this is our main object—to tell them about it.

More about the League will appear in "A.E." Pass it on as it appears. That's all. Our aim at present is to INFORM, not recruit. Easy? But important. If we all act, together, the result could be tremendous. Scouts and Guides need Esperanto for real, personal international friendship with each other, which their "new look" emphasizes.

There are 20,000,000 Scouts and Guides. If 1 in 1000 make use of Esperanto, that could more than double the world's active Esperantists — and with young people who have a lifetime ahead.

I've been given the job of looking after this campaign. I'll be glad to help and advise. PLEASE WRITE TO ME. I have pamphlets about the S.E.L. —John Moore, 34 Hadgraft St., North Rockhampton, Q'ld 4701.

### LANGO-LIGILO !

La plej longa vorto en la Plena Ilustrita Vortaro? Verŝajne la 19-litera: desoksiribonukleata. Prononcante ĝin, nepre akcentu nur la antaŭlastan silabon! P.1213.

### UNIVERSAL KONGRESS

Those intending to be at this year's World Esperanto Congress in Hamburg can get details and application form from the Chief Delegate, K. C. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield, 3162.

## RECENZOJ

"Ni kaj Ĝi: **Esoj III. Pri Religio kaj Arto.**" Gaston Waringhien. Eld. Stafeto, Tenerife. 16 x 22 cm. 347 paĝoj. \$6 Us.

Komence, li vorte vizitigas leganton al la fontoj de la religia ideo — al la lok-teroj originaj. Sekvas ĉapitroj pri Magio antaŭa kaj nuna, pri Tabuoj, pri Egiptujo, ĝiaj religio kaj rilato al la Biblio, pri Amos, "la unua revoluciulo", pri Jesaja (la Anonima Profeto), "la unua evangeliisto".

Poste venas analizo struktura de la Nova Testamento, ĝia origino kaj formiĝado, ĝiaj kronologiaj problemoj; la Antinomioj de Jesuo kaj kritika disertajo pri lia raportita vivo.

Pri ok frazoj en la preĝo "Patronia" li levas pikajn demandojn, serĉante sencavajn signifojn. Liaj interpretoj kaj ekzegezo malkovras aspektojn certe novajn por rutinaj voĉantoj de tiu universala preĝformo.

Li traktas pri-Senmorteco; la mistera naskiĝo de Jesuo; ties viziaj aperoj al la disĉiploj; la naturo de Maria kaj la historiaj etapoj de ŝia eklezia Dipatrinigo; la malfaciloj de Novtestamenta tradukado, donante interesajn ekzemplojn, kaj multo alia.

Dum kvar jaroj de la Unua Mondmilito nia aŭtoro sinmove limiĝis je la remparoj de sia naskurbo; dum kvar jaroj de la Dua lia vivospaco etigiĝis ĝis du hektaroj en kaptitejo; formante en si la enhavon de ĉapitro: Pensoj en Hospitalo, li, malsana, devis okupi nur litspacon. Fruktiĝis tie 14 paĝoj da aforismoj, observoj — foje juste indignantaj.

Per tio supra la aŭtoro sin evidentiĝas homo egala aŭ supera al multaj profakaj teologoj. La varieco kaj amplekso de lia menso pensigas — komprenende kun modifoj — pri la universaleco de Vinĉi, Franklin, Svedenborgo . . .

La dua parto konsistas el 84 paĝoj pri Arto. Recenzi ĝin ni rezignas, konsciante nekompetentecon taŭge, inde kaj merite sin esprimi pri tia majstra elmontro. Forte ĝin ĝuus homoj ame digestintaj la priartajn verkojn de John Ruskin.

"En la Nubon Ŝi sorbiĝis for!" Eld. Kjuŝua Esperanto-Liĝo, 900-03 Minamihara, Kanda-mati, Japan: 62 paĝoj. Prezo ne indikita.

Kompilaĵo pri la atombombo sur la urbon Nagasako en aŭgusto, 1945. Tiu ilo egalas la detruan potencon de 2000

B-29-aviadiloj plene ŝargitaj per ordinaraj bomboj. Tiu afero, tremige horora, estas neforviŝeblе gravurita sur la homa konscienco. Orientanoj kompreneble demandas al si: ĉu regantoj de blankula nacio jetus tian diablan bombon sur blankulan malamikon? Nu do, ni rajtas kredi, ke Hitlero ja estus tion farinta, se li siatempe havus tiun teruran detruilon en siaj manoj. Posedas ĝin hodiaŭ blankaj nacioj, kiuj sin tenas unu al la alia suspekteme, neamike kaj eĉ minace. Tiuj rivalaj nacioj riciproke flirtas ĝin kiel "malinklinigilon" kontraŭ supozata militemo.

Cetere, ni rimarku, ke la Brita-Usona atako sur Dresdenon (feb. 1945) mortigis 135,000 homojn, duoble la nombro da viktimoj je Hiroŝimo, ses monatojn poste.

La bomboj sur la urbojn Hiroŝimo kaj Nagasako generis en la Japanoj fundegan malamon al la militismo. "Ne Plu Milito!" estas statute enskribita en la Konstitucio. Se la Japana popolo vere, efektive diktas la nacian politikon, oni rajtas supozi, ke Usono vane penus varbi Japanujon kiel armitan aliancon en ia ajn milito, nuklea aŭ "konvencia".

La "ŝi" en la titolo estas kompatinda juna viktimo de tiu brul-katastrofo. La eventojn dum tiu terura tempo "literature" rakontas 400-jara kamforarbo, kiu ĝin transvivis. Tiu esprimmedio lerte impresas pro sia arta taŭgeco en verko ĉi-speca.

La libreto mem estas Apelo al la Mondo kontraŭ uzo de nukleaj armiloj. El Japanlingva originalo tradukis ĝin kolektivo de 13 homoj, kiuj meriteinde faris sian taskon.

### RECENZOTAJ: NOVAJ LIBROJ.

"... Kun Siaspeca Spico!" Raymond Schwartz. Prozaĵ kaj versaj humurajoj originalaj, inter ili la tuta serio de Laŭ Mia Ridpunkto kun klarigaj notoj de Ulrich Lins. 216 paĝoj. \$4 Us.

"La Arbo de la Sciado": Pio Baroja. Romano el la Hispana tradukita de Fernando de Diego. Aŭtor-kaj verko-prezento de Juan Regulo Perez. Libro komparinda kun iuj de Tolstoj, Turgenjev, Dostojevskij. 256 paĝoj. \$4.40 Us.

"Vojo kaj Vorto": Roberto Passos Noqueira. Poemoj originalaj kaj tradukitaj. 111 paĝoj \$2.50 Us.

"Esploroj. Poemoj": Baldur Ragnars-son. 123 paĝoj. \$2.50 Us.

Tiuj 4 verkoj estas eldonitaj de Juan Regulo (Stafeto).

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield, N.S.W. 2070

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 126 (206)

MELBURNO

MARTO, 1974

## AUSTRALIA KRONIKO

**PERTH:** La jara ĝenerala kunveno okazis 5/12 kaj, kiel kutime, nur malmultaj membroj ĉeestis. Ĉiuj funkciuloj raportis pri la agado en 1973 kaj la raportoj estis akceptitaj. Oni elektis la novan Estraron: Prez. D-ro I. Einihovici, Vic-Prez: S-ro C. Dean; Sekretario: S-ro W. H. Howard, Kasisto: S-ro O. Loneragan, Bibliotekisto: S-ro R. Smeets; Ekzamenisto: D-ro C. J. Caldera; Inform-Oficisto: S-ino Ruth McGrath.

Dum 1973 ni kunvenis en la konsultejo de D-ro Einihovici, sed pro aliĝo de 7 novaj membroj la ejo estas nun tro malgranda. Pro tio niaj kunvenoj okazos nun ĉiun 2-an kaj 4-an merkredon de ĉiu monato en "Secondary Teachers' College" Nedlands de la 7.30-a ĝis la 10.00 vespere.

**MELBOURNE:** "Varmeco, Malvarmeco, malsekeco, sekeco", estis la titolo de vere erudicia prelego, kiam S-ro A. Baldwin (3-a Dec.) klarigis la scienistan konstaton pri la konsisto de la materia mondo, kies daŭra ekzisto dependas de preciza ekvilibro inter ĉiam batalantaj elementoj, kaj kies ekzisto aŭ pere dependas de ŝanco. La malnovecon de tiu konstato li emfazis citante el la Biblio kaj el "Paradise Lost" de John Milton (vd. Lib. 2, verso 890-910).

S-ro Marshall Cohen, kiel multjara laboranto en la ŝufabrikado, priskribis 10/12 la diversajn laborojn, precipe sian —ŝudeseĝnadon—montrante per modeloj la "etapojn": desegni, eltondi kaj konstrui ŝuon.

La ZAMENHOF-FESTO okazis je 15-a Dec. en YWCA-salono. Ĉeestis

57 personoj el ĉiuj 4 lokaj kluboj, kiuj ĝuis varian programon: S-ino kaj F-ino Sanders ludis la pianon, la Malvern E-Grupo aktoris kaj kantis, la Oakleigh E-Grupo prezentis "Radio-Skeĉon", George Kuhlman legis profundsentaĵajn vortojn de Zamenhof kaj de Privat kaj S-roj H. Beechey kaj A. Baldwin trafeskizis elstarajojn de 1973 kaj emfazis ke la progreso de nia movado kaj lingvo konsistas el la sumo de ĉies penado. Festparolanto Ken Linton enkonduke klarigis la 3 kategoriojn de nia movado: la lokan, kiu konsistas el kluboj kaj okupiĝas pri instruado; la landan, kiu propagandas, unuigas kaj organizas tutlandajn kongresojn kaj la mondan, kiu plenumas internacian rolon, kaj kiu estis revo de D-ro Zamenhof ekde la komenco de E-ó. Li mem ne sukcesis pri tiu, sed fine la "Zamenhofa revo realiĝis" dank' al klopodoj de Hector Hodler. Sekvis skizo pri la fondo, historio kaj kresko de U.E.A. Kompreneble ne mankis la kutima refreŝiga regalo post kantado de "La Espero".

La "Jarfinan Feston" 17/12 en la E-Domo ĉeestis nur deko da klubanoj, sed ĝi okazis en tre gaja atmosfero, kun muzikaj prezentitaĵoj de S-roj Beechey kaj Baldwin, komuna kantado kaj luksa vesper-manĝeto.

La nova klubjaro komenciĝis promesoplene. Je 21/1 S-ro Linton montris siajn belajn kolor-diapozitivajn pri Brizbano kaj pri la kongresaj okazaĵoj.

Je 4/2 ni gastigis S-ron H. Nagai (Osaka), kun kiu ni amikiĝis en Brizbano. S-roj Cohen kaj Linton montris pluajn diapozitivajn pri la Brizbana Kongreso. Samvespere komenciĝis promesoplena nova kurso por komencantoj. **OAKLEIGH:** Nia grupo havis sian

Jarkunveno je 6-a de Feb. Nova estraro elektigis: Prez: S-ro Jack Fallu, Vic-Prez: S-ro N. Butkunas; Sekretario: S-ro R. Reed; 2-a Sek: S-ino I. Fallu; Kasisto: S-ino Gillam, Sekr. por amuz-vesperoj: F-ino A. Hearn; Komitatanoj: S-ino U. John, S-roj M. Fordham & S. Rogers. Ni esperas havi 3 grupojn: komencanta, mezgrada kaj supera. Ni decidis sendi donacon al Brizbano helpe al inund-viktimoj.—M. Sanders.

**SYDNEY:** 4/2: Ni bonvenigis Hispanon, Josef Farinas, kiu vizitas Aŭstralion. Shirley Fanos raportis, ke la Parolkunveno okazis ĉe Esperanto-Domo en la unua dimanĉo de la monato. Wre Chandler montris lumbildojn de Suda Viktorio. En Ballarat ni vidis vivsimilan skulptaĵon: "La Forkuro el Pompejo" kaj rememorigilojn pri la pasinta gloro de tiu historia urbo Viktoria: Orminejo, "lifto" por laboristoj, primitiva vindaso, transportilo funkciigita per ĉevalo kiu rondade marŝis, turnante lignan cilindron kaj volvigante ŝnuron kiu tiris sitelojn kun kvarco, kaj bildo de la Eŭreka flago. Poste en belverda Doongalla, ĉe la montaro Dandenongs, piknikis 278 devenuloj de la samaj prapatroj ankaŭ de Wre!

11/2: Ni bonvenigis vizitanton de Launceston, Tasmanio — Max Lefebre, kaj ni ĝoje sciigis, ke 15-ana grupo kunvenas en lia urbo. Max lern-atente observis tri klasojn instruatajn en la Domo. Wre informis, ke en "The Sunday Mirror" de 10/2 ĵurnalistino lin intervjuis pri E-o, kaj la artikolo estas bona publiko. David Gould montris lumbildojn: "Nomadoj en Norvegujo". La "nomadoj" estis li kaj amiko, kiuj tiulande veturis bicikle 130 mejlojn, kaj poste per vagonaro kaj ŝipo ĝis Oslo kaj Bergen. Pli ol 30 ĉeestantoj ĝue rigardis bildojn de montoj, akvofaloj kaj fjordoj.

18/2: La jara ĝenerala kunveno nomis novan estraron: Prez-o, Tom Elliott; vicprez-oj, Victor Bourlin; Shirley Fanos; Sek-io, Margaret Chaldecott; kasisto, David Gould; Bibliotekisto; Joan Green; programistoj, Joan Green, Thelma Smith, Gladys Taylor; kontrolistoj, Volo Gueltling, Thelma Smith; A.E.A. raportisto, Gerald Browne; Libro-peranto, Tom Elliott.

La raporto de la kasisto denove montris bonan aspekton, do ni akceptis ĝin plezure. La Societo havas 30 membrojn. Oni diskutis ideojn por kunvenoj; por havi pli multe da tempo por klasoj, estis aranĝite komenci kunvenojn je 8.30 ptm anstataŭ 8 ptm kiel eksperimento ĝis 18 marto.

**TOOWOOMBA:** Dum 1973 nia grupo havis 13 membrojn. S-ro Petley suk-

cesis aperigi 11 artikolojn en la loka gazeto, entute 91 cojnoj. Li ankaŭ prelegis pri E-o antaŭ "Rotaract" kaj "Alliance Francaise". S-ino Jean Lehane multe laboris kiel Bibliotekisto, Libro-Servanto kaj redaktoro de nia monata novaj-letero "Toowoomba Tereno". Dum la jaro ni bonvenigis vizitantojn: Ges-roj Moore (Rockhampton), S-ino D. Sinclair (Caloundra) kaj Ges-roj Woodruff (Moree). Ni partoprenis konferencojn de la Kvinlanda Federacio kaj ĉiun duan monaton, je la lasta semajnfino, ni havis studkunvenon en la hejmo de S-ino Lehane.

Nia Zamenhofa Festo estis granda sukceso. 20 personoj ĉeestis en la hejmo de S-ino Lehane. Naŭ membroj de nia societo partoprenis la kongreson en Brizbano kaj multon profitis de ĝi. Ni revenis hejmen plenplenaj de entuziasmo por plua laboro por Esperanto en la nova jaro.—M. A. O'Mara.

Ĉe la jara ĉefkunveno elektigis nova Estraro: Prez: S-ro H. Petley; Sekr/Peranto S-ino: Jean Lehane.

**JAPANINO** kun sia norvega edzo libertempos en Aŭstralio en julio kaj aŭgusto, kaj ilia vojaĝo havas aprobon de U.E.A. Ili serĉas senpagan aŭ malmultekostan loĝadon. La virino jam vizitis ĉiun landon krom Aŭstralion, Nov-Zelandon kaj Nov-Gvineon en sia mondvojaĝo por disvastigi Esperanton.

Proponantoj pri loĝado en ĉiu ĉefurbo bv. skribi al la ĉefdelegito, S-ro K. G. Linton, 11 Poplar St., South Caulfield, 3162.

## LA REDAKTORO

Disĉiplo Zamenhofa li — viro jam maljuna —

Dum multaj horoj sidas li ĉe redakt-labor' prepara,

Zorgante pri gazeto, la enhavo aranĝante,

Kaj foje en la sama temp' trinkante kaj mangante.

Dezirus li, ke la legantoj ĝiajn tekstojn ja ĝuadas,

Samforte kiel li, kun alta ĝu', la enhavon konstruadas.

A Zamenhof disciple — by now well up in years—

He many hours sits alone and manuscripts prepares,

Arranges, edits, oft gainst time — for him so well named 'fleeing'—

With busy pen, and mouth engaged in drinking and/or eating.

May each of you his pleasure share, these pages now perusing.

—Sufficient wage for all such time as willingly he's using.

**BRISBANO; KVINSLANDO.**

Mi ne "korektos" la "z" en "Brizbano" kaj "Kvinslando", kiam tiuj formoj devenas de alia plumo ol mia, sed mi mem fidele sekvas al la mond-vaste kaj supozinde plejparte imitataj formoj de tiuj propraj nomoj en la P.I.V.

La prononco kun "s" estas facila kaj konforma kun la skribata formo. Se la z-anoj konsekvencaj agas, ili skribus: "egzakta", anstataŭ "ekzakta", tial ĉar la Angloj tiel prononcas tiun vorton; simile pri aliaj. Malgraŭ ke la komenca litero "S" estas prononcata de Germanoj kiel "Z", ili tamen skribas: Sigfrido, Sigmundo, Sudetenlando k.t.p. kaj ĝenerale atentigas prononci la E-ajn formojn sible, ne zume.

Tamen, inverse: estas stranga la radikoj "filozof" en tio, ke en latino kaj almenaŭ ses ĉefaj Europaj lingvoj la formo estas kun S—nur la Portugala uzas Z. Kial nome Zamenhof elektis la nekonforman Z-literon por tiu radikoj? Ĝi oficialiĝis per la Unua Aldono al la Universala Vortaro en 1909. Estas rimarkate, ke ankaŭ bonaj E-istoj iufoje "eraras", uzante: filosof. Tio estas komprenebla, pro la tre vasta esteco de tiu formo en la lingvoj de la kultura mondo.—Red.

**ARTIFIKO TRAF-EFIKA**

En mia hejma urb' la klimato en somero Dum tag' kaj eĉ en nokto ekstreme estas varma.

Al mi komforto mankas ĉe sablejo homosvarma;

Pli bone serĉi fridon sur propra doma "tero".

Mi metis ventumilon ĉe fino sur banbreto

Kaj min senvestiginte, enpaŝis la banujon.

Elektropove trafis min venteto post venteto

—Briz-banon dolĉan havis mi, kriante halelujon!

—Robo.

**"EL POPOLA ĈINIO**

Subscription to this impressive magazine, currently 52-58 pages, many in color, is \$1.20 for one year; 1.80 for two; 2.40 for three. Specimen from Fritz Mueller-Sorau, 11/242 Albany Rd., Petersham, 2049.

Novedzo montras sian edziĝfoton. Unu el la amikoj demandas: "Kial vi staras tiel malproksime de via edzino" "Por ke ni, se ni eksedziĝus, povu tranĉi la foton en du partojn". (E-Slovaka).

**DE JUAN REGULO . . .**

. . . Miaj faroj tre postĝis rilate miajn planojn kaj promesojn. Sed ne ĉion mi kulpas. Originalojn mi abunde havas, kaj same granda estas mia eldonemo. Sed laborfortoj, ĉefe por malgrandaj kaj metiaj entreprenoj, ĉiam pli mankas en mia arhipelago, ĉar ĉiujn glutegas la internacia turisma industrio, kiu plagas la insularon ĝis tia grado, ke oni devas importi laboristojn por domkonstruado kaj hotel-servado.

Mi antaŭvidas nun transiri al IBM-kompostado kaj ofseta presado, se mi povos elteni la kostojn de tiasistema varproduktado. Mi diras tion, ĉar ankaŭ ĉe ni la prezoj pafiĝis apenaŭ sekveble, kaj fiksi prezon, kiun baldaŭ la inflacio forglutos, aperas tre-tre riske, des pli en lantega libromarkato, kia estas tiu de Esperantujo. Tamen, mi provos, ĉar mi ankoraŭ volas strebi laŭpove servi al nia komunumo kaj eldonstimule kunhelpi niajn verkistojn . . ."

**CULTUREWISE ?**

"Australia today, culturewise (to use the favored Austerican (1) means of expression) is sinking out of sight into the Pacific" (Robin Boyd in "Australian Idioms"). Traduko:—Nuntempe Aŭstralio, kultursence, sinkas ekster vido en la Pacifikon.

Tiun esprimon Aŭstralianoj rekte prenis el Usono, kiu verŝajne adoptis ĝin pere de Germanaj enmigrintoj. Ĝi estas Germana parolajo adverbeca, ekz-e: zufälligerweise (akcidente), glücklicherwise (feliĉe) irrtümlicherwise (erare), kulturwise (kulture).

En kio do diferencas la vorto "culturewise" de "culturally"?

(1) Australian + American. Komparu: Eurasian. Vorto kunmetita el partoj de du vortoj.

**EARLIEST ESPERANTIST HERE?**

We have read about J. L. Cobbin, who was interested in Esperanto in 1888, a year after appearance of the first Textbook ("A.E." 12/69, 4/70, 5/70, 5/73; "R.E." Jan. 1932). Also of D. C. Reinitis, registered in Dr. Zamenhof's Yearbook (1907) as nr. 1394 in 1892, and Herman Ritz, 1397, in the same year. Both of Mt. Victoria, N.S.W.

Another pioneer E-ist in Australia was George C. Hodgson, Barry Street, Northcote, Melbourne: nr. 3009, registered in 1894. These three are the earliest persons we have record of.

Mr. Cobbin is not registered in the "Adresaroj" de Zamenhof.

### THE SIMONDETTI PRIZE

The article by Ray Chandler which brought to him and to the Australian Esperanto Movement the Simondetti Prize for 1973 appears in the current number of "La Mevo", organ of ORE (Ornitologia Rondo Esperantlingva). Small wonder that it gained the prize, for it is an exhaustive study of the interesting bird the Lowan (Leipoa ocellata) or Mallee Fowl as it is often called. Since ORE has members in at least 21 countries it can be readily seen how Esperanto can be put to practical use.

Ray believes that the International Language should be **USED** and not just played with. For this reason he is continually studying to add to his already vast knowledge of the language, and its possibilities. This is apparent in the elegant and exact Esperanto style in which the article is written. A life devoted since boyhood to the study of Esperanto has produced in our midst an outstanding Esperantist, who still finds time to teach, to organize, and to help others who call on him.

An article by Gertrude Pollard of Western Australia in a recent number made interesting reading about the Australian emu for Esperanto bird-watchers, and one about the Satin Bower Bird appeared at the same time.

The practical use of the International Language can be seen in this par from the latest issue of "La Mevo":

#### "Sukceso de teksto el "La Mevo"

La teksto "Veneno en la Ĉirkaŭaĵo" de Roy Wheeler kaj Barbara Salter, tradukita en Esperanton de G. Kirkwood kaj aperinta en "La Mevo", nr 15 (Majo 1971—pp. 3-9) (la verko kiu akiris la Premion Simondetti 1971) aperis tradukita en la nederlandan lingvon fare de nia membro Aleks Geysels en la revuo "Sjoenke" en Linkekeek (Belgio). Nia membro Geysels juĝis ke ĝi estas la plej bona teksto pri pesticidoj, kiun li iam estis leginta, kaj tial li tradukis kaj konigis ĝin".

In Australia the membership of ORE is growing fast. People are realising that their other interest (bird research) can be helped by the practical use of Esperanto for making world-wide contacts. This is the way forward for Esperanto —by proving that it really works. Bird lovers and indeed all those interested in wildlife are invited to join this worthwhile group — Grace Kirkwood, Coffs Harbour Jetty.

**S-ino M. CHALDECOTT PETAS . . .**

Ce la kongreso en Brizbano la pres-

oficisto menciis, ke ŝi bezonas helpo de la diversaj grupoj. Speciale ŝi deziras havi kopiojn de artikoloj aperintaj en lokaj gazetoj. Kiam ŝi havas sufiĉe da artikoloj, ŝi preparos "rondleteron" por la kluboj; sed antaŭ ol fari tion ŝi bezonas informon.

### 19th Australian Esperanto Congress Late Supplementary list:

- 151 Mrs. E. Strawbridge, Victor Harbour, S.A.  
152 Miss J. Johnson, Clayfield, Qld.  
153 Mrs. A. Duguid, Rockhampton, Qld.  
154 Mrs. K. Spencer, Balgowlah, NSW  
155 Mr. H. Sakaeda, Tokio, Japan  
156 Mrs. H. Sakaeda, Tokio, Japan  
157 Mrs. E. M. Heath, Brisbane  
158 Mrs. E. Petley, Toowoomba, Qld.  
159 Mr. H. Petley, Toowoomba, Qld.  
160 Mr. J. Pelly, Brookfield, Qld.  
161 Mr. B. Hodson, Aspley, Qld.  
162 Mr. J. Keats, Brisbane  
163 Mrs. G. May, Christchurch, New Zealand.  
164 Mr. I. May, Christchurch, New Zealand.  
165 Mr. H. Schepers, Won Wron, Vic.  
166 Mrs. A. Schepers, Won Wron, Vic.  
167 Miss Sumiko Susumago, Tokio, Japan.  
168 Mrs. M. Pritchard, Redcliffe, Qld.  
169 Mr. P. Nicol, Geebung, Qld.  
170 Mrs. J. Kennedy, Mt. Gravatt, Qld.  
171 Miss D. Clarke, Aspley, Qld.  
172 Mr. V. Dimovich, Sydney  
173 Mr. R. Ahrens, Norman Park, Qld.  
174 Mr. J. Mason, Toowong, Qld.  
175 Mrs. T. v. d. Boogaard, Adelaide, S.A.  
176 Mr. E. Whiston, Wavell Heights, Qld.  
177 Mrs. J. Carney, Toowoomba, Qld.  
State Distribution: Qld. 81; N.S.W., 37  
Vic., 30; W.A., 8; S.A., 4; A.C.T., 2;  
N.T., 2; Overseas, 13.

### OFICIALA INFORMILO

#### NOVAJ ANOJ:

Thompson, Mrs. S. K., Warwick, Q.  
Kennedy, Mrs. J. M., MacGregor, Q.  
Parks, Mrs. A., Armadale, Vic.  
Kutzia, Mrs. E. E., Mt. Gravatt, Q.  
Oehrich, Mrs. O., Cheltenham, NSW.  
Threlfall, Mrs. D., Rossmoyne, W.A.

#### IGMF:

Vella, Mr. C. J., Newborough, Vic \$2.00  
Kelly, Mr. D. T., Brunswick, Vic. 0.50

—Russ Baxter, sec., 13 Feb.



## KONGRESAJ IMPRESOJ

Kiam mi, en grupo da sudaj E-istoj, alvenis al Brizbana aerhaveno, Jack Greenhalgh kaj Baden Hodson bonvenigis nin, kun siaj aŭtoj Baldaŭ ni estis survoje al la Universitato. Neforgeseblaj estas niaj Brizbanaj amikoj, inter ili Win Greenhalgh, Mal kaj Val Robinson, Sybil Martin, Edna Jullie, Tom O'Grady, Trevor Steele . . .

En tiu aŭto de Baden, dum veturado al la Universitato, mi sidis apud li; ĉirkaŭ ni en la aŭto estis surskribitaj kartoj kun frazoj kaj vortoj, kiujn li evidente lernas parkere dum veturo. Kia entuziasmo! Li certe ne parolas krokodile! Eraroj aŭ ne, ni parolu E-e! Li vere lernas la lingvon jam nur dek monatojn. Kia bela ekzemplo; Mi ne aŭdis multe da nacilingva babilo dum la kongreso.

La por-Esperanta fervoro de Brizbananoj estas ĝenerala. Mal Robinson, kun helpo de la dolĉa edzino. Val inspiras kaj instigas al ĉiuj siaj samideanoj. Lia instru-metodo multe interesis la vizitantojn; ni sekvu la ekzemplon kaj ilin subtenu en ilia sinofera klopodado.

Ege kontribuis al la sukceso de la kongreso ankaŭ Prof-o "Robbie" Robertson, mia antaŭa instruisto E-a. Tiu spertulo povas kapable kaj kompetente sin esprimi kaj regi eĉ plej malfacilajn situaciojn.

La vic-sekretario, Herbert Koppel, bone prizorgis la protokolon per plumo de vere kompetenta, sperta E-isto. La helpema, rapid-parola Libroserva peranto, Tom Elliott, meritas altestiman mencion. Post laboro kaj ĉagreno, li starigis sian butikon kaj trovis inter alevantoj multajn klientojn. La vendsumo de libroj ktp. estas Aŭstralia Kongresa rekordo! Nenio estas problemo por Tom; por aferoj nefareblaj li nur bezonas iomete pli longan tempon. Eĉ sen iu mendita stokajo, lia bedaŭro-esprimo — en E-o — estas sincere konvinka.

La aktoroj, muzikistoj, prelegantoj ktp. havis specialan lokon en la programo. Ankaŭ la ĉefo de la babilada sekcio: tiu klera, ĝentila kaj aminda barbulo, Wre. Chandler, majstro de amuzaj historioj kaj ŝercoj, imprese kontribuis. Lia vasta vortaro mensa ofte helpas E-istojn al kiuj mankas lia sperto.

Busvojaĝoj: zorge elektitaj, bone aranĝitaj. Soforoj kaj gvidantoj: afablaj, helpemaj. La bankedo kaj balo estis unuaklasaj. Ne altnivelaj poentoj al la dio, kiu elektis la veteron! La temperaturo kaj humido plialtiĝis. Sed jam sufiĉe pri tiu temo!

Lastvice, sed certe ne lastrange, estas

la Kvinlanda Universitato — speciale Esperantujo, Internacia Domo! Saĝe elektita; komfortaj loĝejoj, dolĉaj manĝoj, helpemaj stabanoj.

Nur plene dediĉita teamo povas okazigi sukcesan Kongreson. Tian teamon ni certe havis en Brizbano.

Dankon al ĉiuj koncernatoj esprimas: Les Scott, 27/1/74.

## LINGVOJ KOMPARATAJ

Multaj E-istoj havas intereson pri lingvolerno. Ĉi tiu estas la unua el 5 notaretoj kompilitaj laŭ verko de Alison Peers: "New Tongues" (1945), kun kromkomentoj el aliaj fontoj. Sekvos notoj pri la Germana, Hispana, Itala kaj Rusa.

## LA FRANCA

En 1929 D-ro R. L. Ritchie, F-ino L. A. Lowe, S-ro W. H. Leek kaj la Reĝina Inspektisto D-ro E. R. Edwards raportis, ke ili "jam de longe estis impresataj de la ekstrema malfacilo de la Franca lingvo". Ili trovis, ke "fortigis tiun impreson la ĉiama atestajo prezentita al ili dum la tempo de ilia enketado". (Direktoraro de la Edukado: Folioj, nro 90).

En la frua lernotempo progreso estas malrapida, kun escepto de bonaj lingvemuloj. (1) La Franca estas tre malfonetika. (2) Vokala prononco tre malfacila. (3) La tri grafikaj akcentsignoj ĝenas komencantojn. (4) Genraj reguloj estas komplikaj. Jaroj devas pasi antaŭ ol lernanto povas fidi, ke li povas senere uzadi ĉiujn genrojn sen bezito. (5) Intonacio estas konstanta malfacilo kaj terure monotona por la oreloj de Anglo. Tre malfacile povas Anglo, sen apartaj avantaĝoj, paroli la Francan kun intonacio proksime laŭ la efektive bona Franca.

Estas ĝuste en la pli altaj lernoniveloj, t.e. iom multe superaj al la nivelo de la Unua Diplomo (First Certificate), ke lernanto komencas konscii pri la subtilaĵoj de idiotisma uzado, rafinitaj distingo de senco, ritmo proza kaj versa, k.t.p. La firme logika bazo de la Franca sintakso, la delikataj nuancoj de vortoj proksimume sinonimaj, la lerteco de la Franca en abstrakta esprimado, la riĉeco idiotisma, la vortoj tiel tre aparte karakterizaj, ke ili defias tradukon — ĉio tio trege malfaciligas altnivelan tradukadon de la Angla en la Francan. Atingas tiun stadion nur tre eta proporcio de la milionoj, kiu lernas la Francan.

D-ro Mario Pei konfirmas tion: "La Franca estas lingvo de malfacilaj sonoj. Gian prononcon ne facile akiras homo

ne naskiĝinta en ĝia parol-medio. Oni devas longe sin ekzerci por mastri la Francan literon R. La Franca estas tiel samegale malfacila kiel la Angla. La Franca literumado estas preskaŭ, sed ne tute, tiel malfacila kiel la Angla, ĉar la Angla estas la unusola lingvo kiu estas komplete anarkia ĉe la literumado, en tio, ke ĉiu Anglo uzas sian lingvon laŭ leĝo nur de si mem farita. Verdire, iuj nefrancoj bone parolas la Francan, eĉ bone legas, skribas ĝin — sed tio kostis multe da tempo kaj intense disciplina studado."

### EMERITO MERITA

Ricevinte peton de alilanda sam-o pri helpo al ekspozicio, S-ro Ivan Maddern ĝentile respondis, ke li ne povis ĝin plenumi. Simile li devis malakcepti petojn ke li persone mem korespondu. "Jam mia tempo estas plenokupata per Esperantaj aferoj, miaopinie plej gravaj. Mi kondukas Sendependan Korespondantan Universitaton en kiu 60 studentoj lernis Esperanton. Mi prelegas pri Esperanto, instruas klasojn, korespondas per grupletera sistemo kun 80 Esperantistoj en 42 landoj, kaj verkas artikolojn kaj librojn pri Esperanto." Ĉu vere li menciis ĉiun sian servon?

La grupletero N-ro 38 konsistas el kvin dense tajp-takstaj paĝoj — en si mem granda tasko de kompilo kaj manfaro.

Sukceson kaj sanon al nia brava batalanto, kies viv-ekzemplo nin instige inspiru. Li kaj liaj simuloj ĉi lande kaj transmare fidele plutenas la torĉon de niaj ideoj kaj esperoj.

### MENSAJ MIRAKLOJ?

En dec. 21 oni televide observis Israelanon, Uri Geller, demonstri fenomenojn ankoraŭ ne klarigitajn de la scienco. Unu el ili estas, ke li povis per psikokineto kurbigi kaj fine rompi forkon per mensa potenco, sen mantuŝo. Geller asertis, ke la rompiĝinta forko, se pesita per mikropesilo, montriĝus malpli peza ol antaŭ rompo.

Tio eble pensigis kelkajn rigardintojn pri la rakonto ĉe 2 Reĝoj 6/4-7: "Kaj ili venis al Jordan kaj hakis arbojn. Kiam unu el ili faligis arbon, la hakilo falis en la akvon. Kaj li ekkriis kaj diris: Ho ve, mia sinjoro! ĝi estas ja prunteprenita! Kaj la homo de Dio diris: Kien ĝi falis? Tiu montris al li la lokon. Kaj li dehakis lignon kaj jetis tien, kaj la hakilo suprennaĝis. Kaj li diris: Levu ĝin. Tiu etendis sian manon kaj prenis". (Zamenofa traduko).

### ESPERANTO EN G.D.R. ?

Redaktoro Blomberg, de "La Espero", Svedujo, skribis i.a. en tiu gazeto: "Erik Johansson sendis nron 3 de nia gazeto al amiko en la Germana Demokratia Respubliko, sed la tiea Poŝto ne enlasis ĝin. La informo de la orientgermana poŝto deklaris, ke la presajo ne estas registrita en la gazetlisto kaj sekve ne permesita. S-ro J. miras pri tio, ĉar li supozis, ke en G.D.R. la E-movado estas tre aktiva. Ĉu ekzistas unu okcidenta Esperanto kaj unu orienta en Europo?"

"La Espero" favore recenzis la revuon "Junularo" eldonita en G.D.R. Ni firme kredas je la libera interŝanĝo sen antaŭjuĝoj. Sed la stranga sinteno de la aŭtoritatuloj en G.D.R. ne estas novaĵo por ni. La rigida burokratismo, kiu evidente regas tie, estas sendube baro por libera interŝanĝo. Ĝi povas nur malutili al la G.D.R. — ĉar temas ne nur pri Esperanto — vekante dubojn pri la sistemo mem de tiu ŝtato."

(Ankaŭ ni klarinforme recenzis la verkon: "G.D.R., Bildoj kaj Faktoj" (dec. 1969). Supozinde niaj recenz-ekzempleroj de "The Australian E-ist" ne trafis sian adresiton. Jam de nun ni ne recenzos librojn venintajn el landoj, pri kiuj ni ne havas plenan certecon, ke ili libere enlasos nian organon.

—Red. The A.E.

### TABAKO "ESPERANTO"

En Toowoomba oni vendas tabakon "Esperanto — The Internatoinal Language". Fabrikas ĝin Pete Bros., Horsens, Copenhagen. Per la mano de bonkora amiko, la redaktoro ricevis paketon; li tuj skribis varman gratuleton al la Dana firmo. Estas ja im-presaj la elstare klaraj literoj sur la bela kovraĵo de tiu paketo.

### WILLIAM AULD SPEAKING

The Scottish Esperanto poet spoke at the Golden Jubilee of the Oomoto movement in Kameoka, Japan, in August. Here are a few citations from his splendid speech on the Future Perspective of the Esperanto Movement.

"The essay of Zamenhof: 'Esenco kaj Estonteco de la Internacia Lingvo', written some 70 years ago, is so logical, so rational, that the arguments set forth in it are still valid today.

"In my school 300 pupils every year begin to learn French. After five years they leave school, and from them not more than 30 know even a little of the language, while from this 30 not more

than three have reached a satisfactory standard. This is not exceptional in Britain.

"In Japan, English is taught, and many Japanese study it for from 5 to 10 years, but still fall short of satisfactory attainment.

"English is not fitted for an international language. Even by dint of intense study most people fail to master it. There are many kinds of English; in many parts of the world people speak it very differently. Indeed, even among English-speaking people themselves understanding is often difficult and even misleading. I have found this myself: when I visit the United States I have to give special attention to learning the American language. I speak not of pronunciation, but of words.

"If English were forced on the world as the international language, English speakers would have to relearn their tongue. I believe that the jargonising of English by those of other countries is far more hurtful to that language than Esperanto is.

"Some E-ists think the number of E-ists is important. Perhaps it is. But, to my mind, much more important is the number of countries in which Esperanto is spoken, and up till now I have not found one country where Esperanto is totally unknown and not spoken. That is the stupendous and significant miracle: that, in truth, it is found everywhere in the world".

—Translated from the original Esperanto.

(The essay of Zamenhof is found in the "Fundamenta Krestomatio". Relevant to the above is his fourth Conclusion: None but a planned language will ever be chosen as international". —Note by translator.)

### UZO DE PREZENCŬ

"Mi jam tridek jarojn estas tombisto". ("Hamleto" 149). = have been . . .

"Tridek jarojn mi estas en la servado" ("La Revizoro", 96). = have been . . . La Angla **perfekta** verbo-tempo.

Tia uzo estas tiel sama en la Franca: My uncle **has been** in France three days.

Mon oncle **est** en France depuis trois jours.

Mia onklo **estas** en Francujo jam tri tagojn.

How long have you been in London? Depuis quand etes-vous a Londres?

(depuis combien de temps).

Kiom longe vi jam estas en Londono?

Notu: "I have been waiting here for three hours"

Persono atendas amikon, kiu ankoraŭ ne venis. Li parolas kun oficisto ĉe la stacio. En tiu okazo, ni traduku per "Jam tri horojn mi **atendas** amikon . . ." (= ankoraŭ atendas).

Sed, se la malfrua amiko ĵus venis renkonte al li, tiu persono dirus al li "Jam tri horojn mi **atendis** vin." ĉar la tempo de atendado estas jam **pasinta**.

### SCHOOL OF "BABEL"

Under that heading "South African Digest" 12 Oct., tells of the "language computer" at Jan Smuts Airport in Johannesburg. It teaches several languages simultaneously. The senior instructress, Miss Elsa Coetsee is master of 13 languages, including Esperanto.

An air hoesess on overseas flights must know at least one other language in addition to English and Afrikaans. Bonuses are given for qualifying in four or more tongues.

### RECENZOJ

"Kun Siaspeca Spico!" Prozaj kaj versaj humurajoj originalaj: Raymond Schwartz. 16 x 22 cm. 216 paĝoj. \$4 U.S. Eld. Stafeto.

Amantoj de vortjonglo sin regalos per ĉi tiu kompilo plena de petola moketajo esprimita per pike efika vortmanipulo. Sprite li ŝprucas sur ĉion, kio taŭgas al lia lingva ludemo.

Ĉirkaŭ 30 tipe lertaj versaĵoj, 50 limerikoj pri fraŭlinoj, foje iom facilmore cinikaj, 30 (Sem)aforismoj. Sajne ke ĉiu Franca literaturisto devas sin turni al tiu verkformo. La 10 "Ridpunktoj" aperintaj en "Sennacieca Revuo" inter 1951-70, estas valora represo. Per kapnotoj Ulrich Lins klarigas la eventojn de la koncernaj jaroj, tiel rememorigante legantojn.

Esperanto taŭgas al vortludoj. Kalamburoj (vortludaj mistranĉoj) estas facile formeblaj por lingvolerta humoristo. Ok specoj estas klarigitaj en la libro: "El la Maniko", kies aŭtoro, Reto Rossetti, bone sukcesis sekvi la modelon de la Lorena majstro de l'sprito.

Tiel rigardate, Schwartz, per la fekundeco de sia humura temperamento, okupas unikan lokon en nia literaturo. Ankoraŭ en sia plej granda originalo, la romano: "Kiel Akvo de l'Rivero", tiu lia emo neretenebla riĉe montriĝas tra la tuta verko.

Krome, li ĝisfunde sciis la strukturon, la mehanismon de la lingvo, atestante tion per sia kontribuo al la participa

polemiko. En cerbumiga satireto pri la "refleksiva regulo" (p. 201) li invitas klarigon pri la senco de frazo: "La trinkejestro akompanis sian klienton al lia hejmo".

Li mem mutas pri sia propra opinio.

Specimene: "Feinkanto estas dolĉa vorto, elvokanta la tutan ĉarmon de l'poezio. Bedaŭrinde, la sama vorto en la vir-genro revokas nin al plej banala prozo".

La kruroj estas tre utilaj,

Kaj ĉiu homo havas du.

Do: dek kvin homoj — tridek

kruroj,

sed se vi prenas du de kok'

postrestas null!

Iom pli serioze li sentencas: "Ĉiuj lingvoj estus multe pli facilaj, se ne ekzistus poetoj."

Naskita en Metz en 1894, li mortis en 1973. Kiam aperos lia egalulo en lia propra verkokampo?

"**Biblia Revuo**", apr.-jun. Angelo Duranti, Piazza Duomo 4, 48100 Ravenna, Italy.

Du ĉefartikoloj: Literatura Historio de la Biblio, de H. Paruzel, kiu asertas, ke "preskaŭ superhomaj estas la taskoj de Bibliotradukantoj". Tiuj homoj devas havi kapablon aprezi la literaturan evoluon de la Biblio, kies enhavo estas "multafoje kaj multamaniere" esprimita konforme al la historia fono. Li kredas, ke antaŭ ol elekti esprimojn por la enhavo Esperanta, Bibliotradukantoj devas funde studi kaj primediti kiamaniere formiĝis la antologio de la Sanktaj Skriboj. En tio estas implica subtono, ke la Zamenhofa traduko estas nekontentiga, ĉar la Majstro ne plene plenumis la suprajn rigoraĵajn postulojn.

La dua artikolo, de D. B. Gregor, atentigas pri rimarkinda simileco inter la Kvara Mesia Eklago de Virgilio kaj la Evangelia antaŭdiro pri alveno de dia infano, Mesio. Jen resumo de tiu Virgilia Eklago: "La fina momento estas alveninta; baldaŭ okazos la naskiĝo de dia infano. Ĉi tiu estas destinita, post la forigo de la antikva kulpeco devenanta de pekado, vidi la homaron renovigita kaj novan eraon komenci en paco kaj justeco. Tial ĝojas samtempe la ĉielo kaj la tero". (Komparu: Jesaja 9/6; Luko 1/32-33). La frua eklezio vidis la similecon. Konstantino laŭdis la Eklagon, deklarinte ĝin Die inspirita kaj antaŭdiranta la naskiĝon de Kristo; laŭ legendo, Skta. Paulo ploris ĉe la tombo de Virgilio en Napolo; Dante skribis: "Vi min

poeto faris kaj Kristano" (Purgatorio xxii, 73) kaj elektis Virgilion kiel sian gvidanton tra la Infero ĝis la sojlo de la tera Paradizo; homoj konvertiĝis al Kristanismo pere de versoj el la Eklago. Sekvas 18-paĝa analizo de tekstoj.

"**Amuzaj Dialogoj en Esperanto**, por faciligi al novuloj lerni paroli la internacian lingvon". Albert Lienhardt; 141 paĝoj. Eldonis U.E.A. 4.50 guld. Sendkosto 10%. Revenda rabato 33% ĉe minimuma mendo de 3 ekz.

Dudek simpla-lingvaj dialogoj kun 2000 konversaciaj frazoj, demandaj kaj respondoj, plus 20 tutpaĝaj humuraj desegnoj; Laŭgrada arango permesas al lernantoj progresi de tre simplaj tekstoj al nivelo de normala konversacia lingvaĵo.

Troviĝas ankaŭ 12 valoraj konsiloj por kursgvidantoj. Jen tri el ili:—

Uzu frazojn kiel eble plej mallongajn. Tro longaj fortimigas novulojn kaj tedas malnovulojn.

Uzu participojn nur tiam, kiam estas nepre necese. Ekz., skribu aŭ diru: "Oni konstruis la domon en 1970, aŭ "La domo konstruiĝis en 1970", anstataŭ "La domo estis konstruata (aŭ: estis konstruita) en 1970".

Uzu interpunkciajn signojn malavare, kaj tiel faciligu legadon. Komparu du frazojn, samvortajn sed ne samsencajn: "La infano petis ĉokoladon, manĝante pecon da pano" kaj "La infano petis, ĉokoladon manĝante, pecon da pano". (Vidu: "Esperanto", nro 764, p. 116).

La dialogoj estas neniel banalaj; male, la temoj estas suke amuzaj, sprite spicitaj. Luksa papero, fortike broŝurita en poŝformato.

Unu rimarko: 100: "surpriziga" (legu: surpriza).

### BARCELONA TRADE FAIR

For 15 years now, the Fair has provided a stand for Esperanto and large wall posters in the language. Last June over 50,000 leaflets in Spanish were distributed there, bearing information on Esperanto.

Ĝis feb. 26 aliĝis al la U.K. en Hamburgo jam 965 homoj. Samdata komparo kun aliaj Kongres-jaroj montras, ke la 59-a U.K. havas ŝancon esti la plej granda en la lastaj 10 jaroj. (La Nurenburga Kongreso, 1923; 4963 anoj; la Budapeŝta, 3975).

La Usona \$ = 367 c. Aŭstralia. Jan. 18.

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield, N.S.W. 2070

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

Nro 127 (207)

MELBURNO.

Aprilo, 1974

## LA KANAĴLA MAŜINO

Kvankam ni vivas en mirinda erao de komputiloj, mia kono de pensantaj maŝinoj estas limigita al la malalta intelekta genro; tio estas aŭtomataj vendmaŝinoj. Mi bone konis multajn, sed ankoraŭ ne maŝinon, kiun mi vere povis fidi. Kelkaj estis iom fidindaj, sed aliaj estis kapricaj, kaj eĉ kanaĵlaj.

Ege timinda maŝino estis postenigita en nia konstruaĵo, kie mi laboras. Ĝi maŝino vendis, aŭ almenaŭ pretendis vendi varman kafon, aŭ kun kremo, aŭ kun sukero, aŭ kun kremo kaj ŝukero; ankaŭ varman ĉokoladon, kaj tri specojn de trinkaĵoj, ĉiujn en papertasoj. Ĝi kalkulis la prezon, kaj donis la monrestajn, sed kelkaj el la ofendoj de tiu maŝino kontraŭ la digno de homo estis senfinaj kaj lertaj.

Ĝi disdonis tri specojn de trinkaĵoj tute hazarde dum kelkaj tagoj, kaj tiam kontraŭ pago por varma kafo donis nur duonan tason de varma akvo. Unufoje ĝi akceptis la ĝustan monon por taso da kafo, jetis malplenan tason sur la plankon, kaj verŝis la kafon en sian propran kloakon. Alian fojon ĝi akceptis la pagon por varma ĉokolado, donis tason da kafo kun nur sukero kaj malĝustan monrestajn.

Baldaŭ la maŝino fariĝis tiel aroganta, ke ĝi efektive mokis la klientojn. Mi vidis ĝin verŝi tason da kafo, kaj ĝuste kiam la kliento estis prenonta la tason, ĝi faligis sian pezan ajuton en la tason, tiel ŝprucigante la kafon sur la veston de la kliento; tiam tra la truo, kie nun mankis la ajuto, ĝi surŝprucigis la sekvantan klienton de la kapo ĝis la piedoj.

Amaraj plendoj kondukis al la forpreno de tiu maŝino. Ĝi estis anstataŭigita per alia maŝino, kiu vendis nur kafon kaj varman ĉokoladon. Ĝi ne konsentis sin sufiĉe malaltigi por vendi trinkaĵojn. Naŭfoje el dek ĝi funkciis perfekte, sed la dekan fojon ĝi povis doni nur malfortan kafon, aŭ nur duone pleniĝis la tason, aŭ eĉ miksis kafon kun ĉokolado.

Poste ĝi donadis malĝustan monrestajn al foja kliento, kaj finfine ĝi komencis ŝteli monon — ne ĉiam, eĉ ne ofte, nur jen kaj denove. Kelke da friponitaj klientoj lasis pendigitan noton: "Ĉi tiu monstro rabis min." aŭ "Ĉi tiu kanaĵlo ŝuldas al mi monon". Kaj ili subskribis siajn nomojn.

Iun matenon multe misuzita kliento enmetis monon por kafo. La maŝino faris gluglan sonon, donis tason da kafo kaj monrestajn dekoble la prezon de la kafo. La kliento ne panikis, sed aplombe enmetis la ĝustan monon, kaj ricevis pluan tason da kafo. La maŝino malsane klakis kaj redonis la monon. La krizo finfine okazis! La maŝino pro sia konstanta intrigo kaŭzis al si nervan kolapson.

Kiam la famo disvastiĝis, la viktimoj de ĉi tiu maŝino kaj ĝia antaŭanto kolektiĝis ĉirkaŭ ĝi kaj enmetis ĉiujn specojn de moneroj, la plejmulton da kiuj la maŝino redonis, ofte kun bona dividendo. Aklamante kaj ridante, la klientoj trinkadis tri kaj kvar tasojn da kafo sinsekve. Malofte okazas tia sceno da ĝaja venĝo.

La meĥanikisto alvenis malfrue en la

posttagmezo, sed ĝis tiam mi staris kiel eble plej proksime, trinkante kafon kaj rigardante tiun maŝinon ridindigi sin. — El la angla tradukis Ken G. Linton.

## SCOUTING

A.E.A. LABORPLANO 1974/5.—

Tell the Scouts and Guides about their own Esperanto League. Every member of A.E.A. please help.

THE SCOUT ESPERANTO LEAGUE is an international organization for members of the Scout (and Guide) movement who use Esperanto. The S.E.L. has the following aims:

1. To spread Scouting ideals by means of Esperanto.
2. To spread a knowledge of Esperanto among Scouts and Guides.
3. To create a Scout literature in Esperanto.
4. To publish international Scout magazines in Esperanto.
5. To strengthen the ideal of brotherhood common to the Scout and Esperanto movements among the youth of all nations.

In 1918, a group of Scouters in England felt that the Scout world community could be linked in sincere brotherhood only when it could converse freely in one common language. The language had to be neutral, quickly learned, and practical for use in personal contacts. Esperanto filled the bill, and the League was formed with approval of the Founder, who in the first edition of "Scouting for Boys" advised Scouts to learn Esperanto.

The League has its own Esperanto textbooks and disc for Scouts and Guides to learn from; written especially for them. They are available through the Book Service of A.E.A.

Tell your local Scout and Guide leaders about S.E.L., their own Esperanto League. For more information, please write to me. JOHN MOORE, 34 Hadgraft Street, North Rockhampton, Qld., 4701.

## ESPERANTO FILMO

Baldaŭ aperos nova Aŭstralia dokumenta filmo kun Esperanta komentario. Prof-o R. Robertson kaj Wre Chandler registros sonbendon por "La Kvina Fasado" pri la Operdomo de Sidnejo. "Films Australia", estinte: Commonwealth Film Unit, esperas fini la filmon sufiĉe frue por prezento ĉe la E-a Kongreso en Hamburgo.

## AUSTRALIA KRONIKO

**PERTH:** Dimanĉe, 3-a Feb., okazis tuttaga "Seminario" en la oficejo de nia sekretario Bill Howard. Malfeliĉe, ne tro multaj eluzis la oportunon utile diskuti Lig-aferojn. La dekkvar membroj kiuj ĉeestis pasigis agrablan tagon. Ni diskutis estontajn reklamojn, klasojn kaj klub-programojn.

Nia Ligo havis standon ĉe la t.n. "Hyde Park Holiday". Ni distribuis 3500 kartojn pri Esperanto kaj ricevis letere 100 respondojn.

La unua kunveno en nia nova ejo en Nedlands okazis 13/2. La nova ĉambro estas grandspaca, la seĝoj preskaŭ luksaj, sed la akustiko iom malbona. S-ino Ruth McGrath donis interesan raporton pri la kongreso en Brisbano.

Subaŭdite ĉe "Hyde Park Holiday": Maljuna "Kultur-Vulturino", preterpasante nian E-standon: "Ho, Esperanto tute ne plaĉas al mi. Mankas al ĝi "Kulturo". Kaj kien promenis la "superulino"? Al la boksado! Kaj tiun kulturan arton ŝi rigardis dum la sekvantaj 20 minutoj.

**MELBOURNE:** S-ro F. R. Banham, 11/2 donis informplanan skizon pri la multaj krizoj tra la historio de Esperanto. Sekvis resumo de rakonto de S-ro Timmins pri malbonaŭgura rajdado al kaj reveno de kampara danĉefesto. S-ro Egbert Ottens, eks-nederlandano, kiun ni ne plu vidis en nia societo dum multaj jaroj, montris (25/2) bildojn pri vizitoj al Parizo, Nederlando kaj Germanujo.

La Jarkunveno okazis je 4/3. Laŭ la raporto de la Sekretario (H. Koppel) la Societo havis en 1973 kvar studentojn kaj 36 membrojn, entute do 40. (Lastjare 11 komencantoj kaj 29 membroj). Laŭ la raporto de la Kasisto (J. Munro) la enspezoj superis la elspezojn je \$159.14, ĉefe pro la fakto ke ni ankoraŭ ne elspezis la ĉi-jaran profiton de la "Amerika Teo": por nia Biblioteko. La Societo investis \$500 en la "Greater Melbourne Permanent Building Society", kiu pagas pli altan interezon ol la bankoj. La nova estraro: Prez. H. Beechey; Vic-Prez: A. Baldwin, H. M. Cohen; Kasisto: Brig. J. Munro, Sekretario: H. Koppel; Biblioteko: S-ino F. Koppel.

**SYDNEY:** 25/2: Pli ol 30 ĉeestis la kunvenon. Margaret Chaldecott parolis pri "La Loko de Homoj". La "homoj" estis la pasinttempaj indiĝenoj kaj la blankaj pioniroj. Frue en la 19-a jarcento, Kuring-gai estis nur nomo de certaj indiĝenoj, kaj lokoj kiel ekzemple Wahroonga estis kovritaj per virga

arbaro (unu arbo estis 30 futojn cirkle.) Si menciis la fruan historion de la urboj Pymble, Hornsby, Turramurra, Lane Cove k.t.p. kaj la konstruadon de la unuaj domoj, preĝejoj kaj lernejoj. Sharon Wickenden informis pri la "Antaŭenega Komitato", kiu celas informi ĉiujn, ke E-o vere vivas kaj estas preta por helpi la mondon, ankaŭ pri aranĝo kun la Youth Hostels Assn. por interŝanĝo de informo. Si deziras gazetojn por meti en "loĝdomojn". Fritz Mueller-Sorau ĉe Wesley Centre instruas fervoran grupon.

4/3: La membroj ĝojis sciigi, ke la Esperanto-Cambro ne estos luigita, do la kunvenoj daŭros kiel antaŭe. Partoprenis 17 anoj en ludo. Ĉiu ricevis 10 kartojn. Sur ĉiu karto estis Esperanta radiko, kaj laŭvice ĉiu devis parigi kart-vorton kun la supra vorto de alia ludanto. Ekz., se vi havis "Pik" vi metis ĝin sur "Dorn". Oni komprenis, ke "Bov" iris kun "Bovin", sed aliaj estis malfacilaj. "Libr" kun "Pens", "Sip" kun "Lign" k.t.p. La celo estas: fordoni ĉiujn viajn kartojn.

11/3: Ĉe la Wesley Centre en Sidnejo 21 komencantoj vizitas la novan klason. Fitz Mueller-Sorau antaŭe petis, ke membroj preparu rakontojn pri fantomoj, kaj 9 faris tion. Li mem komencis per historio de murdo en Aŭstralio, kiu estis malkovrita per stranga sonĝo. Ŝekvis rakontoj — diversaj misteraj, fremigaj, sed eĉ ne unu havis veran fantomon, sed nur simplajn klarigojn. Sekve do niaj haroj ne rigidigis!

**MANLY:** 1/2: Jarkunveno ĉe la hejmo de Ruth Carruthers. Nova estraro: Prez. Kevin Smith; vic-prez-oj: Frank Preacher, Robbie Robertson; sek.: Betty Cleminson; kas. George Thatcher; bibliotek. Kay Morrison. Poste vespermanĝo kaj babilado. Nova trimestro komenciĝis 5/2 en Vespera Lernejo: 2 klasoj: Elementa:- Arthur Cocking; Progres:- Les Scott, kaj diskuta grupo sub Robbie Robertson. Vizitis nin S-ino Veska Mikova, el Bulgario, kiu loĝis semajnon ĉe Edna Giles. Post fino de klasoj, May kaj Russ Baxter invitis la klub-anaron al sia hejmo por bonvenigi la interesan vizitantinon per kafo kaj kukoj. Fojfoje Sharon kaj Simon Wickenden invitis membrojn al sia hejmo por konversacia vespero. Nia Marjorie Duncan ankoraŭ restas en Anglujo, al kie ŝi estis vokita, Kristnaske, pro malsaniĝo de sia patro. Li nun plisaniĝas, kaj ŝi revenos aprile.—K.M.

**CANBERRA:** La Jarkunveno okazis je 29/1. Elektiĝis nova Estraro: Prez:

S-ino Mitzi Zagorskis; Sekretario: Brenda Thomas; Kasisto: Edna Heath, Publicisto: Noel Gamble; Kas-Kontrolisto: Colin Johns. Estis decidite ke la Klubo kunvenu ĉiumonate.

**BRISBANE:** Post la sukcesplena kongreso klubanoj revenis al klubaferejoj kun nova fervoro kaj dediĉo pri la novjaraj agadoj. Okazas 3 klasoj. F-ino Beverley Allatt instruas komencantojn kiuj jam finis enkondukan kurson, Tom O'Grady instruas progresantojn kaj Karl Gunster gvidas diskut- kaj tradukgrupojn. Ĉe la Baroona Lernejo Trevor Steele, Ges-roj Robinson, Tom O'Grady, Baden Hodgson kaj Gaye Phillips instruas 30 komencantojn.

La unua studsemajnfino okazis ĉe Coolum (16-17/2). 14 membroj ĉeestis kaj konsentis ke la dutaga vizito al E-ujo estis valorega.

**TOOWOOMBA:** Lastnumere, pro eraro de la presisto, ni ne presis la liston de la tuta estraro: Jen ĝi estas: Prez: S-ro H. Petley; Vic-Prez: S-inoj L. Buchan, Riordan, Sekr./Kasisto: S-ino J. Carney; Libroperanto: S-ino J. Lehane; Esperantoj: F-inoj O'Mara, Morgan, Borchert.

### Raporto de la Federacio

**Kvinslando:** La Jarkunveno okazis 10-an de Feb. ĉe Sutton House, Redcliffe. 16 membroj ĉeestis. La Prezidanto (S-ino D. Sinclair) raportis ke la membraro kreskis ĝis 70 el 5 kluboj. La Kasisto raportis ke la Federacio havas \$123 en la banko. La Urbestro de Redcliffe, S-ro C. Kroll, denove ĉeestis kiel prezidanto dum la elekto de la nova komitato: Prez: S-ino Doris Sinclair (Caloundra); Vic-Prez: S-inoj Edna Jullie & Veronica Clark (Brisbane); Kasisto: S-ino S. Martin (Brisbane) Kasisto: S. Kunze (Redcliffe); Publicisto: S-ino Peggy Ross; Redaktoro: Ray Ross (Brisbane). Ni esperas kunveni en Majo en Toowoomba.

**N.S.W.:** Membroj ĝojas sciigi ke la propono forluigi la ter-etaĝon de la E-Domo estas nuligita. Neniu entuziasmiĝis pri la propono, sed ŝajnas dum multaj monatoj ke tio estus la sola rimedo teni la financojn stabilaj. Felice, tiu minaco forpasis kaj Sidnejanoj denove spiras senĝene.

Nia venonta pikniko okazos je 21-a de Aprilo ĉe North Harbour. Post la pikniko ni kunvenos ĉe S-ino Eunice Graham en Balgowlah.

**Viktorio:** Kvardek naŭ pensonj partoprenis boat-ekskursion sur la rivero Yarra en sunbrila vetero. Bedaŭrinde, nia rivero ne estas komparebla kun la

belaj Swan- kaj Brisbane-riveroj aŭ la haveno en Sydney. Tamen, estis bona oportuno por babilado kaj planado de estontaj federaciaj kunvenoj.

### CICERO ON DEATH

If I err in believing that the souls of men are immortal, I err willingly. Nor would I have this error, which enchants me, torn from me while I live. But if, when I am dead, I know nothing, as some minute philosophers suppose, I shall not fear that dead philosophers will mock me". (De Senectute: Pri la Maljuneco).

Se mi eraras, kredante, ke la animoj de la homoj estas senmortaj, mi eraras volonte. Kaj mi ne deziras, ke tiu ĉi eraro, kiu min ravas, estu deŝirita for de mi dum mia vivo. Sed se, mortinte, mi jam ĉesos konscii, kiel iuj detalamantaj filozofaj supozas, mi ne timos, ke mortintaj filozofoj min mokos. — Cicero.

### H. G. WELLS KAJ G. K. C.

H. G. Wells argued against immortality; G. K. Chesterton affirmed it. Said the latter: "H.G. suffers from the disadvantage that, when he dies, if he's right he'll never know. He'll know only if he's wrong".

H. G. Wells argumente neis la senmortecon; G. K. C. jesis ĝin, kaj komentis: "H.G. estas sub malavantaĝo en tio, ke kiam li jam estos mortinta, li ne scios, ke lia argumento pravis. Li scios la veron nur se ĝi estas malprava".

Malcolm Muggeridge en sia verko "Jesus Rediscovered" (Fontana) p 186, simile sin esprimis: jen esence li diris: "Se la morto faros finon al mia vivo, mi ne scios, ke mi malpravis en mia surtera kredo, ke mi konscios post morto. Sed mi preferas nun vivadi laŭ supozo, ke mi transvivos morton. Se mia kredo pruviĝos erara, mi tamen deziras esti vivanta ĉi-tere sur la bazo de tiu ĉi eraro, pri kiu mi forte pridubas ke ĝi estas eraro".

Per tio li nekonscie (?) spegulas la sintenon de Cicero.

### "ESPERANTO KAPABLAS ĈION"

Nekrasov en "Literatura Mondo", junio, 1932, tion defie kriis. Auld en "Esperanto", jan. 1961 ehis-la frazon, modife aldonante: "Ĉiu lingvo estas precize tiel kapabla kiel ĝiaj uzantoj". Mijake-Sihej en "Revuo Orienta", aŭg., 1949, kritikante la tradukon de

"Faust", saĝe asertis, ke "postuli laŭsilaban samritman tradukon de Angla aŭ Germana poemo, kun multaj vortoj unusilabaj, en lingvon — Esperantan aŭ alian — kun vortoj plursilabaj, sen perdo de natureco kaj de senco, ofte celas la neebulon". ("British E-ist", nov.-dec., 1949).

En "Malgranda Revuo", nro 3, 1951 M. C. Butler respondas al artikolo de Auld, kiu ankaŭ tie aprobas la devizon: "Esperanto kapablas ĉion!" Butler skribis: "... neniuj lingvoj (eĉ ne Esperanto!) povas ĉion kapabli. Ĉiu lingvo havas proprajn belajojn, proprajn ecojn; en ĉiu lingvo (ankaŭ en Esperanto) troviĝas aferoj ne bone esprimeblaj en alia lingvo. Oni ne atendu, ke iu ajn lingvo perfekte esprimu ĉiun nuancon de ĉiu alia lingvo".

Kiel S-ro Auld venkus la metrikan malfacilon de ekzemple: "How Many Paltry, Foolish, Painted Things" (Michael Drayton), aŭ la enigmecon de "Prospice", kaj "My Last Duchess" (R. Browning)?

Vidu: A.E. 7/58, p. 30; 5/63, p. 227; 12/64, p. 50.

### PASTROJ KAJ BIBLILINGVOJ

"Mi konas pastrojn, kiuj konfesas, ke ili ne studis la Grekan Novan Testamenton post sia fin-eliro el kolegio. Nu, ĉu oni rigardus kiel aŭtoritatan iun homon, kiu pretendas interpreti la Francan literaturon, tamen povante legi Francajn verkojn nur per tradukoj? Sed estas fakto, ke multaj pastroj semajnon post semajno predikas kaj instruas la Biblian literaturon legeblan por ili nur en tradukoj".

Al tiu kontribuinto al la gazeto "British Weekly" alia respondis: ke tiu argumento estas sofisma. Li asertis: pastroj estas la ĝeneralaj praktikantoj de la teologio. Ĉu oni postulus de ordinaraĵoj kuracistoj preskribantaj drogojn al pacientoj, ke ili nepre havu la fundan scion de bio-hemiisto? Ĉu inĝeniero kontrolanta nuklean potencgeneran centron devas mastri la misterojn de la teoria fiziko? Ĉu dommastrino, antaŭ ol uzi gas-kuirilon, devas funde scii la teknikon de ĉe-marborda gasolea borado?

La praktika pastro ne sidas kiel ermito en studĉambro; li batalas en la polvo de la areno. Tion li povas fari, ĉar jam provizis al li armilojn la plej kleraj Hebreistoj kaj Grekistoj, kiuj multjardeke laboris super la tradukado Biblia laŭ la originalaj lingvoj. Pastroj kaj laikoj povas plenfidi al iliaj tradukajoj.



Ni aldonas ke la Angla poeto Keats ne sciis la Grekan. Malgraŭ tio, li estis kvazaŭ enkorpiĝo de la Helena animo, sentante en si intime spiritan afinecon kun ĝi. Neniu Angla poeto superas lin en tio. Ĉu oni rajtas vidi analogecon kun la supre dirita?

### FRUTEMPA SAMCELANO

Sur p. 9, "La Suda Kruco", aŭg., 1920, mi legis nomon: A. R. Cohen, tiama aktivulo de A.E.A. Mi alskribis lin, por ricevi rememorojn pri tiu tempo. — Red. S-ro Cohen kompleksis interalie per la sekvanta:—

Traduko: "Mi E-iĝis kiam 18-jaraĝa, en 1915, kiam loka deputito W. J. Beckett donis al mi lernlibron E-an. Ĉirkaŭ 1916 mi aliĝis al la Melburna E-Klubo, kie mi amike renkontis S-rojn W. J. Drummond, J. E. Pyke, C. W. Ballard, G. Hussey, R. Rawson kaj M. Hyde, tiama redaktoro de 'La Suda Kruco' kaj aŭtoro de 'The Esperanto Guide', kiu fariĝis nia 'oficiala' lernlibro. Aliaj membroj estis: F-inoj E. Larcher, Maud Helm, A. Sinnotte, aŭtoro de 'Lilio' (1918).

"La klubo kunvenis ĉiun vendredon vespere en la ĉefurbo, Mi komencis instrui E-on kaj studi kun celo gajni la diplomon de la B.E.A., kiun mi baldaŭ ricevis. Dum mia ofica tempo kiel prezidanto ni ofte ekskursis por kune nin ekzerci voĉe en E-o, kaj ĉirkaŭ 12 jaroj kutimis manĝi en la restoracio ĉe Myer en vendredaj vesperoj. Iam tie nekonata sinjorino sidis ĉe nia tablo; ni parolis nur E-on. Fininte manĝi, ŝi adiaŭe stariĝis kaj diris: "Estis bone, aŭskulti la Francan lingvon tiele tre bone kaj flue parolatan". (Bedaŭre, nia amiko ne raportis pri respondo al ŝi fare de la E-istoj. — Red.)

"Mi helpis al Les Pfahl organizi la Kongreson en Sidnejo (1) kaj iomtempe servis kiel Vic-delegito de U.E.A. en Melburno. En 1950 mi iris Londonon kaj tie vizitis membrojn de B.E.A. kaj la Centron de U.E.A. Dum multe da jaroj mi vaste multe korespondadis kaj nur lastatempe fordonis amason da poŝtkartoj ricevitaj el diversaj mondpartoj . . . Sincere via, Roy Cohen.

(1) Supozinde la Kongreso de 1920. En la listo de delegitoj ĉe la Kongreso Sidneja en 1923 ("La Suda Kruco", majo, 1923) troviĝas 91 nomoj, inter ili: A. W. Cohen. — Red.)

### A.E.A. EXAMINATIONS

Elementary: David J. Gould, West Ryde; Joan Heughan, Kirribilli (N.S.W.)

## AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

### FINANCA INFORMO POR LA

#### DUJARA PERIODO 1972/73

#### ENSPEZOJ 1972-73

Kreditsaldo 1/12/71		\$595.25
Kotizoj 1972/73	\$2248.77	
Kotizoj Antaŭpagitaj	12.00	
		2460.77
Ekzamenoj		76.20
"A.E." Abono		5.40
Profito el la Melburna Kongreso		640.59
Interesezo		98.33
Populara Kurso		
Enspezoj	1130.56	
Elspezoj	652.57	
		477.99
Mez/Sup. Kursoj		
Enspezoj	488.50	
Elspezoj	135.80	
		352.70
Publiciĝo — Tiny Goldsmith		
Memoraja Fonduso	516.60	
Publiciĝo — Generala	29.35	
Reklamo — Readers Digest		
(Bilanco)	399.68	
Donacoj — R. Harry		
Sporta Fonduso	14.00	
		959.63
Elspezoj	256.42	
		703.21
Diversaĵoj		14.66
Ceko Nuligita		5.24
		\$5430.34

#### ELSPEZOJ

"Australian Esperantist".		
Presado kaj Afranko		\$3249.96
Generala Afranko		121.24
Presado kaj Paperaĵoj		117.97
Adresaro		117.02
Imposto kaj Kurtaĝo		23.64
Kotizoj al U.E.A.		71.13
Donacoj—R. Harry		
Sporta Fonduso	50.00	
—Same de Membroj	14.00	
		64.00
A.E.A. Libro-Servo.		
Multobligilo-Servo		30.00
Diversaĵoj		179.09
Kreditsaldo 30/11/73		1456.29
		\$5430.34

#### SPECIALA KONTO

Saldo 1/12/71		\$433.81
Dumviva Membreco		54.00
Interesezo Ricevita dum Dujara Periodo		44.61
		\$532.42
Kaso nun Investita		\$532.42

"Doric", Skot-kampara dialekto de la  
Angla.

## KAROLO KAJ ERNA

Karolo kaj Erna amantis: Ho, kiel amadis la paro!  
Juradis la du fidelecon, egalan ja kun la stelaro.  
Sia viro li estis, sed li pekis

Tre virta ŝi estis, virino honesta laŭ ĉies plejcerta atesto;  
Si foje elspezis tre multe da mono, pro kosto de lia belvesto.  
Sia viro li estis, sed li pekis

Ili iris kun brako en brako. Paŝadis li pompe, pavece.  
Voĉis Erna, tre gaje: "Ho bela li estas. Fieras mi arde, certece!"  
Sia viro li estis, sed li pekis

Karolo iris al Nov-Jorko; lin ŝi sekvis per la trajn' sekvanta.  
Al li oran ĉenon donis, kun horloĝo — elspezo tre monkvanta.  
Sia viro li estis, sed li pekis

Erna loĝis en domaĉo, akvon trinkis, manĝis panon kaj sardinojn,  
Monon donis al Karolo — ulo amorema, li serĉis stratvirinojn.  
Sia viro li estis, sed li pekis.

Por bieron trinki Erna iris al drinkejo en proksima loko,  
Al kelnero petis: "Ĉu frekventas tie ĉi mia peka koko?"  
Li estis mia viro, sed li pekis!"

Respondis li: "Rakontu mi malkaŝe, plensincere:  
Mi vidis lin kun Mari-Blu. Parolas mi ja vere.  
La viro via vin perfidas peke."

Lombardejon ŝi aliris; mankis jam tolero, pacienco.  
Juveletojn ŝi deponis kontraŭ pafileto — sen licenco . . .  
Por pafi sian pekofaran viron.

Ĉe bordelo, kie loĝis li, ŝi pordon batis kun pasi', kolero;  
"El tie ĉi, kanajloj vi! Aŭ flugos vi al funda flam-infero!  
Mi mian viron, fi-pekanton, serĉas!"

La pafilon ŝi celis kun gesto minaca, sen eĉ la plej eta manskuo.  
Ĝi eksplodis bruege, bor-truis la pordon. Atestas videble la truo.  
Si serĉis sian viron — la pekanton.

Aŭdinte la krakon, envenis Karolo: "Ho Erna, pro Dio, sobriĝu, ne pafu!"  
Sed Erna per fingro denove ekpremis, kaj flugis la kuglo laŭ iro plentrafa.  
Mortante li falis — li, ŝia viro.

"Zorgu vi ne tuŝu min! ĉar al mi tre doloras.  
Timegas mi, ke jam por mi flegado ne valoras.  
Mi estis ŝia viro, mi pekinto!"

Cerko, ĉaro, funebraĵoj: homoj kun solen' mienas.  
Procesio al tombejo. Li, Karolo, ne revenos.  
Li estis ŝia viro, sed li pekis.

Sciu vi, ke ŝia aĝ' ne estis murd' puninda.  
Devas esti kontraŭ ŝi Justico juste blinda.  
Li estis ŝia viro, sed li pekis.

"Min fundfunde ŝovu en karceron sub la tero;  
Aŭ brulu mi en fajra put' simila al infero!  
Fi-pekulon, lin la mian, pafis mi!"

Al pendingo Erna paŝis; plenserena estis ŝi.  
Okulojn turnis ŝi ĉielen: "Dio, venas mi al Vi!  
Li estis mia viro, kaj mi pekis!"

Al ĉi rakont' ne serĉu vi moralon. La homoj tiel agos ĝis mondfino.  
Pruvata estas nur eterna vero: Perfida estas Viro al Virino.  
Li estis ŝia viro, sed li pekis.

Inspirite de la Usona legendo: kantopoemo "Frankie and Johnny", plagiatis F. R. Banham.  
(Strofo I: amantis = estis amantaj.)

## RECENZOJ

**La Arbo de la Sciado:** Pio Baroja. El la Hispana tradukis Fernando de Diego. 16 x 22 cm. 232 paĝoj. 260 pesetoj. Eldonis Stafeto. (Juan Regulo). "La plej granda Hispana romanisto de la 20a jarcento" naskiĝis en Vasĉujo en 1872, mortis en 1956. Ni citas la pritakson sur la dors-kovrilo de la verko, ne mem povante aprezi lian verkistan rangon kompare kun tiu de samjarcentaj Hispanaj romanistoj. Sed, per la paĝoj de ĉi libro sentema leganto tuj perceptas, ke verkis ilin homo de staturu literature granda. Lia stilo estas facile klara, esprime neta, sen kia ajn fraza komplikeco. Tion la tradukinto spegulis per klasike simpla lingvaĵo. Tre multas neologismoj; la glosaro listas precipe proprajn nomojn kaj kelkajn Hispanismojn.

La aŭtoro nomis ĝin filozofia romano, la plej bona el siaj tiaspecaj verkoj. Tiu spekulativa pensado evidentiĝas precipe en la Kvara Parto, kie okupas la dialogantojn diskuto pri Hobbs, Kant kaj Schopenhauer. Paragrafoj en ĝi pensigas pri simila en: "Patroj kaj Filoj" (Turgenev) kaj aliaj Rusaj romanistoj.

Entute la verko estas suka—ne seka; Baroja intime tuŝas la interhomajn rilatojn — amon, sanon, plezuron, plezuron, doloron, ridon kaj ploron. Ĝi estas epizode aranĝita, simile al ĉapitra sinsekvo de noveloj, tiel ke oni povas legi ĝin temp-interspace, sen perdo de la ĉefa fadeno.

Verkita en 1911, ĝi fruktiĝis en la plej mense vigla tempo de lia vivo. Ĝi estas aŭtobiografia en tio, ke la du ĉef-roluloj prezentas en si la du partan konsiston de lia propra naturo, lian oscilecan spiriton en ĉio koncerne la homan destinton.

Bonkora homo, li "ĝuis" malbonan famon, kaj li frue devis fronti kriaĉantojn kontraŭ liaj verkoj. Nur malfrue li vidis modestan vendon de siaj romanoj; la unuaj mil ekzempleroj de la unuaj 30 romanoj elĉerpiĝis nur post 30 jaroj (1). En la interfrata milito 1936-39 li

sin trovis mortdangere kulpigata pro liberpenso esprimado, sed portempe fuĝis.

La verko certe ne konformas al la bazaj principoj de pense rigida ŝtatregado, kaj ĝia apero sur Hispana tero supozigas aŭ nescion, aŭ ignoron, aŭ jam kreskintan "indulgon" flanke de la koncernaj aŭtoritatuloj. Al kio do ni ŝuldas eldonon de tia verko sub dube favoraj kondiĉoj—certe al Juan Regulo Perez, kiu cetere prezentas ankaŭ riĉinforman antaŭparolon pri ĝia fono kaj la dirvolo de la aŭtoro.

(I) Tiu eldono estas presita en 1500 ekzempleroj. Esperinde, ke, malsame ol la sorto de la unuaj verkoj de Baroja, ili vendiĝos en ne pli ol tridek monatoj.

### "LITERATURA FOIRO"

S-ro Ken G. Linton, ĉefdelegito de U.E.A. por Aŭstralio, anoncas, ke li estas la peranto por la relative nova, sed rapide kreskanta kaj altnivela literatura revuo: "Literatura Foiro". Abonontoj sendu \$2.80 al S-ro K. G. Linton, 11 Poplar St., South Caulfield, Vic. 3162.

"**Telopeo**", oficiala organo de la Esp. Fed. de N.S.K. Nroj. feb., marto, 13 paĝoj da sprita, distra kaj stimula teksto. Kontribuis Les Scott, Edna Giles, Noe Wright, Norman Brodie, G. Browne, Betty Cleminson. Abono 50c ĉe Les Scott aŭ Wre Chandler.

### KORESPONDADO:

Studenta rondo dez. kor. pri ilus. p.k., prospektoj, turismo. Szentei Laszlo, H.-7601 Pecs, Boszovkanyu 2, Hungary.

Pri lingvoj, pop-muziko, ilus. p.k., popolmoroj. Miguel Hernandez, 60-729 Altos, ES 9 7ma., Marianao 13, Havana, Cuba.

Pri p.m., p.k., ŝipemblemoj k.s., naci-festotagoj, maraj temoj. Vladimir Kur-guzov, ul. Sverdlova 2 kv 14, Yalta 334200, Crimea.

# The Australian Esperantist

(Successor to *La Suda Kruco* and *La Rondo*)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



President: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroks St., Northbridge, N.S.W. 2095.

Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield, N.S.W. 2070

Address of A.E.A.: R. Baxter, Box 415, P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

Nro 128 (208)

MELBURNO

Majo, 1974

## AUSTRALIA KRONIKO

**PERTH:** Kiel rezulto de intensa varbado ĉe "Hyde Park Holiday"—3-taga festivalo subĉiela — okazinta fine de januaro, la Ligo ricevis multajn informpetojn pri E-o. Bedaŭrinde, informpeto ne egale signifas decidon lernadi.

Tamen, la klaso ĉe Subiaco, sub aŭspicio de la Fako por Teknika Edukado kaj estrata de Vera Payne, nun havas 22 membrojn krom kelkaj kiuj faras daŭrigan kurson. Krom tio, formiĝis grupetoj en aliaj lokoj — Rossmoyne (gvidata de Dorothy Threlfall), Perth kaj Cottesloe (Olive Hunt), Mount Hawthorn (Rene Smeets), Floreat Park (Dro Einihovici). E-o denove estas fakultativa studobjekto ĉe la Kolegio por Mezlernejaj Instruistoj ĉe Nedlands. Dro Caldera ankoraŭfoje instruas tie. Samloke kunvenas vespera grupo por progresantoj gvidata de Edith Palmer.

Ci-jare la klubo ankaŭ kunvenas ĉe Secondary Teachers' College—en luksa salono senpage disponigita de la Kolegio..

13/3: John Poole-Johnson incite proponis ke "Ni Forjetu la Akuzativon". John sprite kaj verve klarigis sian proponon. Poste la ĉeestantoj dividiĝis en grupetojn por diskuti la temon. Fine, reprezentanto el ĉiu grupo resumis la opiniojn al la plena kunveno. Ne, ni ne decidis "plibonigi" la lingvon, sed John estas gratulinda en tio, ke li devigis nin serioze pensi pri la strukturo de nia lingvo.

27/3. Gojiga surprizo estis la unua

vizito al klubkunveno de niaj plej novaj anoj, Eileen kaj Arthur Oliver. En la loko de la prezidanto, kiu ĝuste tiam ferias ĉe Rottnest, Jack Hawks bonvenigis la vizitantojn. Tiuj klarigis ke ili ankoraŭ ne plene refortigis post longa kaj ege laciga vojaĝado. La iom longa distanco inter ilia hejmo kaj Nedlands malhelpas oftan partoprenon en niaj kunvenoj. Anoj vigle pridemandis ilin pri E-istaj kaj vojaĝaj spertoj.

7/4. Tridek-kelko da personoj partoprenis al E-pikniko en idilia loko inter la monteto Eliza kaj la rivero. Bela vetero favoris fotoamatorojn. Bill Howard efike prezidis ce la kuirfajro en impona antaŭtuko. Ĉiu mangis kaj babilis ĝissate. Oni povis aŭskulti diskoin de E- kantoj kaj poezio. Idyss Einihovici kaj Olive Hunt partoprenigis grupon da E-lernantaj infanoj, kies penojn S-ino E. malavare premiis per ĉokoladoj. Hugh McGrath portis sian E-ĉemizon, kiu altiris intereson — kaj mendojn!

10/4. Ni sentis varman plezuron en la ĉeesto de Ruth Carruthers el Sydney, kiu vizitas geamikojn en Perth. Vera Payne interese prelegis pri "Ripe-tiĝantaj Songoj", fenomeno kiun ŝi mem de tempo al tempo spertas kaj pri kiu ŝi antaŭ nelonge legis en gazetartikolo. Ni diskutis pri tiu temo kaj ankaŭ pri "Vizito al Plumba Minejo", pri kiu rakontis al ni Sue Blockey.

17/4. La prezidanto, D-ro Einihovici, kaj sekretario, Bill Howard, havis ŝancon taskon elekti donacon por sendi al E-istoj en Kagoŝima, la estiĝanta urbo-

ĝemelo de Perth. Belan lingnajon kun surskribo por memori la eventon afable transdonos, en la nomo de la Ligo, Urbo Konsilanto S-ino Beecroft al Sekretariino Hamada Taki de la E-Rondo Harmonia en Kagoŝima.—Ruth McGrath.

**SYDNEY:** 18/3 Norman Brodie montris lumbildojn, kiel kutime interesajn. Li fotis ilin aŭtobuse vojaĝante tra Suda Ameriko. Ĉe Antofagasto ni vidis modernajn urbegojn. Santiago, ankaŭ en Cilio; tiam, post vojaĝo tra tunelo en la Andoj, Rosario kaj Bon-Aero, San-Paulo, Rio-de-janeiro kaj Brazilio, ĉefurbo Brazila. Plej mirigaj estis vido al la Akvofaloj Igacu, du mejlojn larĝaj, kiuj falegadas 250 futojn.

Nia gast-parolanto Arthur Cocking prelegis pri: "Kompatu la Grasulon". Li vigle defendis la grasulon, kiu ja bezonas kompaton. Nuntempe neniu primokas homon kiu estas alta aŭ malalta, stultulo, balbutulo k.t.p., sed ili malestime ridindigas kompatindan grasulon. Arthur pludiris, ke estas malvere, ke graso estas rezulto de nesaga aŭ tromulta manĝo-trinko; fakte, okazas en granda familo, kun la sama dieto, ke iuj el la infanoj estas grasaj, kaj aliaj estas malgrasaj. Diskuto sekvis: iuj kontraŭis.

Aliteme: Li demandis la ĝustajn vortojn por traduki: Universitata degree, ĉar li konsideras, ke "Universitata diplomo" en vortaro ne estas ĝusta. La kunveno preferis la formon: . . . . Grado.

1/4: De devis ŝanĝi la programon sen averto, do la rimedoplena prezidanto kolektis kelkajn artikolojn — kuleron, libron k.t.p., kaj ĉiuj ludis, "Kio mi estas?" kaj ankaŭ "Dudek Demandojn".

8/4: Spite al la benzina striko la membroj kutime kunvenis; Fritz Mueller-Sorau, ĉiam rimedohava, legis atentotirajn kaj amuzajn pecojn el E-aj gazetoj kaj libroj, ekz., "Kredu min, Sinjorino". Interalie li ridis pri paciento kiu plendis al "kapo-ŝrumpisto": "Doktoro, kiam mi unue alvenis al vi, mi pensis, ke mi estas Napoleono, sed nun mi pensas, ke mi estas neniŭ". La Klubo ne kunvenis en Paska Lundo. — G. E. B.

**MELBOURNE:** Pro lastminuta strat-akcidento (25/3) kaj rompiĝinta piedosto, nia parolanto S-ro Ken Linton ne povis ĉeesti. Do, la klubanoj povis nur "krokodili" super la te-tasoj. Por "honori" la daton — 1-a de Aprilo — F. R. Banham legis plurajn ŝerctemajn rakontojn.

"Arom — kaj drogherboj" estis la temo de alparolo de Prez. H. Beechey (8/4), kiu rakontis legendojn kaj priskribis la utilon por kuracado kaj kuirado, dum li montris siajn muntitajn specimenojn de pluraj tiaj herboj. Herbert Koppel prezentis du-eran programon. (15/4) Post iom da novaĵoj el la Esperanto-gazetaro, li montris kaj priparolis plurajn novajn librojn kaj E-ajojn haveblajn ĉe la A.E.A. Libro-Servo. Sekve de la prelego membroj estis instigitaj al aĉetado.

**MALVERN,** Vik.: "Mini-Festo" okazis en la hejmo de S-ino A. Paling sabate posttagmeze, 20/4, kun la celo enspezi monon por "speciala fonduso". Proks. 26 personoj pagis enirprezon kaj partoprenis diversajn ludojn kaj tetrinkadon en la bela ĝardeno ĉe 198 b Finch Strato. Poste endome ili vigle konkursis je aĉeto de pakaj diversprezaj, kies enhavon (ĉiam bonaĉeto) ili vidis nur poste. Enspezo atingis \$60.

**MORWELL,** Vik.: Posttagmeza klaso por sinjorinoj okazas ĉiun merkredon en la hejmo de la sekretario (S-ino M. Wybenga). En MOE klaso okazas ĉiulunde vespere en "Presentation College". Laŭ decido de la klubanoj okazos ĉiun trian monaton klubkunveno ĉe la farmbieno de Ges-roj H. Schepers en Won Wron.

**TOOWOOMBA:** Prez. H. V. Petley; vicprez-oj: S-inoj L. Buchan, G. Rear-den; kasisto-sekretario: S-ino J. Carney; bibliotekistoj: S-ino J. Lehane, F-ino G. Morgan; publica oficisto: H. V. Petley. Aliaj anoj de la komitato: F-ino O'Mara, Borkhardt, S-ino Maltman. (Represo pro eraroj en la aprila nro.)

**ST. LUCIA,** Q'ld: Finfine, post la ĝeno de la inundo la klubo kunvenis denove. Nia granda komitato iris al S-inoj Elsie Chapple kaj Mary Stephenson. Ili ambaŭ estis viktimoj de la inundo. Bedaŭrinde, ili ne estos ĉe la klubo ĉi tiun jaron. Ni bonvenigis du novajn membrojn. Ankaŭ pro la inundo la kurso por komencantoj ne povis komenciĝi — eble poste en la jaro ĝi tion faros. S-ino Win Greenhalgh ricevis interesan leteron de la Ministro por Komunikado. Ĉi tiun jaron nia stud-libro estos "Paŝoj al Plena Posedo", kune kun konversacio, dramo, prelegetoj, tradukoj, diskutoj kaj diktaĵoj.—W. Greenhalgh.

## UNIVERSITY DEGREE ?

Rhodes (1908): to take a uni. degree = atingi universitatan gradon. Fulcher/Long: diplomo, licencio. Wells: diplomo, licenciĝo. Butler: licencio. P.V., P/I/V.: licencio (universitata rango, meza inter matureca ekzameno kaj doktoreco).

## OFICIALA INFORMILO

### NOVAJ ANOJ:

Blunt, S-ro N. A., Lane Cove, N.S.W.  
 Murray, F-ino W., Lane Cove, N.S.W.  
 Poole, S-ro G., Kingston, A.C.T.  
 Rowley, S-ro A. E., Perth, W.A.  
 Duke, F-ino C., Mt. Waverley, Vic.  
 Harland F-ino M., Malvern, Vic.  
 Menzies, S-ro J., Glen Iris, Vic.  
 Schockoff, S-ro W., Randwick, N.S.W.  
 Davies, S-ino I., Herne Hill, Vic.  
 Shonhan, S-ro G., Rockhampton, Qld.  
 Stipson, S-ino P., Broken Hill, N.S.W.  
 Monset, S-ro M., New Farm, Qld.  
 Woodruff, S-ino E. W., Moree, N.S.W.  
 Simms, S-ino J., Emerald Beach, N.S.W.  
 Saunders, F-ino K. R., Parkville, Vic.  
 Johnston, S-ino O., Waterman, W.A.  
 Duncan, S-ro A., Rushcutters Bay, N.S.W.  
 Olsen, F-ino P., Townsville, Qld.  
 Bell, S-ro D., Turrumurra, N.S.W.  
 Lambarki, F-ino M., Newtown, N.S.W.  
**T.G.M.F.**  
 Woodruff, S-ro E. W., Moree, N.S.W. \$5.00  
 Pearson, S-ro R. H., Smithton, Tas \$1.00  
 Le Conte, S-ro F., Boronia, Vic. \$2.00  
 Randles, S-ino B. E. Kensington Gardens, SA. \$1.00  
 Thatcher, S-ro G., Fairlight N.S.W. \$5.00  
 Ross, S-ro I. A., Hornsby, N.S.W. \$1.00  
 Williams, S-ro M. F., Hamilton, N.S.W. \$2.00  
**ĜEN. FONDUSO:**  
 Schwerin, S-ino K. R., Milsons Point, N.S.W. \$3.50  
 Pearson, S-ro R. H., Smithton, Tas \$1.00  
 Laid, S-ro L., Catherine Field, N.S.W. \$2.00  
 Cettinge, S-ro J., New Norfolk, Tasmania \$2.00  
 —Russ Baxter, Sek., 9 Aprilo.

## ESPERANTA JURNALO?

Iufoje oni legas pri Esperantaj journaloj, sed fakte ekzistis kaj ankoraŭ ekzistas nur Esperantaj gazetoj. Tamen inter ni eble troviĝus optimistoj, kiuj vizias liveron de tia journalo frumatene en sia hejma leterkesto.

## Nova Grupo por Kvinlando

Esperanto klasoj komenciĝis ĉe la Ora Marbordo. Dekunu interesuloj respondis al anonco en ĵurnalo (Gold Coast Bulletin) kaj konatig-vespero okazis dimanĉon 17 Marto. La ĉeestantoj aŭdis mallongan paroladon pri Esperanto — la historio, la celoj, la utileco — kaj poste ricevis enkondukajn lecionojn. La entuziasmo de la grupo estas tre kuraĝiga. Ĉiuj esprimis gojon pri la bela lingvo kaj aranĝis kunveni en ĉiu dimanĉo por la studado — Joyce Torr.

## LIBERA FORUMO

En The A.E. (marto) mi rimarkis uzon de la -ata formo, kiun mi trovis kontraŭ mia ideo de ĝusta uzo. En la paragrafo kiun vi titolis: Brisbane, Kvinlando, vi skribis la vortojn: "kun la skribata formo". En la sama paragrafo vi skribis: "la komenca litero 'S' estas prononcata de . . .".

Mi rezonas jene: Antaŭ ol skribita formo povas ekzisti, iu devas skribi ĝin. Skribate, la formo estas skribata, sed tuj la tuta formo ekestas, t.e. la skribanto finis la formon, tiam ĝi devas esti skribita.

Simile kun via uzo de "prononcata". Antaŭ ol aŭskultanto povas ekkapti la sonon, la parolanto devas elparoli ĝin. Tial momente de la aŭdo, la sono jam estas prononcita.

Aliteme, mi legis artikolon en "Bulgara Esperantisto" pri pli facila uzo de nia internacia lingvo. Mi tute konsentas kun la aŭtoro. Li malkonsilas elizion de -o en kunmetitaj vortoj, kreitaj el du (aŭ pli) radikoj. Ekzemple, "redaktlaboro" estas malfacile prononcita, sed "redaktolaboro" glitas de la lango kaj ŝajne havas naturan akcenton.

Niaj estimindaj samlingvanoj kiuj kontribuas artikolojn al The A.E. ŝajne kredas ke la kunmeto de radikoj estas indiko de alte grada Esperanto. La unua paĝo de la marta numero portas la vortojn: ŝudesegnado, profundenta, festparolanto, klubjaro. Ĉu vere tiuj vortoj sekvas la principon de simpleco kaj facileco? Certe desegnado de ŝuoj, festa parolanto, kluba jaro estus pli facile komprenataj kaj tial preferindaj.

Parenteze, mi povas sciigi vin, ke almenaŭ po unu ekzemplero trafas la G. G. R.-on. Mi pagas la kotizon por amiko en Erfurt, kaj adresite al la loka Esperanto-rondo de la Germana Kulturligo, ĉiam ĝi alvenis.

Eble la supraj rimarkoj estigos iom da sana diskuto inter ni. — George Clarke (Orroroo).

### PRISEKSA PERPLEKSO

En "Svisa E-Revuo" ino akuzas E-on pri seksa diskriminacio, ĉar la vorto "sinjoro" estas uzata ne nur pri edzoj, sed ankaŭ pri fraŭloj. La vorto "sinjorino" estas uzata nur pri edzinigitaj aŭ vidvaj virinoj, krom en senco ĝenerala, kiel ekzemple: "Mi ricevis leteron de nekonata sinjorino," kaj ĉe paroladoj: "Sinjoroj kaj sinjorinoj!" kiel faris Zamenhof.

Kion do ŝi volas? Ke oni uzu: S-ro = edzo. F-lo = fraŭlo, analoge kun S-ino = sinjorino. F-ino = fraŭlino? Sed tio estigus taskon por ĉiuj, precipe raportantoj kaj similaj. Ni sentas sufiĉan ĝenon, streĉante la cerbon: kiel adresi aŭ mencii virinojn ĝuste laŭ ilia (ne)edzeca stato.

### SAVED BY ESPERANTO!

Mrs. Veska Mikova, a Bulgarian Esperantist, was holidaying in N.S.W. with Mrs. E. Giles of Collaroy. On the beach there she began to take off her top-piece to sunbathe. Alarmed, Mrs. Giles, in English, called on her to stop. Mrs. Mikova, knowing no English, looked puzzled — and her friend then translated her warning in Esperanto. Then, in the same language she informed the visitor that topless bathing is not yet accepted on the peninsula.

To Mrs. Mikava, Australians appear to be "rich", but in her city, Sofia, people get along happily on much less.

In Bulgaria, she added, there are many more Esperantists than here, and many more clubs. She has missed the many notices not only in her country but also in others of Europe, pointing the way to Esperanto "camps", where all who spoke the language are very welcome. She is planning to bring out her husband, son and daughter on her next visit to Australia. They too are Esperanto students. Mrs. Giles and she met at the London Esperanto Congress 3 years ago. — Fuller report in "Manly Daily", 20/3.

### OUR GAZETTE

I should be grateful for information from any readers who have the complete, or nearly complete, series of La Suda Kruco, La Rondo and THE A.E. from 1920; or indication as to where such collections could be consulted, such as Club libraries.—Editor.

### MISSING NUMBERS

Could any reader offer to Fritz Mueller-Sorau, 11/242 Albany Rd., Petersham, the following issues: "La

Rondo" 1940: Nr.2; 1941: 14; 1942: 17, 19, 20, 21, 24 to 26; 1943: 1 to 3, 4, 7; 1944: 4, 6; 1945: 9, 11; 1946: All after Nro. 4, 1947: 2.

"La Suda Kruco": Nrs. 1-104, 106-113; 115, 117-133, 135-136, 138, 140-158; all after 161. He needs them for binding.

### LA BUTONO KAJ LA BUBO

En klaso mia povis knab' ĉiame plensukcesi.

Envie, vane strebis mi por igi tion ĉesi. Finfine mi ekvidis, ke ĉe respondo-diroj, Butonon li fingrumis per senkonsciaj tiroj.

Gi estis ĉe la suba part' de brustovestostalia;

Sekrete mi fortranĉis ĝin — jen ag' malnoble fia.

Rezulton atendadis mi de mia faro aĉa: Ke ĉio iris glate, vidis mi kun alta plaĉo.

Car, demandite, staris li, balbute, en konfuzo—

Jam mankis la butono, pro kruela mia ruzo.

Kun kap' klinita, muta, pro prema voĉ-sufoko,

Li fuŝis la demandojn — por mi jen la ĉef-loko!

La lokon sian justan li poste ne reprenis. Pri la kulpinta kamarad' neniam li divenis.

Rimorso baldaŭ pikis min, kaj ofte mi intencis

Kompenson al li fari, kontraŭ kiu mi atencis.

Mi postafoje vidis lin vendplace aŭ sur strato;

Neniam mi parolis lin, pro honta animstato.

Mi malkuraĝe turnis min; renkonton mi tre timis;

Sentante min poltrono, mi min forte malestimis.

Mi kredas, ke oficis li subule ĉe la Juro. Nur homoŝel', fiaskis li en viv-konkursu kuro.

La mondo ne plu konas lin. Li mortis jam longjare.

Malgaja, drinkis li tro tro kaj kuŝas nun subtere.

—El la Aŭtobiografio de Sir Walter Scott, rime parafrazita de Robo. (Angla traduko havebla.)

## LINGVOJ KOMPARATAJ (3)

## La Hispana

Ĝi estas pli facila ol la Franca kaj la Germana je la studa komenco, tamen poste malpli facila ol la Germana kaj, eble, tiel same malfacila kiel la Franca. (1) Ĝi estas preskaŭ tute fonetika. (2) Krom tri frikativoj kaj la velaro, la konsonantoj estas facilaj; la vokaloj — tre facilaj. (3) Nur unu grafika akcentosigno. (4) Fleksio — tre simpla. (5) Intonacio — tiel same facila kiel la Germana.

La akcento similas la Anglan. El la substantivoj, 75 p.c. estas aŭ virsekse en -O, aŭ in-sekse en -A, -ION, -D aŭ -Z. Malmultas malregulaĵoj.

Posteaj malfacilaĵoj estas iom multaj. La sintakso estas malpli logika ol la Franca. Svarmas Arabaj, Usonaj, regionaj vort-elementoj, kune kun granda riĉo de diminutivoj, sinonimoj kaj similaj. Entute la lingvo estas tre penstreĉe **mastrebla**. (Ĉi tiu serio estas resumo de la opinioj de Alison Peers: "New Tongues": 1945.)

## EKZAMENOJ DE A.E.A.

Ili havas la celon: instigi kandidatojn studi **librojn** en Esperanto — vortarojn, lernlibrojn, biografiojn, historiojn k.c. Kandidato devas tion fari tute sola, nepre ne diskutante kun alia E-isto pri kiu ajn demando tajpita sur la Demandaro. Kompreneble, la kandidato libere uzos la sciojn akiritajn per antaŭa lernado sub gvido de instruinto, sed dum la dumonata skrib-ekzameno li/ŝi ne rajtas konsulti alian E-iston pri io tuŝanta la demandojn, kiujn li/ŝi devas respondi.

Por certigi tion, nur la ekzameno vidu la Demandaron kaj al neniu alia parolu pri ĝia enhavo.

La Komisiono fide esperas, ke la jamaj diplomitoj de A.E.A. konsciencie agadis laŭ la supra regulo, kaj ke ekzamenoj simile faros.

Pri alia afero: Superaj diplomitoj rajtas ekzameni por la Parola Parto elementajn kandidatojn. Estas do substrekinde, ke ili ne perdu siajn sciojn pri E-o; male, ke ili laŭeble strebadu ankoraŭ pli sin kompetentigi, voĉe kaj skribe, por ke ili povu sendube resti plene kapablaj por tiu devo. Estas danĝero malfavoriĝi kaj do lasi la menson rustiĝi; tio povas minaci kelkajn el ni. Kiom el la multaj gajnintoj de la iama premio Pyke, aŭ la atestilo, ankoraŭ restas en nia Movado? Estu evitata simila aferstato ĉe niaj "Superuloj". — F. R. B., Cefkomisionano.

## LA RUSA POSTO

Amiko en Ruslando sendis al ni ver-sajojn "utilajn por nia revuo". Petante, ke ni sendu al li ekzemplerojn en kiuj ili aperus, li dufoje avertis: "Nepre registru. En mala okazo ili tre facile 'perdiĝos'". Tiu urĝa konsilo aplikiĝas ne nur al gazetoj sub banderolo, sed ankaŭ al normalaj leteroj. La eufemismo "perdiĝos" estas signifa.

La alta kosto de poŝta registrado kaj la daŭranta timo, ke adresato tre povus ne ricevi sendaĵojn, malemigas nin ekspedi materialon al lando, kie, ni devas supozi, Esperanto ankoraŭ ne trovas favoron.

## ATENCOJ KONTRAŬ REGECULOJ

Jen por via notlibro: atencoj kontraŭ la reĝino Viktorio:

Junio 1840: Edward Oxford, frenezulo, malfrate pafis dufoje.

Majo 1842: John Francis. Unu mispafu. Pune ekzilita dum lia vivo.

Baldaŭ poste, iu nomata Bean, ŝin atencis. Punita dum 18 monatoj en prizono.

Majo 1849: Iu nomata Hamilton, per pistolo senkugla. Sep jaroj en punezilo.

Majo 1850: Robert Pate batis ŝin en la vizaĝon per bastono. Sep jaroj en punezilo.

Feb. 1872: Roderick Maclean, frenezulo, pafis, maltrafis. Lia puna sorto estas nekonata.

1867: Henry O'Farrell pistole vundis la Dukon de Edinburgo, duan filon de Reĝino Viktorio ĉe Clontarf (Sidnejo). Ekzekutita.

1900: en Bruselo, Belgo nomata Sipido, pafis unufoje al la Kronprinco Eduardo, poste Reĝo. Belga kortumo ordonis, ke la atencinto, knabo 15-jara, estus metita sub polican kontrolon ĝis lia maturiĝo.

## EL PORTUGALUJO

Kun ĝojo ni salutas al la Portugala E-a Asocio. Jam de aprilo, 1972, la Portugalaj E-istoj denove havas rajton al laŭstatuta organizo post kelkjara malpermeso de la ŝtato. La prezidanto de P.E.A. estas Prof-o Alves de Moura.

En junio aperis nete impresa gazeto 32-paĝa en E-o kaj la Portugala ĉe Av. Berna 31, 2 Esq. Lisbon I. La P.E.A. nombras ĉ. 400 anojn. Tio estas komparinda kun la an-nombro de nia A.E.A. En Portugalujo loĝas ĉ. dek milionoj da homoj.



Estas admirindaj niaj Portugalaj amikoj, kiuj restis fidelaj al E-o, ĝis lastatempe grave malhelpate en sia laborado por la Movado.

### "AMIKECO TRANS LIMOJ"

Kion oni deziras esprimi per tiu slogano? Evidente nur jenon: amikeco ligu homojn, kiuj troviĝas ambaŭflanke de ŝtataj aŭ landaj limoj. Oni tion esprimas per metafora uzo de la prepozicio "trans", kiu signifas movon sur pli malproksiman flankon de io sur alia malproksima flanko. Se oni deziras esprimi penson gramatike ĝuste, oni diru: amikeco iru, etendiĝu trans limojn. Necesas akuzativo, ĉar temas pri morala movo, kiu respondas al la demando: KIEN?, sed ne KIE?

La formo de la slogano fakte signifas absurdon, ĉar, uzante nominativon de la vorto "limoj", oni respondas al la demando "KIE" — oni kvazaŭ parolas nur pri la amikeco, kiu ekzistas ne ĉi-flanke, sed nur translime. La nominativa formo de "limoj" tute ne aludas pri tio, ke la amikaj sentoj "iru TRA limoj" de unu flanko sur la alian.

Oni elipsis el la slogano la verbon, ĉar ĝi estas facile divenebla. Zamenhof skribis: "pensoj iras trans limo". (1) Tio estas hazarda eraro; en alia loko li uzis akuzativon: "hirundo flugis trans riveron".

Tiel same, la titolo "Saltego trans Jarmiloj" efektive signifas: ke iu iam saltegis en SAMA tempo, sed ne el unu tempo en alian. Do ankaŭ tiu titolo bezonas akuzativan finajon.

La nominativa formo en la menciita slogano eblas nur, se oni uzas la prepozicion "TRA" "amikeco tra limoj", aŭ, pli bone: "amikecon tra limoj!" — Romano Grinŝpan, Taŝkento, Sovetio. (1) Tio ne estas hazarda eraro, sed rimartifiko; Z. intence ellasis la akuzativon por ebligi puran rimon:

"Pensoj iras trans limo sen pago kaj timo." — Proverbo.—Red.

### SINCERA KELNERO

La gasto demandis kelneron:

"Al kio mi donu preferon?"

Cu ovoĵ aŭ eble omleton "

Respondis kelnero

Kun kora sincero:

"Vi mendu omleton.

Mi diras sekreton —

Malfreŝas la ovoĵ,

Kelktage malnovaj

—Kaj en nia omleto

Estas eĉ ne oveto."

### SABOTA BANKROTO

Karulo mia:—

Patron trafis la bankroto,

Do pereis mia doto;

Jam foriĝis mia riĉo!

Tion faris li intence.

Sciis mi jam dekomence,

Ke ĉiam li malbenis nian kor-feliĉon

Kaj arde ĉiam planis nian apartiĝon.

### LA FANFARONULO

Fuŝverkisto laŭte fanfaronas:

"Mia gloro limon ja ne konas.

Kiam jam forfluos Sekspira gloro-ondo,

Flamos fam' de miaj verkoj tra la tuta mondo".

(Hm, hm, sed ne pli frue!)

—Revizio de versaĵoj de Romano

Grinŝpan, Taŝkento.

### GEORGE COLLINGRIDGE

En sia libro "North Shore, Sydney" Les. G. Thorne menciis E-on. El ĝi Gerald Browne tradukis: "George Collingridge, pentristo kaj aŭtoro, grande kontribuis al la kultura vivo de North Shore . . . Li loĝis en Hornsby kaj havis artlaborejon ĉe la angulo de Carlotta Avenue kaj Mount William Street, Gordon. Li fondis la unuan filion de la Esperanta Klubo en Aŭstralio (? — Red.). Li naskiĝis ĉe Manor House, Godlington, Oxfordshire, en 1847."

"Sydney Sunday Sun" 18 majo, 1919, sub titolo: "71 Years Young Mr. George Collingridge" asertis, ke "lia monumenta volumo 'The Discovery of Australia', eldonita en 1885, bezonis 14 jarojn per kompilado, kaj la laboro necesigis scion de almenaŭ 7 lingvoj".

Sur Golfto Berowra estas Collingridge Point, kiu daŭrigas la nomon de la pentristo kaj aŭtoro, kiu mortis en 1931.

Vidu: The A.E. jan. kaj sept. 1968.

### La Malestiminda Armeeto?

Kelkaj verkistoj jam refutis la malĝuston de la esprimo: "the contemptible little army", tamen ankoraŭ tiu miscitajo estas vaste aŭdata kaj legata. La originalo tekstis: "die veraechtlich Kleine Arme" (la malestiminde malgranda armeo; the contemptibly small army): ne "die veraechtliche . . ." (la malestiminda . . .; the contemptible . . .). La sencan diferencon determinas aŭ adverbo aŭ adjektivo.

La fama esprimo, atribuita al la Germana Imperiestro, ne rilatas al tiuj bone trejnitaĵ Britaj soldatoj, kiuj kiel unuaj eniris Francujon en 1914, sed rikane

mokas la Britan aŭtoritaton, kiu surterigis ilin en tiel tre mizera nombro.

## RECENZOJ

**"Esploroj. Poemoj":** Baldur Ragnarsson. Eldonis Stafeto. 123 paĝoj. \$1.50 U.S.

Ĉi tiu libro estas aprezebla nur por tia elito, kia kapablas dividi kun la aŭtoro lian riĉan revomondon kaj poezian exploremon; alivorte, tiaj homoj, kies komprenpovo povas digesti senhalte formojn kiel ekz., malteatre, apudhoras, dumloĝas, mezioma, prigamas, diskonscie, blankdaŭras, erpasintoj adverbas . . .

Granda parto de la versaĵoj ne estas rimitaj, nek evidente ritmaj. Ilian enhavon li povus pli klare kaj trafte esprimi per taŭge sonora prozo. Ĉe fino de sia antaŭparolo rimita al la Dua Eldono de la Libro de Lidoj, Heine skribis: "Ĉion ĉi mi povus esti tre bone espriminta en bona prozo". Ni povus atendi ion ankaŭ de nia nuna aŭtoro.

"senornamenta" (senornama). Kion signifas: "grafika memtrompo"? Ĉu semantike misa?

Ragnarsson, Islandano, kiu havas honoran niĉon en la E-a literaturo, verkas sur tre alta lingvonivelo ne facile atingebla por homoj de meza inteligento kaj vivkoncerna intelekto.

Pro la relative ofta apero de poemoj tiuspecaj, oni devas akcepti la eldonistajn decidojn, fidante, ke ankaŭ tiaj libroj ia-efike kontribuas konstrue al la evoluo de la lingvo.

**"Vojo kaj Vorto":** Poemoj originalaj kaj tradukitaj, kun eseo Pri Moderna Poezio kaj Esperanto: Roberto Passos Nogueira. 111 paĝoj. \$2.50 U.S. Eldonis Stafeto.

Simile al Ragnarsson, Nogueira estas esploranto, provanto de la "nova poezio" Esperanta, kaj iom de la supre dirita aplikiga ankaŭ al li. Per la finaj paĝoj li klarigas siajn konceptojn pri la diversaj formoj de la moderna poezio en rilato al la Internacia Lingvo. Per sia funda enpenetro en la teknikon de la versarto kaj sia vastevida takso pri literaturaj perspektivoj, tiu eseo estas signifa kontribuo kaj meritas studon de ĉiu kapabla por tio.

La tradukaĵoj estas el dek literaturoj, inter ili poemoj de Dylan Thomas, T. S. Eliot, Ezra Pound, E. Cummings. Sed kelkaj paĝoj surhavas malpli ol dudek vortoj. Tekste okupas paĝon 32: Black X White: (poemo antirasisma).

Via edena ebano

Sur ebura ebano.

Leginte tion, oni sentas cerban paralizon. Sola sur p. 36:

vi  
eterne vi—  
vi

Ne nomu tion poemo.

Sur p. 66, 67 kaj kelkaj aliaj enigmas galimatio, kaj ĉu meritas plenpaĝon banala du-linia traduko el V. Maja-kovskŝi

Manĝu ananason, perdrikon maĉu, baldaŭ venos via taĝo, burĝaĉo

Alivorte, multo en la libro ne adekvate spegulas la senduban talenton de la juna Brazilano, kies lingva aŭdaco minacas forbari lin de la simpla E-istaro.

La laŭda antaŭparolo de Wm. Auld en si mem estas "recenzo". Li verkis ĝin kun kapablo pritaksi la kompilon kun simpatio kaj komprenemo. Nur inter si la intelektuloj rajaj animoj povas komuniki unu kun la alia.

**"Jarlibro de U.E.A."** dua parto 1973. 353 paĝoj. Nur por membroj.

Antaŭparole ĝi informas pri kresko de individuaj membroj (preskaŭ 200: preskaŭ 3%); librovendo denove altiĝis je ĉ. 17% — parte pro presigo en la jarlibroj de plenaj listoj de ĉiaspecaj verkoj kaj E-aj diversaj, amplekse ĉ. 280 paĝojn! La akiro de maŝinaj kaj fakscioj de post 1970 ebligis, ke enspezo pro grafika kaj simila laboro atingis la ĝis nun plej altan nivelon. Tamen pro inflacio, sekve kostokresko, ankaŭ kotizoj plialtiĝis ek de 1974.

Peranto por U.E.A.: Ken Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield 3162.

(P. 76: lasta linio: legu: 67c.)

**Esperantonimoj:** Marinko Givoje, Poŝtako 5025, 41040 Zagrebaka Dubrava, Jugoslavio. Eld. "Literatura Foiro", via Panteono 17, 20122 Milano, Italy. 111 paĝoj. Prezo ne indikita.

Plurfoje en "The A.E." ni esprimis deziron, ke aperu ĝuste ĉi tia libro, en kiu oni trovus listojn de parencaj vortoj: antonimoj, homonimoj, paronimoj, sinonimoj, vortludoj. Jen fine oni havas. Ĝi konsistas el instrue klariga antaŭparolo kaj ekzemploj de la kategorioj. Ekzemple:

**Antonimoj** (vortoj rekte kontraŭsignifaj de aliaj):—akra, milda; komenci, fini; vera, falsa.

**Homonimoj** (vortoj samformaj kiel aliaj, sed malsamsignifaj): akto (parto de dramo; oficiala papero; dokumento). Ni aldonas alian signifon: akto de amo (Marta 2/12), akto patrina (Fundamenta Krestomatio 9-a eld. 198/22), akto de singlardeco (Originala Verkado 531/-12, Leteroj de Zamenhof vol. 1,

94/-5) kiel ĝi servas sinonime kun simpla "ago", liro (monero, muzikilo); talio (korpa parto; vestoparto; ŝipoparto; rara metalo).

**Paronimoj** (vortoj preskaŭ samsonaj kiel aliaj, sed signife malsamaj): festo, festeno, festono; aĝordi, akordi; akcelo, akselo; akneo, akno; aldo, alto, alteo; ĉarto, karto; dezerto, deserto (mankas "dizerto" = fuĝo el militista servo); vana, vanta; fuĝo, fuĝo. Entute 42 paĝoj. Vidu: "Esperantologio", junio, 1950: "Gemelaj Radikoj", p. 98-106.

**Sinonimoj** (vortoj samformaj havantaj ĝuste la samajn signifojn kaj uzatecon): gazono, razeno; aktuala, nuntempa; baloti, voĉdoni; bankedo, festeno; boato, ŝipeto (mankas "plaĝo" "strando"; "tempesto", "stormo". Vidu: "British E-ist", 11/50.

Skribemulo povas aldoni al la listoj per propra prinotado, kaj komparado kun la "kvazaŭ-sinonimoj" kompilitaj en "Kien la Poezio" (Brendon Clark).

**"Morso-Klubo"**: Robert Fisker. Trad. Gudrun Riisberg. Eld. Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhoj, Denmark.

En nia septembra nro aperas recenzo pri: "Savo el la Neĝo", legaĵo por "iom grandaj geknaboj". "Morso-Klubo" estas samseria, por "mezgrandaj". Kio estas knab(in)o iom granda, aŭ mezgranda? Temas ja pri inteligento, ne pri korpmezuro. Prezo de la unua libreto estas 9 Dan. kr. (77 paĝoj); la dua kostas 7.50 D.k. (32 paĝoj). Laŭ la Jarlibro 1968, 0.55 D.k. = \$0.07 Aŭstralia. Kio okazis al nia stelo-sistemo?

La libreto enhavas du simplajn rakontetojn: "Morso-Klubo", en kiu knabo kaptigas ŝtelistojn per sia memmane farita mors-aparato. Trezor-Serĉo amuze priskribas surprizon de du knaboj nokte eltergintaj "trezoron" de maljunulo.

Bona lingvaĵo. En la Antaŭparolon strange enlitis la Dana vorto "og" (kaj).

## PRI LA PRONOMO "CI"

"Ci" troviĝas en la Universala Vortaro (Fundamento), sed ne en la Fundamenta Plena Gramatiko (la 16 Reguloj). Ĉe "Ekzercaro" 16/2 staras simple: "Ci skribas (anstataŭ 'ci' oni ordinare uzas 'vi')".

En "Lingvo Stilo Formo" Kalocsay kondamnas 'ci' kiel nekutiman, fremdan elementon en la lingvo kaj asertas, ke Zam. mortigis ĝin tuj post ĝia nasko. Li ne uzis ĝin en la Biblia traduko,

senescepte uzante "vi" en ĉiuj okazoj ĉu familiaraj, ĉu solenaj.

"Ci" signifas "thou", "tu, toi", "du". La ci-diro varias laŭ la diversaj landoj, jen familiarece, jen grandrespekte. Tio estas konfuza por E-istoj ne plene sciantaj la ĝustajn uzajn ĉe la koncernaj lingvoj.

Nepre studu la Lingvan Respondon de Zam. ("ci" en indekso). Li tie rimarkas pri embaraso ĉe ci-uzado kaj entute parolas sen entuziasmo pri tiu sia "vort-ideto".

Krome, la prononco estas nefacila: ĉe iuj parolantoj "ci" tre similas al "si". Necesas konscia emfazo por klare elvoĉi la sonon "tsi".

Tamen, malgraŭ malŝata kritiko, la formo estas necesa por E-o. Sen ĝi ne eblus traduki la suprajn nacilingvajojn en tekstoj, kie ili havas gravan signifon. Ne nur en la poezio, sed ankaŭ en la prozo, ili ofte havas lokon. Ekzemple: "Neniu diras al vi 'ci'" (Revizoro 22/6 (el la Rusa). "...nun.. li parolas al vi 'ci'" (Fabeloj de Andersen III, 130) el la Germana).

Kiel traduki la Francan "tutoyer, kaj la Germanan "duzen"? Jen, Esperante: cidiri; Angle: to thou one. Waringhien en sia E-Fr. Vortaro: "... uzata nur en tradukado, por redoni literaturan efekton".

Kiam Sir Walter Raleigh staris juĝata, la juĝisto alvokis lin per la malestima vorto "thou": "For I thou thee, thou traitor!" (Car mi cias cin, ci perfidulo!). Kaj ekzemplo el la Nederlanda: La efiko de sceno en teatraĵo dependis de la fakto, ke juĝisto uzis la familieran "je" (ci), alparolante atestanton, kiu koleris pro tio kaj sekve respondis nur grunte. "Ĉu vi ne povas esti pli ĝentila?" kriis la juĝisto. "Jes, se mi ne plu estas gejjid"! (ciata; Angle, "my-manned"), respondis la atestanto.

Cetere, tiu uzado estas kutima en Nederlando, kiam oni parolas al kelneroj, servistoj aŭ (en malnovmodaj oficejoj!) subrangaj komizoj. Sed se vi tiel uzus en Francujo, vi certe riskus malagrablaĵon!

Ne estas facile trovi en la E-a literaturo la vorton "ci" uzita en senco solena, respekta. Zam. mem diris: ĉiuj kulturaj popoloj alkitimigis al la ideo, ke ci enhavas en si ion senrespektan (Lingvaj Respondoj). La konsilo de Waringhien estas bona: "Ci" restu en la vortprovizo nur kiel utila, efektive necesa, tradukrimedo. Findire, la difino de Butler en lia vortaro estas erariga, ĉar ne sufiĉe detala.

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



President: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka St., Northbridge, N.S.W. 2095

Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084  
Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.  
A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield, N.S.W. 2070  
A.E.A. Sekretario: R. Baxter, Box 415 P.O. Manly, N.S.W. 2095.  
A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 129 (209)

MELBURNO

Junio, 1974

## MORTIS FRANZ JONAS

Ŝtatestro kaj Esperantisto.

La Prezidento de Aŭstrujo Franz Jonas mortis la 24-an de aprilo en Vieno en aĝo de 74 jaroj, sekve de longa malsano.

Dum kelkaj jaroj li estis la sekretario de la "Aŭstria Laborista Ligo Esperantista" kaj redaktoro de ties organo "La Socialisto". Li kunlaboris en la Kongreskomitatoj por la UEA-Kongreso 1924 kaj por la SAT-Kongreso 1925 en Vieno.

Post la 2-a mondmilito preskaŭ hazarde komenciĝis lia publika agado. Li fariĝis urba konsilanto por nutrado, poste rekonstruo. En 1951 li elektiĝis urbestro de Vieno kaj en 1965 Federacia Prezidanto de Aŭstrujo.

Kiel ŝtatprezidanto li plurfoje substrekadis sian esperantistecon, akceptis E-delegaciojn, parolis E-e kun E-istoj, kiel ekz. kun Ralph Harry dum oficiala akcepto en Bonn.

En 1970, okaze de la U.K. en Vieno, li oficiale malfermis la kongreson per vortoj famaj, kiujn pripensu tiuj kiuj ĉiam deziras "bombardi" oficialajn instancojn:

"la E-istoj nuntempaj devas pensi kiel realistoj, ili devas pli varbi kaj per novaj rimedoj. Sed, ĉar mi en tiu rilato mem faris multe da spertoj, mi avertas vin: NE atendu tro multe kaj NE postulu tro multe de la oficialaj funkciuloj, sed fidu pli la propran forton! Se la E-movado estos forta la oficialaj institucioj de si mem agnoskos ĝian gravecon kaj signifon." — Herbert Koppel.

(Laŭ nia scio, li estas unika en tio, ke li estas la unusola ŝtatestro kaj samtempe — Esperantisto. — Red.)

### WARINGHIEN PAROLAS . . .

"Mi opinias, ke la ekzisto de la akuzativo, de la poseda refleksivo, de la akordeblaj adjektivoj estas ja ŝarĝo por la lingvo (Esperanto), sed ne balasto; finfine lingvo estas nur rimedo de interkompreniĝado, kaj kiam oni vidas la malfacilojn, kiujn la homoj suferas por interkompreniĝi eĉ per sia gepatra lingvo, oni ne povas troigi la valoron de la klareco en lingvo, kiu celas interkompreniĝi ĉiujn homojn en la mondo.

. . . En la du pli malnovaj formoj

de Esperanto, akuzativo tute ne ekzistis. La aserto de niaj kritikintoj, ke Zamenhof lasis sin influi de siaj lingvokutimoj, estas do erara, kaj, ĉar li enkondukis akuzativon nur post praktikaj eksperimentoj, li certe havis racian motivon por tio. Kaj la sola, kiun oni povas supozi, estas, ke laŭ lia sperto, la postuloj de klareco devis sur tiu ĉi punkto superi tiujn de la simpleco.

"Literatura Mondo", majo-junio 1948, p. 77. (La plej detala pritrakto pri la akuzativo: "Lingvo kaj Vivo", p. 130-164.)

## AUSTRALIA KRONIKO

**PERTH:** D-ro C. Caldera, 24/4, rakontis al ni pri la entuziasmo de li kaj edzino, ĝuante ferion en Japanujo dum Marto. Esperanta movado ekzistis ĉe la Universitato kaj la Turistejo en Tokio. Vespermanĝo laŭ la tiea modo per manĝbastonetoj estis gaja plezuro por ili kun 15 anoj de la komitato. Ekskursoj estis faritaj okcidenten al Kyoto kaj Osaka, suden al Jokohama kaj 120 km norden al la religiaj sanktejoj de la Sinto kaj Budismo.

Je 8/5 Ruth McGrath raportis pri la malfermo en Perto de Ekspozicio pri Kagoŝima, nia ĝemelurbo. S-ro Thew parolis sperte pri sia hobbio, la fotografado. Ni ricevis bonajn raportojn pri la nunaj klasoj. S-ino Payne havas 25 studentojn kaj aliaj ĝeinstruistoj (Edith Palmer, Olive Hunt, D. Threlfall, Rene Smeets kaj S-ino Einihovici) havas entute 32 studentojn. Oni legis leteron pri la Pacifika Kongreso kaj fine kantis "La Lingvo por Mi" — Ouen Loneragan.

**MELBOURNE:** Ankoraŭfoje S-ro Ken Linton, 29/4, revokis memorojn pri pasintaj aŭstraliaj E-kongresoj kaj aliaj okazajoj, montrante diapozitivojn pri ili intermiksitaĵoj kun aliaj pri la pitoreska ĉirkaŭaĵo. Je 13/5 Vic-Prezidanto Arnold Baldwin parolis pri "La lernado de la angla lingvo". Post iom ŝerca traktado pri la lingvaĵo de la oficiala programlibro pri tiutemaj klasoj, S-ro Baldwin klarigis ke la lernado pri la angla lingvo inkludas ĉiun alian temon, ĉar nur per la ĝepatra lingvo oni lernas ion. Li informis ankaŭ ke la nuntempa koncepto emfazas la parolatan formon de lingvo kiel la korektan.

S-ino F. Koppel, 20/5, kun helpo de diapozitivoj kaj projekciisto S-ro Marshall Cohen, donis informon pri la Kvinlanda urbo Toowoomba kaj priskribis travivaĵojn kaj renkontiĝojn kun Ges-roj Petley, S-ino Lehane kaj Fino O'Mara dum vizito al tiu urbo post la Brisbana kongreso.

**OAKLEIGH, Vik.** Membroj kunvenis, 8/5, en la hejmo de S-ino M. Gillam por malstreĉa vespero, riqardante diapozitivojn de S-ro N. Butkunas. Pluraj membroj jam ricevis bildkartojn de Ges-roj R. Reed, kiuj nun estas transmare. —Margaret Sanders.

**MORWELL, Vik.** Nia organo "La-trobe Valley Esperantist" nun atinqis eldonkvanton de 200 ekzempleroj. Nia monata kunveno okazis 2/4 ĉe la farm-

bieno de Ges-roj H. Schepers. Esperantistoj el Morwell renkontis la Won Wron grupon kaj ĝuis agrablan vesperon. S-ino M. Wybenga prezentis sian filmon pri la Brisbana kongreso.

**SYDNEY: 22/4:** Joan Green kaj Gladys Taylor lerte prezentis distraĵojn — dialogo pri flugantaj diskoj kaj post ankaŭ amuza teatraĵo en kiu instruis tino preskaŭ kaŭzis batalon en klaso, kiam ŝi instruis: "Mi kisas ŝin". Sekvis kvin kantoj, kiujn J. kaj G. sonbendiqis. Inter ili estis: "Se vi estus sola fraulin' en la mond'" kaj "Paĉjo ne al mi donus hundon, hundon". Tiam ni ludis: "Kie mi estas?" La membroj vice demandis de unu kaj devis diveni la lokon per respondoj. Tiu, kiu sukcesis, havis vicon. Iuj nekredeblaj lokoj estis: supropinto de la Operdomo. Pontpilon, Simia Domo, kaj Karavano.

29/4: Ni bonveniqis S-ron C. Saaren, E-isto kiu loĝis en Perto, sed nun estas en Sidnejo. La membroj partoprenis en Moka Proceso Leĝa. La (supozita) "krimo" estis, ke la akuzato dum la vojaĝo al Brisbane, batalis kontraŭ la prezidanto de nia Klubo kaj blasfemis lin "en la Angla lingvo"! Estis juĝisto, supera leĝisto (A serjeant), du advokatoj kaj du atestantoj, unu por la prokuristo kaj la alia por la akuzito — kaj la akuzito mem. Ĉiu el ili lerte, sprite faris sian rolon. En la "Juĝejo" ni ĝuis la ridigan mokadon, precipe kiam la "juĝisto", tute maljuste, kondamnis la akuziton esti sendita al Huhi (supozata pluv-dio).

5/5: Konversacia kunveno okazis en Esperanto Domo, kiel kutime, la unuan dimanĉon de la monato. Posttagmeze 5 membroj ĝuis paroladon, kantadon kaj teon. 6/5: Membroj estis petitaj pre-pari 5-minutan paroladon pri: "Miaj ambicioj kiam mi estis Deksesjarulo". Post kursoj, 14 anoj informis pri siaj plej 'intimaj pensoj' kaj "aventuroj", kiam ili estis junuloj. Tiu sukcesita vespero krome donis oportunon al ĉiuj paroli E-on. Iuj parolis improvize, aliaj legis siajn rakontojn.

13/5: Ĉar nia gastparolonto ne povis alesti, ni petis membrojn rakonti pri "La Plej Amuza Momento en Mia Vivo".

**MANLY: 16/2:** Ĉe Edna Giles okazis ĝuplena vespero: Betty Cleminson kaj Eunice Graham montris lumbildojn kaj parolis pri siaj spertoj kaj impresoj ĉe la Monda Kongreso en Belgrado. Sekvis bongusta vespermanĝo. Dum la unua trimestro ne okazis speciala programo: Arturo Cocking preferis uzi la tutan

tempon por instrui siajn fervorajn studentojn. Tamen ĉiuj kuniĝis dufoje post lecionoj, kiam Russ Baxter kaj May invitis la membraron al sia hejmo por trinki kaj manĝi. Sharon kaj Simon Wickenden daŭrigis la konversaciajn en ĉiu dua vandredo. Ili estas utilaj kunvenoj, ĉar Sharon diris, ke ŝi nun rigardas sin kiel E-iston ekde kiam ŝi gastigis dum tuta tago la Bulgaran vizitanton, kiu tute ne parolas la Anglan.

23/4: La lasta vespero de trimestro. Denove Russ kaj May siahejme gastigis membrojn por kaftrinko kun interparolo.

26/4: Proks. 50 ĉeestis en la Halo de Ska. Mateo en Manly, kiam Robbie Robertson montris lumbildojn kaj parolis pri siaj aventuroj survoje al la Belgrada Kongreso.

**BRISBANE:** Trevor Steele, Peter Nicol kaj Tom O'Grady diskutis proponon kun la prez-o Ray Ross kaj prezentis ĝin al nia monata kunveno en aprilo. Je fino de longa diskuto Trevor Steele proponis, ke la Brizbana E-Societo agnosku la rajton de aro de instruistoj stariĝe sendependan organizon por instruado ĉe la Baroona-lernejo.

Inaŭgura kunveno de la Esperanta Edukada Instituto. La komitato:

Prezidanto: S-ro M. Robinson.  
Vic-prezidanto: S-ro T. O'Grady.  
Sekretario: S-ino V. Robinson.  
Kasisto: F-ino D. Clarke.  
Ĉefinstruisto: S-ro T. Steele.  
Publikaj Rilatoj: S-ro P. Nicol.  
Libro-peranto: F-ino D. Clarke.

Baldaŭ la Brisbane E-Societo kunvenos ĉe speciala kunveno por eltrovi: kia helpo estos necesa. Ni ankaŭ devas diskuti: ĉu iu ŝanĝo estos necesa en la statuto de la Brisbane E-Societo. Kelkaj membroj intencas proponi la starigon de aparta Drama Klubo kaj aparta Koncerta Grupo. Tamen, ili laboros sub la "ombrello" de la Brisbane E-Societo eĉ se ĉiu grupo havos sian propran sub-komitaton. — W. Greenhalgh, V. Robinson.

**KANBERO:** 26/5: En la proksima kunveno ĉe nia belega Prez-ino Mitzi, mi parolos (helpota per fotoj, kliŝaĵoj ktp.) pri la Jugoslavia UEA-Kongreso, la AEA-Kongreso en la glora Universitato de Kvinlando, kaj la freŝdata semajnfina EFNSK-Konferenco ĉe la motelo "Historic Village Coolangatta" (apud Berry). Mi aludos ankaŭ pri la guajj kunvenoj de Beogrado kaj en Brizbano kun Ralph Harry, kiu certe devas reveni iam al Kanbero. Post 20 viglaj

jaroj Harry kaj Joyce Torr eksiĝis al eleganta domo sur la Ora Marbordo, al kiu plaĉis al mi esti invitita — bela loko malgraŭ la superakvoj! Ili sendis al mi gazet-elĉerpon informantan, ke nova E-klubo formiĝas sur la Ora Marbordo. Mi esperas bonvenigi Ges-rojn Danny Kane, kiuj revenis al KEK post jaro en Tajvan — kaj vizitoj al Singapuro, Tajlando, Hongkongo kaj Japanujo. Mi bedaŭras sciigi, ke nia kasistino, Edna Heath, devis reiri al Toowoomba (gratulon, Heber!); ni do devas trovi novan kasiston. — N.G.

### Novajoj pri la Federacioj

**KVINSLANDO:** Treege ĝuidan semajnfino pasigis la anoj de la E-Federacio de Kvinlando, kiam ili kunvenis en Toowoomba 4 - 6-a de Majo.

La Toowoomba E-Societo organizis la ŝtatan konferencon en la "Darling Downs Institute of Advanced Education". 24 vizitantoj el Brisbane, Redcliffe kaj la Sunbrila Marbordo kune loĝis kaj kongresis en la kolegio. La ĉambroj estis komfortaj kaj la salono por distraĵoj estis sufiĉe granda por niaj kunvenoj kaj la koncerta vespero. Kvankam nur 3 mejlojn for de la urbcentro de Toowoomba, la Instituto situas en pitoreska kaj pacoplena pejzaĝo.

La programo inkludis labor-kunvenon, distran vesperon, ekskurson al la Art-Galerio de Toowoomba koncerton kaj Festmanĝon. Ĉe la festmanĝo dimanĉe ĉeestis 40 personoj, inkluzive amikoj de membroj. Sendube ĝi estis la plej sukcesa ŝtata kunveno de nia Federacio.

(El raportoj de Jean Carney, Toowoomba kaj W. Greenhalgh, Brisbane)

**VIKTORIA:** La Federacio organizis 4/5. Aŭtobus-Ekskurson kies celo estis "mistero". En bela sunoplena tago anoj de la Melburna E-Societo kaj la grupo de Malvern enaŭtobusigis en la urbcentro kaj veturis al Chadstone, kie anoj de la Oakleigh-grupo aliĝis por pluen veturi tra Pakenham kaj Berwick al bela piknikejo ĉe la rivero Taroga kaj renkontiĝo kun gesamideanoj el Morwell. Agrablajn horojn ĉiuj pasigis kune manĝante, marŝante, babilante kaj kantante. F-ino Margaret Sanders gajnis konkurson por diveni la celon de la renkontiĝo. Dudek ses partoprenis.

**N.S.K.:** La 23-a Konferenco okazis ĉe la "Historia Vilaĝo"-Motelo en Coolangatta apud Berry. Neniu grava decido estis farita, sed la atmosfero estis harmonia kaj la plimulto de la paroladoj

estis en Esperanto. La ĉefmanĝo estis tre bongusta kaj abunda. Sekvis filmoj kaj kantoj de Fritz Mueller-Sorau.

Dimanĉe, grupo de entuziasmuloj iris per aŭto al Shoalhaven por observi la migrajn birdojn, kiuj kongregacias prepare al longa amasflugado al Japanio kaj Siberio. Survoje hejmen, la plejmulto piknikis en la Valo Kangurua. La 24-a konferenco okazos en oktobro kaj Wre Chandler elektigis kiel organizonto.

### ABC-PROGRAMO "ACCESS"

Pri tiu programo multaj E-istoj skribis al la estraranoj. Antaŭ tri monatoj ni en Sidnejo kunvenis ĉe la prezidanto por pridiskuti tion kaj tuj sendis respondilon al S-ro Robert Moore, la respondeculo ĉe la ABC. Prof-o Robertson ricevis de li respondon datitan 29 marto: "Dear Professor Robertson: Thank you for submitting an Access application form. Within the near future we will be contacting groups likely to be offered a segment in the programmes to arrange a mutually convenient time for a preliminary interview. — Yours sincerely, Robert Moore, executive producer, Access".

(Jen esenca traduko: . . . Dankon pro la Access-petilo. Ni baldaŭ kontaktos grupojn al kiuj ni kredeble povos proponi partoprenadon en nia programo kaj ni aranĝos intervjuon kiel eble plej oportune . . . )

Ĝis nun S-ro Moore ankoraŭ ne kontaktis nin denove, sed Prof-o Robertson povis kunparoli lin ĉe la ABC, pri aliaj aferoj rilate al edukado. Nia prez-o demandis, ĉu ni E-istoj estos elektitaj? S-ro Moore respondis, ke kelkcent grupoj sendis al la ABC respondilojn pri div. temoj por la programo Access. Speciala komitato taksas la proponojn, kaj espereble ni sukcesos. S-ro Moore mem ne respondecas pri la elekto; oni supozas, ke la komitato konsultos lin kiel reĝisoron. Do, ni esperante atendas rezulton.

### PRI P.P.K.K.

S-ro H. Koppel informas, ke bone progresas aranĝoj por la Pacifika Kongreso de Esperanto en Melburno, januaron 1976 Ni intencas aranĝi post-Kongreson en Sidnejo, ĉar eksterlandanoj certe emas viziti aliajn belajn regionojn krom Viktorio, kaj povos fari tion sen plua elspezo por aviadilo. Ni kunvenigas Pacifikan Post-Kongresan Komitaton por pridiskuti kaj aranĝi ekskursojn, distraĵojn k.t.p. — R. G. Robertson, 9 majo.

### S-RO HARRY VIZITIS ĈINION

La Aŭstralia Ambasadoro en Bonno. S-ro R. L. Harry, C.B.E., kiu vizitis Pekinon en Aprilo por interŝanĝo de vidpunktoj inter la aŭstralia kaj ĉina registaroj pri la internacia juro rilatanta al la maro, kunportis du dokumentojn en Esperanto pri la mara juro. Unu estis raporto al la deka tutlanda kongreso de la kamunista partio de Ĉinio, en kiu Gou Enlaj parolis pri "la bataloj de diverslandaj popoloj de Latinameriko por persisti en 200-mar-mejla teritoria maro kaj ekonomia regiono" kaj la bataloj por "defendi ŝtatan suverenecon kaj naciajn riĉfontojn". La alia estis parolado de Kiau Guanhua, estro de la delegacio de la Ĉina Popola Respubliko, ĉe la Plena Kunveno de la 28-a Sesio de la Generala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, pri "La Problemo de Opono kontraŭ Mara Hegemonio".

Dum la vizito de Ambasadoro Harry oni menciis plurfoje ĉe kunvenoj kaj tagmanĝoj, ke li estas Esperantisto, kaj unu tagon li donis neformalan lecionon al aŭstralia kolego kaj ĉinaj interpretistoj apud la Longa Murego. Li trovis en la Pekina Hotelo, kie li loĝis, ekzemplerojn de "El Popola Ĉinio". Bedaŭrinde li ne sukcesis kontakti la Ĉinan Esperantan Ligon, sed li informis la ĉinajn instancojn, ke per la tradukoj de la tre kompetenta grupo en Fremdlingva Eldonejo, kaj per la elsendoj de Ĉina Radio miloj da homoj en multaj landoj, kiel li mem, lernis pri la vidpunkto de Ĉinio. En la aŭstralia kaj aliaj Ambasadaj oni surpriziĝis pro la fakto, ke oni povas esti ĝisdata pri la situacio en Ĉinio dank' al Esperanto.

### LA SKOLTOJ

Mi dankas al ĉiuj, kiuj jam skribis al mi kaj kunlaboras. Skolta Esperantista Ligo nun laboradas forte en preparo por granda informlaboro ĉe la Ĵamboreo en Norvegujo. Ni esperas baldaŭ presi en Aŭstralio pli da broŝuroj. Dume, pluraj restas; se VI povos kontakti skolt(in)estojn, bonvolu peti ekzemplerojn (diru kiom).

La skolta E-lernolibroj kaj diskoj estas ankoraŭ haveblaj ĉe la Libroservo aŭ mi; \$2 por du libroj kaj disko kune, poŝtitaj.

John Moore, 34 Hadgraft St. North Rockhampton, Qld. 4701.

### A.E.A. EKZAMENOJ

Nova regulo: Rajtas parole ekzameni Elementajn kandidatojn nur tiuj Superaj kandidatintoj kiuj gajnis la diplomon **kun laŭdo** (honoro) kaj ankoraŭ posedas sian lingvan kompetentecon.

**A.E.A. OFICIALA INFORMILO  
NOVAĴ ANOJ:**

Le Fevre, Mr. Mac., Launceston, T.  
Carswell, Mr. B., Kings Meadow, T.  
Deller, Mr. I. R., Brisbane, Q.  
Warburton, Miss E., Launceston, T.  
MacFarlane, Mrs. K., Launceston, T.  
Pennington, Mrs. B. M., Young Town, T.

Silva, Mrs. B., Carnegie, V.

**T.G.M.F.:**

Leung, Mr. H. C., Carlton, V. \$3.00.

**Gen. Fonduso:**

Leung, Mr. H. C., Carlton, V. \$2.00

—Russ Baxter, Sek., 6 majo.

**ALBERT VICTOR RUTLAND**

Mortis 16an de majo, 1974, elstara membro de la Esperanto Movado en Australio. "Rutty" naskiĝis apud Colac (Viktorio) 15an de aprilo, 1901. Frue en sia vivo, li aliĝis al W.E.A. (Popola Eduka Asocio). Pere de tiu asocio li kontaktiĝis kun Esperantistoj kaj antaŭ pli ol 50 jaroj aliĝis al la Melburna Esperanto-Klubo. En 1923 au 1924 li transloĝiĝis al Sidnejo. Li tuj aliĝis al la W.E.A. kaj la Esperanto-Societo tie. En ambaŭ urboj li fervore laboris en ambaŭ organizoj. Ankaŭ de la Raciista Asocio li estis membro.

Homo tre studema, li akiris vastan scion. Li ĉestis kelkajn Universalajn Kongresojn de Esperanto kaj konatiĝis kun multaj famaj Esperantistoj. Dum la lastaj jaroj ni vidis lin nur malofte, sed li ĉiam retenis sian intereson en Esperanto. Li fidele ĉestis la Zamenhof-Vesperon ĉe Esperanto-Domo, la kunvenojn de la Esperanto-Kooperativo kaj poste tiujn de la Esperanto-Asocio de Nova Sud-Kimrujo.

En sia testamento li petis, ke iu faru Esperantan oracion ĉe lia kremacio. Tiun peton plenumis Wre Chandler.

La Esperanto-Movado, kaj la mondo, estas despli malriĉaj pro la foresto de "Rutty". La Esperantistoj de Sidnejo, kune kun tiuj en la tuta Aŭstralio, sincere kondolencas lian vidvinon, Kay, en ŝia malfeliĉa perdo.

Diris Wre Chandler ĉe la kremacio: "Rutty ne kredis, ke la vivo daŭras post la morto, do ne estas taŭge, ke ni diru: 'Ĝis revido'. Tamen, dum ni vivos ni memoros lin kiel fervoran Esperantiston kaj bonan amikon".

**NAIVULO**

Sinjoro demandis sur strato fiakriston: "Kiom oni pagas ĝis la stacidomo?" "Tio ne kostas multan monon. Por vi mi volas kalkuli 10 kronojn". "Mi dankas. Mi volis nur scii, kiom mi ŝparus se mi piedirus".

**Dr. A. E. BARRINGTON**

Mr. I. Maddern has received three letters from those in Benalla who knew Arthur Ebenezer Barrington. Mrs. F. Hassell, a friend of Dr. Fred Williams, remembers him in about 1910, when she was five; Mr. T. Clarke, when a school-boy, knew him; he mentions his late brother, Mr. Hamilton Clarke and Mr. Ned Russell as being Esperantists.

Miss Ruby Ledger gives more detail. She, with Eva Warren, joined Barrington's Esperanto class (some 30 members) in 1908, and seems to be the only surviving member of it. She mentions: Messrs. H. Moodie, Lenbrink, McPherson, and Harold Pudney (Melbourne), who in 1922 advertised in "La Suda Kruco". She and Dr. Barrington attended the Second Australian E-Congress in 1912.

Dr. Barrington and his wife Ada were cousins; both of them cousins of Sir Ernest Shackleton, the Antarctic explorer. One son; died very young. Dr. Barrington, editor of the first Esperanto paper in Australia: "The Australian Esperantist" (May 1908-April 1909) died 19 August 1919, age 57. At least one set exists in Melbourne. Copies of these letters may be obtained from Mr. Maddern.

**MAJUSKLOJ**

Fine de 1974 eble okazos en Germanujo konferenco de registaroj por diskuti novan ortografion por la Germana lingvo. Unu el la ĉefaj diskutpunktoj verŝajne estos forigo de la majuskla unua litero de ĉiuj substantivoj.

Pri tio instruistoj de la Germana lingvo en eksterlando atentigas, ke la majuskligo de Germanaj substantivoj fakte faciligas la lernadon de la lingvo kaj aparte la legadon de tekstoj. ("Esperanto", marto, 1974.)

En "The A.E.", mar.-apr., 1965, oni legas: "Per forigo, ili certe malfaciligus al ne-Germanoj lernadon de ilia lingvo, ĉar en la marĉo da gramatika implikajo staras rokfirme la fakto, ke ĉiu majuskligita vorto estas substantivo, kaj tio estas afero plaĉa por sci-avidaj lernantoj".

Krome, "majuskloj faciligas serĉon en densa preteksto, kaj ankaŭ teknike malpliigas presliteran monotonecon". — "The A.E." 9/69. Vidu ankaŭ: 12/42; 12/50; 8/70; 12/71. "British E-ist", 3/53; "Esperanto", 2/50; "Malgranda Revuo", 1/49.



## LIBERA FORUMO

Respondo al G. Clarke (paĝo 87).

"kun la skribata formo" = tiu formo en kiu oni ĉiam skribas ĝin, konstante, daŭre, ripete. "litero S. estas prononcata de Germanoj kiel Z" = Germanoj ĉiam prononcas la literon S kiel Z'. Tiuj verboj estas verboj de daŭro, per kiuj oni akcentas la agadon: Li estas nomata Johano; en la Anglikanaj preĝejoj estas legata la Liturgio; la popolo estis juĝata de Moseo; mia nomo estas konata ĉe la kortego; tiu leĝo ne povas esti ignorata; ĝi estas permesata al Jupitero; ĝi ne estu manĝata (Eliro 29/34). Studu: Plena Gramatiko, para. 241, 2-a eldono. En ĉiuj tiuj ekzemploj temas pri ago ripetata, afero, stato, situacio daŭrada, permanenta, ĉiama.

Pri la dua demando, li komparu siajn ekzemplojn kun la subaj, ofte uzataj, formoj: ŝufabrikado = fabrikado de ŝuoj. botfaristo = faristo de botoj. bovpelisto = pelisto de bovoj. pekfaranto = faranto de pekoj. lumportanto = portanto de lumo. profundaĝa = profunde aĝa. sukriĉa = suke riĉa.

"Klubjaro" estas kurta, sed klara, formo de "jaro de klubana kunvenado". Tiaj kernecaj esprimoj estas uzindaj; ekz., interkona vespero = interkonatiga.

Nia literaturo svarmas je tiaj formoj: fiksstempo, vizaĝesprimo, signifplena, admoninkliniĝo, komunuzaj, kuracist-edzino, flugpendi, ŝvelforma, fremdlando, makulokululo, sanktoleito k.m.a. Estas bone, enmeti "kusenon" vokalon inter la elementojn kiam alie estus malfacile prononci kunmetaĵon: ekz. nigrhara, longtempa, noktmezo, siblona.

Esperanto estas la tipo de perfekta aglutina lingvo, kaj uzantoj, formante plurradikajn vortojn logike kaj belsone, prave agas laŭ la spirito de tiu lingvo.

Pri la fina rimarko de S-ro Clarke, mi supozas, ke li sendas la gazeton en letero, ne en banderolo—Red.

## LINGVOJ KOMPARATAJ (4)

### La Itala

La malfacilo similas al la Hispana. Por Latinaj kleruloj ĝi estas tre facila, ĉar ĝi konservis proksiman parencecon kun la patrinlingvo Latina. Oni povas verki tutajn frazojn per formoj komunaj al ambaŭ lingvoj. Verdire, oni povus diri, ke la Itala estas Latino simpligita kaj modernigita. Neniu alia Latindevena lingvo tiel bone konservis la Latinecon de sia granda origino. (1) Preskaŭ tute fonetika. (2) Ĉiuj vokaloj estas puraj, tamen oni devas prononci ilin kun pre-

ciza ekzakteco. (3) La akcento, kvankam pli facila ol la Franca, estas pli malfacila ol la Hispana. (4) Fleksio kaj sintakso estas pli facilaj ol la Franca kaj la Hispana. (5) Nur unu grafika akceptosigno. (6) La pronomaro estas iom tre komplika.

Dialekto estas forte evidenta, inter ĉe la intelektuloj; lokaj kaj regionalaj idiomoj estas varie vastaj. Ne ĉiu Italo povas kunfacile skribi en la Tuskana dialekto. Multaj komplike subtilaj frazstrukturaj malfaciligas mastrecon de la Itala. Prof-o W. Murdoch ("Herald", Melbourne, 11 sept. 1943, skribis, ke "La simplaj homoj de Napolo ne povas kunparoli kun tiuj de Venecio; ili parolas nesaman lingvon. Eĉ en Florenco la Tuskana dialekto povas konfuzi turistojn. En la urboj grandaj la plimulto de Italoj povas paroli Itale, sed en sia hejmo aŭ vilaĝo ili uzas sian propran dialekton, kiu kelkokaze estas tiel fore de la norma Itala lingvo, kiel la Kimra estas for de la Angla. Dante ja parolas pri dekkvar Italaj dialektoj"

### INFORMA SERVO

Kontraŭ afrankita koverto ni volonte provus respondi demandojn pri ĉiaj aferoj E-aj . . . prilingvaj, biografiaj, historiaj, organizaĵaj k.t.p.

La servo povus helpi al prelegantoj kiuj dezirus citfonte konfirmi pri iu aŭ alia aserto en sia parolotaĵo.—Red.

### Korespondado.

Deziras interŝanĝi ilus. p.k. kun Aŭstralianoj Antonio F. Figueredo, Rua Sao Joaquim 321, 01-508 Sao Paulo, Brazil.

Deziras kor. pri tekniko, aŭtomobiloj kaj filatelio Bernd Gebhardt, Kettenstr. 13, Erfurt 50, German Democratic Republic.

Bildkarta interŝanĝo: F-ino Miroslava Kostalkova, 471 27 Straz Pod, Ralskem 307/1, Okr. Ceska Lipa, Czechoslovakia.

Pri ĉiuj temoj dez. kor. 30-jara Viktor Daniel Burbano T., Apartado Aereo 702, Popayan, Cauca, Colombia, South America.

Kvardek lertaj lernantoj dez. kor. kaj interŝanĝi kun vi. Instruisto: Rodolfo Canet, calle Quintana 12-3º, Alicante, Spain.

### KOMPUTILO; KOMPUTERO

Ĉiu, kiu uzas elektran energion, havas elektro-komputilon en la hejmo. Ĝi estas kiloŭathora mezurilo. Komparu:

gas-, akvo-komputilo.

**Komputero** estas elektronika aŭtomato, regata per programo, kiu efektivas instrukciojn . . . (PIV). Ĝi estas multe pli grandioza aparato, kiu i.a. posedas "memoron", kaj kiun oni programas por plenumi ofte tre komplikajn operaciojn.

## RECENZOJ

**"La Lanternisto kaj Aliaj Prozaĵoj"**: elektis kaj tradukis Kazimierz Bein (Kabe). Eld. Dansk Esperanto-Forlag, Ingemannsvej 9, DK 8230 Aabyhøj, Denmark. 207 paĝoj. Prezo 25 Danaj kr.

Ĝi estas kolekto de 14 tradukoj de verkaj de Polaj aŭtoroj. Ili unuafoje aperis en la malnova "Lingvo Internacia" (1896-1914) "Internacia Krestomatio" (dato?) kaj en "Pola Antologio" (1906). Pli valorigus la kompilon indiko de dato kaj unua aperloko de ĉiu aparta prozaĵo tradukita.

Precepe por stile sentemaj legantoj, estus interese kompari la tradukon de Kabe kun tiu de Grabowski: "La Simo de la Mondo" (p. 116) kaj aprezi la virtuozecon de la du majstroj. Sed tiu de Grabowski troviĝas en: "Kondukanto kaj Antologio Internacia" (1904), sekve do, por preskaŭ ĉiuj, tio ne estas farebla. Espereble baldau aperos reeldono de tiu antologio, jam de kelkdeke da jaroj ne mendebila. Tia entrepreno estus pli farinda ol eldono de ankoraŭ unu kolekto de "moderna" versaĵo.

Kun zorga respekto al la klasika aŭtoro la Literatura Komitato sin limigis, korektante nur evidentajn erarojn, nekorektajn pri-faktajn kaj, supozinde, formojn jam arkiakajn aŭ trokuriozajn. Apendico klare indikas ĝiajn tekstoŝanĝojn; sekvas listo de vortoj ne troveblaj en: "Plena Vortaro".

Ĉi tiu represo estas ja bonvena. Tekniko bona kaj enhave valora, ĝi estas rekomendinda por ĉiu leganto kiu amas flari la aromon de la floroj de nia frutempa literaturo.

En la glosaro aperas: Fellow = kunulo, kamarado, membro, asocio. Fakte en la Angla lingvo "fellow" (minuskle) = ulo; kamarado, kunulo, kunhomo, kompano (PIV) (Wells). "Fellow" (majuskle) = Fratulo, ekz. de B.E.A. aŭ iu kultura aŭ akademia instituto aŭ kolegio.

**"Konsideroj"**: Publika Letero pri Esperanto kaj Organizado. 31 paĝoj (8 x 10 $\frac{1}{2}$  coloj): Jo Haazen, Kijkuit 17, B-2180 Kalmthout, Belgium. 50 Belgaj frankoj. Petu ĉe nia Libroservo.

Inter alia bonintence konstrua kritiko

la aŭtoro pledas por universala nomo: Universala Esperanto-Asocio (simile al Ruĝa Kruco, Amnestio Internacia, Rotario k.a.) anstataŭ, ekz-e, Germana, Aŭstralia Esperanto-Asocio, Ligo, Federacio . . . Tra la tuta mondo E-istoj devus uzi unu ĉefan nomon — Universala Esperanto-Asocio, kun la prestiĝa subtítulo: En Konsultaj Rilatoj kun UNESKO. Tio donus al ni multajn eblecojn sur diplomaciaj kaj oficialaj terenoj. Ekz-e:

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**

(En konsultaj rilatoj kun Unesko)

**Aŭstralia Sekcio.**

Tiam ni estus vere universalaj, same kiel la Ruĝa Kruco kaj multaj aliaj tutmondaj organizaĵoj. Multe pli impresus kulturajn vizitantojn. Jurnalistojn k.a. invito paroladi aŭ raporti ĉe la "Universala Esperanto-Asocio, Sidneja filio de la Aŭstralia Sekcio", ol invito al la Sidneja Esperanto-Societo. (En la supraj ekzemploj ni donas lokcan koloron.)

Dua propono estas havi nur unusolan, kolektivan, firme subtenatan revuon en E-o, per tio evitante vastan elspezon de mono, tempo kaj energio. Unusola, impresa revuo alportus: financon bonstaton; reklamojn — kun sekva nealta abontarifo, do kresko de abonantoj; pli multe da paĝoj, per kiuj redaktoroj povus pritrakti ĉian kampon — Esperantan, kulturalan, turisman, teknikan ktp.

Pri la kulturaj revuoj ni konsentas, ke tiel — bone. Tamen restas nepra neceso, ke ekzistu landaj bulten(et)oj, presaj aŭ mimeografitaj, per kiuj E-grupanoj ĉiu en sia lando povas resti en daŭra kontakto, ĝisdate informate pri organizaĵaj, pripersonaj kaj aliaj aferoj propraj nur al ilia Esperanta situacio. Sen informa bulteno landa, ĝisdate aktuala, E-grupo, ligo, federacio forte riskas diseriĝi.

**"Internacia Komerc-ekonomika Vortaro en 9 lingvoj"**. 15 x 21.5 cm. 550 Paĝoj. Prezo: 65 guld. Por membroj de Esperanto-asocioj: 57.50. Havebla ĉe U.E.A.

**Dansk Esperanto Forlag**

Dekpaĝa libro-katalogo de tiu eldono: via red. havas du ekzemplerojn por petontoj. Mendu per nia Libro-servo.

**"Biblia Revuo"**, julio-sept. 62 paĝoj. Trimonata. 6 dol. Usonaj. Unuopa nro: 1.80 dol.

Donald Broadribb daŭrigas sian studon pri la Ugaritaj mitoj. Tiu popolo, kun Semida dialekto simila al la klasika Hebrea, datiĝas de ĉ. 7000 A.K. kaj la

urbo Ugarito (nun Ras-es-Ŝamra) estis detruita ĉ. 1500 A.K. Ĝi situas nordoriente de la Meza Maro, tuj sude de Turkujo. Pli ol 500 skribaĵoj sur argilaj tabuletoj estas jam elfositaj. Post multe da penado kleruloj jam de 1929 sukcesis kompreni parton de la tekstoj, malgraŭ difektoj pro frotado kaj rompo. "Tekst-libro Ugarita" eldoniĝis en Romo, 1965, kaj post tiam oni progresis ĉe sciado pri tiu malfacila tasko: kompreni la lingvon. D. B. skribis: "Kiel scias ĉiu leganto de la Biblio (? -Red.) la Ugaritaj poemoj estis familiara literaturo en la tuta Palestino", kaj li citas vortojn kaj versojn de la Hebrea Biblio, kiuj supozinde havas ian rilaton kun tiuj poemoj; Li avertas: "Oni devas nek troemfazi rilatojn kun la Biblio, nek ignori ilin".

Ĝi estas esplora kampo mistera kaj obskura, en kiu nur tre klera elito povas agi, sed ĉiuj ekster ĝia rondo tamen kun danko kaj fido ricevas la frukton de ĝia pacienciga laboro en ĉiu senco: lingva, arkeologia kaj literaturkomparado. Al neniu alia aŭtoritato oni povas sin turni.

J. Keon-Cedek (Jerusalemo) kontribuas artikolon pri La Rimarkindaĵoj de la Valo Kidrono, apud la montoj Oliva kaj Morija: Angle: Cedron (Johano 18/1). Sub variaj nomoj ĝi estas menciita en Malnov-Testamentaj libroj, jam de Genezo ĝis Kronikoj. Sub nomo Kidrono ĝi unufoje troviĝas ĉe 2 Samuel 15/23.

Ekster Jerusalemo mem estas prekaŭ neniu loko kun tiom multe da solenaj pens-asocioj por religiuloj kiel havas tiu valo: Getsemane, laĝeto de Siloah, Akeldama, kaj la Templo; tiuj lokoj ĉiuj situas en ĝia ĉirkaŭaĵo.

Daŭrigo de Psalmo-tradukoj de Donald Broadribb, listo de aktualaj gazet-artikoloj, recenzoj kaj informoj kompletigas numeron de revuo unika en Esperanto.

"**Modela Prononco de la Interlingvo Esperanto**". Represajo el Scienca Revuo. A. Lienhardt. 16 paĝoj. Havebla ĉe via redaktoro.

Dense detala pritrakto de la temo; tamen al ĝi mankas klarigo pri AJ en vortoj kiel ekz. Majo (ma-jo) kaj semajno (sem-ajn-o); gaja (ga-ja) kaj gajna (gaj-na); kujuto (ka-ju-to) kaj kajto (kaj-to).

Por Anglalingvaj komencantoj ni aldonas: mah-yo; sem-eye-no; gah-ya; gy-na; kah-yoo-to; ky-to.

Notoj ankaŭ pri: tiuj, kiuj k.c. estus bonvenaj.

"**G. Marin Vizitas sian Hejmon — la Mondon**". 80 paĝoj. 1 dol. Prologo de Givoje Marinko, ĉe kiu la libreto estas havebla: P.p. 5025, 41040 Zagreb-Dubrava, Jugoslavia.

Marinko, kiu mem estas konata mondvojaĝanto, kribris la ampleksajn taglibrojn de Gaspard Marin, poliglota globtrotanto tra pli ol 50 landoj, kaj per tio kompilis interesajn skizojn verkajn kaj desegnajjn. La modesta kolekto evidentigas, ke Marin estis pacienca kaj detalamenta observanto de ĉio, kion lia serĉema menso pelis lin esplori. Li vojaĝis lantpaŝe, bone sciante, ke homo devas resti en loko sufiĉe longan tempon por iom familiariĝi kun sia ĉirkaŭaĵo.

Martin naskiĝis ĉe Bruselo en 1883, E-iĝis en 1899, kaj mortis en 1969. La nekrologo de tiu pioniro, malnova membro de U.E.A., S.A.T., E-a geografiisto kaj ano de la Brita Reĝa Antropologia Instituto, okupis kvar liniojn en "Esperanto" kaj "Sennaciulo".

## JAPANAJ E-ISTOJ EN ĈINIO

Laŭ invito de la Ĉina E-Ligo, ok Japanaj delegitoj restis en Ĉinio dum semajnoj jam de 15 aprilo, por objektive observi la nunan situacion en tiu landego kaj profundigi reciprokan amikecon per E-o. Espereble ili raportos verfaktan raporton pri la efektiva stato de la E-movado en Ĉinio kaj la sinteno de la registaro al ĝi.

## BREVO ?

Laŭ kelkaj E-vortaroj ĝi = papa letero. Tiel en: Wuester, Plena Ilus Vortaro, E-Fr. de Waringhien, Butin/Sommer k.a.

Nur en tiu de Butler oni trovas: brevo (ueto), (typ.) breve, the sign over the letter ŭ. La Angla vorto "breve" havas kvin signifojn.

## NIA BONEGA SAN-SISTEMO

Diris virino en politika reklamo per televido: "La Brita Sangstatiga Sistemo malebligis al mi elekti mian preferatan kuraciston, sed nun, reveninte Aŭstralion, mi rajtas elekti mian kuraciston sep tagojn en ĉiu semajno, nokte kaj tage".

(Ulo kompatinda! Devas esti, ke li estas ĝiskolapse ellacigita.)

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



President: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka St., Northbridge, N.S.W. 2095

Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield, N.S.W. 2070

A.E.A. Sekretario: R. Baxter, Box 415 P.O. Manly, N.S.W. 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 130 (210)

MELBURNO

Julio, 1974

## ESPERANTO AS A LITERARY MEDIUM A Plea for Competency in Criticism.

The past fifty years have not yielded one thoughtful, painstaking article or study written to disprove the fitness of Esperanto as a literary medium. To write such postulates of course, an intimate knowledge not only of Esperanto grammar, but also of its prevailing character and spirit, its semantics, its evolution and tradition. One finds plenty of negative criticism from those obviously lacking the above essentials. On the other hand, there are many finely wrought studies, penned by those fully possessing them, that reveal a careful study of the question. Of such may be mentioned Prof. Collinson (Liverpool University); Prof. G. Waringhien (Lille), Dr. W. Manders (Utrecht), Prof. Charles Baudouin, Dr. W. J. Downes. Many clergymen have praised the Esperanto translation of the Bible by Dr. Zamenhof.

The lack of criticism unfavorable to Esperanto written by competent persons is remarkable when one considers the wide field offered for such by the low standard of so much of the Esperanto text found in both original and translated work. The fault here lies, not in the language, but with those who, having little or no literary feeling, and in many cases lacking complete mastery of the language, have undertaken work beyond their capabilities.

There is, however, much prose and poetry that merits the attention of those interested in the relation of international language to literature. While this is true, there are still many scholars and men of affairs who will go only so far as to agree that Esperanto is fitted for the non-literary field—science, commerce, travel. But the line between these and literature is very fine indeed. For what is literature?

Professor Meillet in his "Languages in the New Europe" grants to an art language the fields also of politics and science. Good! So let us take, for example, "Political Discourses" (Hume), "On Liberty" (J. S. Mill), "Ethics of the Dust" (Ruskin), "Old Red Sandstone" (Hugh Miller). The first two are sociological; the others are geological works. All are regarded as fine literature.

Similarly, "Discours de la Methode" (Descartes) is a scientific report; "Les Provinciales" (Pascal) is a religio-political treatise. Yet "these two works form the base of French literary prose", says Professor Waringhien. Where does one mark the line of differentiation between "literary" and "scientific" expression?

Esperanto is capable of clothing with fitting vesture all such works as are mentioned above, as it has done with certain of Shakespeare, Goethe, Dante, Sophocles, Baudelaire etc. — and with the Bible itself.

Leading Esperantists in several lands have enriched the language by enlarging its vocabulary, elaborating its prosody and experimenting with its syntax, after the manner of word masters the world over. They affirm that Esperanto may travel a literary path without in any way interfering with its simple grammar and word-stock of the "people". Esperanto, as such, may always be easily learned

by folk wishing to use it only for plain intercourse and so on, and not to read its higher literature, which, as in the national languages, is only for those with time and inclination to devote to the appropriation of its treasures.

After correspondence in "La Suda Kruco" (Aug.-Sept. 1933) Prof. A. Lodewyckx (Melb. Univ.) admitted that he did not deny "the possibility of Esperanto or another artificial language developing into a literary language. It only requires men of great literary genius using such a language for original production". Since then such have appeared, and though the world yet knows them not, Esperantists can name them.

Until our ill-informed critics can bring themselves into a similarly reasonable state of mind, and by honest study fit themselves for giving a true appraisal, Esperantists — themselves well equipped — must continue to present the truth to a blinkered obscurantism that cannot, because it will not, familiarise itself with the points at issue.—F.R.B.

See: The A.E., Sept.-Okt. 1962. "Eseoj" (Waringhien: 1956); "La Suda Kruco", Jan., 1930.

## AUSTRALIA KRONIKO

**MELBOURNE:** Societa vespero kun varia programo kaj 24 ĉeestantoj, 27/5 rezultis el la penoj de anoj de 3 grupoj (Melbourne, Oakleigh kaj Malvern). Organizado kaj programo estis F-ino A. Hearn (Oakleigh), jam konata pro originalaj ideoj. Kontribuoj al "Telero-Ekspozicio" estis same diversaj kiel multnombraj, kiel ankaŭ rakontoj pri tiuj, kaj gast-juĝito, S-ino Ali Leereveld, nur malfacile decidis pri premioj. S-ino A. Paling gajnis pro "Plej bela ekspoziciaĵo". F-ino Lorna Samblebe pro "Historia Rakonto", dum S-inoj May Frogley kaj Fay Koppel dividis honoron pro E-rakontoj. Alia distrado inkludis pianludadon de S-ino Doris O'Brien (Malvern), E-poemon de S-ino Paling kaj komunan kantadon, dum amuzan skeĉon "Vespero ĉe la ge-Koppeloj" ludis la titolroluloj. Por konkludo, al la sono de gaja babilado aldoniĝis tiu de la ĉiam bonvenaj tetasoj.

S-ro F. R. Banham, 3/6, rakontis pri la ruzo de ŝparema edzino kaj bruldifektita ombrelo, kiun kompensis asekur-kompanio. Poste li priskribis la tri nivelojn de scipovo pri Esperanto. S-ro H. Koppel, 10/6, raportis pri novaĵoj el Esperantujo kaj prezentis denove plurajn novajn librojn haveblajn ĉe la Libro-Servo. — T. K.

**MORWELL, Vik.** Nia ĝenerala kunveno okazis 7/5 kaj oni elektis la novan Estraron: Prez. S-ro W. Wybenga; Vic-Prez: S-ro I. Maddern; Sekretario (Korespondo) S-ino M. Wybenga; Sekretario (Protokolo): S-ino A. Schepers, Kasisto: S-ino M. Wybenga.

Je 4/6 ni prezentis filmon, "La Nova Najbaro", faritan de studentoj de la Morwell Alt-Lernejo. "Bonan Tagon" estas la titolo de Radio-Programo de Radio-Studio 3 TR, Sale. Post enkonduka prelego 10/7 sekvos 12 lecionoj

de kurso por komencantoj dum la venontaj 12 semajnoj. Skribu gratuleton al "Mr. Don Smith, Manager, 3 TR Radio Station, Sale, 3850". W. Wybenga.

### Viktoria Esperanto-Konferenco

La Esperanto-Federacio de Viktorio, kunlabore kun la E-Societo de Morwell, organizos "Viktorian Esperanto-Konferencojn" je la 1-a, 2-a kaj 3-a de Nov. 1974. Kunvenoj denove okazos en la Alt-Lernejo de Morwell kaj konferencanoj loĝos en la komforta "Latrobe Valley Hotel".

La kotizo por la konferenco estas: \$2.50. Pensiuloj \$1.50, Studentoj \$1.00, Esperantistoj el aliaj ŝtatoj ne pagas kotizon. Sendu vian kotizon al S-ino M. Wybenga, 8 Langford Street, Morwell, 3840. Se vi povas kontribui al la programo per skeĉoj, prelegoj, rakontoj sendu proponojn al S-ro H. Koppel, 41 Byfield Street, Reservoir, 3073. Skribu al la sama adreso se vi deziras partopreni karavanon per trajno de Melburno al Morwell, je tre reduktita vojaĝkosto.

**SYDNEY:** 20/5: Victor Bourlin majstre satire priskribis "mikspoton" de lumbildoj novaj kaj malnovaj al pli ol 20 ĉeestantoj, kiuj ilin tre ĝuis. Pikante montriĝis pentraĵo de "Santa Claus" inter homoj kiuj festis la Kristnaskon pli arde ol saĝe. Distance staris formo de Kristo. Super alia bildo de naĝisto estis skribita: "Lernu Esperanton"; mal-supre la respondo: "Mi ne havas tempon!" Vidante ŝarkon kiu sekvis lin, ni bone komprenis kial tempon li ne havis! Margaret Chaldecott montris lumbildodjn; inter ili bildoj arkitekturaj de la Universitato de Brisbane, fotitaj dum la 19-a Esperanto-Kongreso. Fine, Fritz Mueller-Sorau kantis du Germanajn baladojn klarigitajn per konsternegaj lumbildoj.

27/5: Debato: "Ke tielnomataj neidentigitaj flugantaj objektoj ekzistas". En flua E-o Wre Chandler kaj Tom Elliott vigle debatis. Wre defendis: por; Tom negis: kontraŭ.

La Verda Stela Grupo en Ales (Francujo) skribis, ke ili ĝuis la sonbendon kun voĉoj de niaj membroj kaj reciproke sendos sonbendon.

3/6: John Matasin montris lumbildojn de la Filipina Insularo — la lando, popolo kaj urbego Manila kun ĝiaj strangaj multkoloraj omnibusoj. La celo de la vizito, tamen, estis observi la famajn "resanigistojn", kiuj, oni asertas, operacias nur per la mano, sen tranĉilo. Li mem spertis la metodon kaj diris, ke ŝajnas ke fingro de resanigisto eniras la karnon kvazau ĝi estus butero; poste ne estis eĉ signeto de vundo!

10/6: Kevin Smith, gastparolanto, informis nin pri la evoluo de la homo, jam de Primato ĝis Homo Sapiens, dum 75-milionjara periodo. Li menciis, ke la "ĉeno" nun estas kompleta kun Australopithecus kiel la "trovita ĉeno". Li emfazis, ke "moderna homo" aperis nur post kompare mallongega tempo kaj nia ĝusta nomo — tre komplimenta — estas "Homo Sapiens Sapiens". Spit'al ŝtorma vetero 18 membroj alestis. 17/6: Reĝina Nas-kiĝtago: ni ne kunvenis.

**MANLY:** Nia dua trimestro en la Vespera Kolegio de Manly komenciĝis 28/5. Ni denove havas 3 klasojn. Kelkaj novaj studentoj ĉeestis la komencan klason de Arturo Cocking. Adrian Curley, de Wahroonga, studento de la Sidneja Universitato, alparolis kunvenon aranĝitan de la E-Klubo en Manly. Lia temo: Romantikismo en Literaturo kaj Muziko. Prof-o R. Robertson gratulis lin pro lia flua uzado de E-o en la prezentado de vasta kaj kulture grava temo. — K. M.

**BRISBANE:** La Brizbana E-Societo partoprenis en la tre sukcesa Federacia semajnfino ĉe Toowoomba la 5-6-7an de majo. Inter la ĝuigaj eroj de la konferenco estis elstara la libro-ekspozicio kaj la komforto de la konferenc-ejo.

1-2an de junio 23 E-istoj vigle partoprenis semajnfino ĉe hostelo Mt. Glorious. F-ino Beverley Allatt faris aranĝojn kaj invitis aliajn grupojn partopreni

Drama grupo regule kuniĝas ĉe la hejmo de Winsome Greenhalgh, kaj la kantogrupa, sub gvido de S-ro Buckler, kunvenas ĉe la hejmo de Sybil Martin. La lastan lundon ĉiumonate okazas ĝenerala kunveno, kiam ĉiuj membroj

partoprenas, kompreneble en E-o, sub la estreco de la prez-o, Ray Ross.—V. Robinson.

**PERTH:** Persista agado fare de S-ino I. Einihovici sukcesis ĉe Floreat Park Primary School, kie 23 infanoj en la fina jaro de elementa lernado jam komencis lerni E-on kiel elekteblan studobjekton. S-ro H. Runciman, la lernejestro, venkis mankon de instruisto, forpemesante stabanon dum unu horo ĉiusemajne por ricevi lecionon ĉe la hejmo Einihovici. Post nur 8 lecionoj, la kursgvidonto, S-ino Martini, estis preta komenci instruadon. Lecionoj okazas ĉiusemajne.

Alia E-kurso baldaŭ komenciĝos ĉe Scarborough High School, kie S-ro B. om, lingvo-instruisto, instruos E-on al ĉ. 20 lernantoj en la 3-a jaro de mezgrada edukado.

En ambaŭ kazoj temas pri instruado en la kadro de la lerneja programo.

22/5: Ĉu vi scias, ke nia lando konsistas el 3 insuloj — Australio, Tasmanio kaj Rottnest? Tion asertis Bill Howard. W. Illingworth — denove inter ni post longa malsano — demandis nin pri multaj aferoj, kaj Olive Hunt turmentis nin per langoligaj frazetoj por ripeto.

12/6: Plenplena kunveno: Arthur kaj Eileen Oliver prezentis lumbildojn de elstara belceco pri du vojaĝoj inter Anglujo kaj Hindujo laŭ la landa vojo, kiujn ili faris en sept./okt., 1970, kaj marto, 1973, en sia "Landrover". Demandoj pri diversaj temoj de John Poole-Johnson estigis viglajn diskutojn, i.a. "Ĉu E-o estas fremda lingvo?"

La Ligo ĵus ricevis urĝan peton de la fako pri plenĝula edukado de Midland Technical School pri instruisto por enkonduka E-kurso dum la lasta trimestro de la nuna jaro. La Ligo ankaŭ ricevis dankleteron de "Art Workshop for Children" (Armetiejo porinfana) pro la ŝatata kunlabro de Jessie Gray kaj ŝiaj helpantinoj en ekspozicio de marionetoj ĉe Fremantle Arts Centre meze de majo. La ĉarmaj gantpupoj kreitaj de Jessie estis tre popularaj kaj instigis multajn peti informojn pri E-o. — R. M.

#### "ADRESARO DE A.E.A."

P. 2/1: Legu: Joab Eliot, P.7: sub Adelaide, legu: F-ino Addis, P. 20, sub Stephens, legu: Mount Albert, P. 23: legu: ENTREPRENU. Linio 2: difinitaj (laŭ la 2-a difino en P.I.V.), P.24/16, 19. legu: fliiĝis, fliiĝintaj. Linio 20: legu: klopodojn; linio 23: legu: kun freŝdata informo.

## OFICIALA INFORMILO

### NOVAJ ANOJ:

Callaghan, S-ino A. M., Mosman Park, Qld.

Clarke, F-ino D., E. Brisbane, Qld.

Potts, S-ro B., Wellington, N.Z.

Rockliff, S-ino C. M., Victoria Park, W.A.

Cannon, S-ro B., Liverpool, N.S.W.

### DONACOJ: T.G.M.F.

Williams, F-ino B., Camphill, Qld \$5.00

Bruce, S-ino J., Mona Vale, N.S.W. 1.00

Hull, S-ino, I. V., Cremorne, N.S.W. 2.00

—Russ Baxter, Sek., 12 junio

### A.E.A. EXAMINATIONS

Elementary: F. J. Fallu, Vic.

Supera: (correction, p. 25): George Clarke, S.A. (honors).

### LA INSPIRITA KANTISTO

Franz Schubert, palvizaĝa hom',  
senmona kaj malsata,

Troviĝis kun amiko en kafejo flanke-  
strata.

Bonkora homo la amik', li volis jen  
aranĝi.

Tableton je la propra kost', ke  
Schubert povu manĝi.

Kelnero la fakturon donis. Okpenca  
estis ĝi.

Ĝin al si Schubert prenis kaj ekskribis  
kun pasi'.

Ĉirkaŭe babilado kaj klaket' de pladoj  
laŭta,

Sed tion malatentis li, por li ne vida,  
aŭda.

Dum kelk minutoj skribis li sur tiu  
paperpeco,

Al ĝi donante stampon de l'eterna  
senmorteco.

Ĉar tiam kreis li la kanton, kiun ĉiu  
konas:

"Alaŭdon aŭdu!" Ĝi ankoraŭ melodie  
sonas.

Ho tiu ĝoja momentet' de rapsodi'  
ĉiela!

Sed pasis ĝi, revenis li al mondo tre  
malhela.

Denove li sin trovis en la mezo de  
angoro.

Sub devo plu vagadi sian mondon de  
l'doloro.

—Robo.

### NELACIGEBLA LEGANTO

"Mi tralegis preskaŭ la tutan E-literaturon jam de 'La Neĝa Blovado' ĝis 'En Okcidento Nenio Nova'. — Prof-o Gaston Waringhien, leksikologo, gramatikisto, tradukisto, prozisto kaj poeto (at'Parnasa Gvidlibro', 1932).

jen homo, kiu sekvas la principon de Efesanoj 5/16: "Kiel eble plej bone utiligi vian tempon". Kontraste kun lia ekzemplo, mi loj da "E-istoj" ne trovas tempon por legi unu E-libron en jaro.

### LINGVOJ KOMPARATAJ (5)

#### La Rusa

Ĝi estas pli malfacila ol la 4 antaŭe priskribitaj. Multaj eĉ dotitaj lingvistoj sentas malesperon baldaŭ post studkomenc-o. (1) 34 malfamiliaraj literoj, kiuj tamen ebligas al ĝi preskaŭ puran fonetikon. (2) Malfacile mastrebla akcento. (3) Fleksio pli komplika ol eĉ la Greka. (4) Vortprovizo fortimige riĉa. (5) Ĝi subtileco egalas tiun de la Franca; ĝia fleksebleco rivalas tiun de la Hispana

Simile al la Greka, ĝi postulas fortan memorpovon Eĉ la Slavlingvaj Ĉeĥoj trovas ĝin malfacila. L. Schoedel en Ĉeĥa E-gazeto raportis el la G.D.R., ke post kvar jaroj da studado neniu el la kontrolitaj junuloj povis legi simplan Rusan libron, kaj eĉ la plej progresintaj ne povis korespondi en la Rusa.

Bodmer ("Loom of Language", p. 415) konsilas, ke homo deziranta lerni la Rusan, aranĝi por si naskon en tiu lando. Ĝia kaza sistemo estas tiel tre komplika, kiel tiu de la Latina aŭ la Greka. Ĝiaj malregulaj adjektivoj estas eĉ pli malfacile lerneblaj ol tiuj de Latina. Ĝiaj numeraloj kaj afiksoj prezentas streĉajn problemojn.

Findire, estas tri ĉefaj Rusaj idiomoj — la Granda (nord-orienta), la Malgranda (Ukraina) kaj la Blanka (Balta).

### IZOLULO PAROLAS . . .

Isolated from personal contact with E-ists, and wishing to become more involved in E-o, Percy Holmes of Seymour strives to give information on it whenever he can. In 1961 he spent a holiday in Bavaria, meeting with many friends and speaking E-o throughout. He gave a talk to the Seymour Historical Society on "50 Years of Broadcasting", drawing on a lifetime experience in wireless. He used much equipment to demonstrate his lecture, mentioning E-o several times and showing letters and objects relevant to radio that he had received from overseas E-ists during 1920-35. This talk was given good space in the Seymour "Telegraph" 18/9/73.

Please correct his address in the "Adresaro": 8 Villiers St., Seymour, 3660. Also, that of Stan Ling, Box 144 Warburton.

## LIBERA FORUMO

En la gazeto de U.E.A., "Esperanto" (aprilo) aperas maltrankviliga artikolo: "U.E.A." en danĝero de malintegriĝo". Temas pri kampanjo organizita kontraŭ li ĉefe pro la fakto, ke li estas "bastiono de (U.E.A.-a) neutraleco". D-ro Lapenna demandas: "Se iuj nepre volas politikumi per Esperanto aŭ uzi la lingvon por politikaj celoj, kial ne krei apartajn politikajn Esp.-organizojn, kun kiuj U.E.A. povus eĉ eniri en kontraktajn rilatojn?" Plue, li avertas, ke ". . . oni ne tuŝu la politikan neŭtralecon de U.E.A., ĉar progresigi Esperanton ĉie en la mondo kaj sur ĉiuj sociaj tavoloj povas nur monda organizo politike neŭtrala". (en para. 15, p. 64, li difinas la veran neŭtralecon de U.E.A.).

Kion opinias membroj de A.E.A. pri tiu tre grava afero? — I. Fallu (Oakleigh, Vik)

Estas kondamninde, ke iuj landorganoj pensas bone, satiri, eĉ ataki U.E.A.-on kaj precipe ĝian ĉefon, D-ron I. Lapenna.

Redaktoroj de E-landorganoj havas unu solan taskon: fortigi E-on en sia propra lando, per tio fortigante la movadon tra la mondo. Anstataŭ fari atakojn kontraŭ la "koro" de nia organizita mondmovado, unu grava landasocio devus sin streĉi por haltigi sian ŝrumpantan membraron, kiu hodiaŭ estas malpli nombra ol ĝi estis antaŭ 40 jaroj. — F.R.B.

Sur paĝo 20 de la 1974a "Adresaro", troviĝas "ESPERANTA EDUKADA INSTITUTO". Ni bonvenigu grupon de entuziasmoj kiuj sin okupas per la instruado de Esperanto, kian ajn titolon ili adoptas. Tamen la afero ne estas tiel simpla.

Kontrolante, laŭ la Adresaro, ni eltrovas ke:—

- (a) neniu membro de tiu "Edukada" instituto estas profesia instruisto;
- (b) neniu havas la "Klercan Diplomon" kaj nur unu havas Esperanto-diplomon ian ajn;
- (c) du el la komitatoj ne troviĝas en la Adresaro kiel membroj de A.E.A.

Certe ne estas krimo adopti fanfarone imponan titolon, kondiĉe ke pere de tiu titolo oni ne enspezas monon falspretende. Tamen, la reputacio de A.E.A. necesigas ke oficiale agnoskata "Instituto" en la Adresaro meritu la titolon.

Grupo de neprofesiaj instruistoj, eĉ altgradaj, ne meritas nomi sin "Edu-

kada" se ili ne kapablas instrui almenaŭ ĝis la nivelo de la "Klerca Diplomo". Cetere "Instituto" devas esti kapabla sin okupi pri la profesiaj aferoj de scienco, arto aŭ metio. Ĉu la membroj de tiu ĉi "Instituto" tiel kapablas?

Ne decas ke A.E.A. donu oficialan agnoskon tra tuta Aŭstralio al loka grupo kiu fakte kapablas nek "eduki" nek sin okupi per la profesiaj aferoj de Esperanto-Edukado, sub la fals-impresiga titolo de "Esperanta Edukado Instituto". — E. W. Chandler, 57 Northcote Street, Naremburn, N.S.W. 2065.

### PRI PROPRA TRADUKO

Estas malgranda la kvanto de la prozaj verkoj tradukitaj el la Angla en E-on, kaj la pligranda parto da ili estas ne plu mendebla. Inter ili ankaŭ estas eble la plej granda: "Jane Eyre" (C. Bronte). Tradukis ĝin Bulthuis; ĝi ne estas tekste fidinda.

Se vi havas la du tekstojn de iu verko — la Anglan kaj la E-an — estas bona ekzercado traduki paragrafojn de la Angla kaj poste kompari vian provon kun tiu de la E-isto, kiu tradukis la tutan verkon. Ekzemple, se vi havas la romanon "Petrolo" kun ĝia originalo "Oil" (Upton Sinclair) faru laŭ la sugesto kaj komparu vian tekston kun tiu de la tradukinto, Wm. Bailey. Inter aliaj libroj, eble disponeblaj por vi, estas "La Naiveco de Pastro Brown" (Chesterton), "La Romano de San Michele" (Munthe), "La P. incino kaj Betty" (Wodehouse), "Morto de Trajno" (Crofts), verkoj de H. G. Wells.

Ne ĉiu E-a traduko, libre presita, estas bona, kaj ekzistas nun E-istoj kapablaj ankoraŭ plibonigi la jam faritajn provojn.

Zamenhof tradukis la rakonton de Dickens "La Batalo de l'Vivo" laŭ Germana traduko. Estas interese, traduki kelkajn paĝojn de tiu verko kaj tiam kompari ilin kun la Zamenhofaj frazoj. Eble per tio vi jen-jen ridetus, se vi trovas lokojn, kie Zamenhof sekvis senc-erarojn de la Germana teksto. Unu el ili: "sabataj sonoriloj" (legu: dimanĉaj . . .). "Rondo", 10/64.

### Verkado, Tradukado, Parolado

"Pli facile estas, verki rekte en la lingvo, ol traduki. Efektive la rekta uzado de la lingvo estas bona metodo por kapti ĝian spiriton kaj kutimiĝi al ĝia natura formo. Poste, kiam per tiu metodo oni sukcesis senpere pensi en Esperanto, oni sin turnu al tradukoj. Tiu laboro estas ofte tre malfacila; sed ĝi estas tre instruiva, ĉar ĝi devigas al



longaj priprenoj kaj diversigas la parolturnojn.

"Multe paroli la lingvon estas jam bona rimedo, sed ne sufiĉa. En la ordinara konversacio oni ofte ripetatas la samajn frazojn, oni uzas nur tro limitan parton de la lingvo. Pli ol unu fojon mi, kun granda miro, konstatis, ke kelkaj samideanoj kiuj tre flue, tre facile, tre lerte parolas Esperanton, skribas ĝin tute ne korekte. Tio venas de la fakto, ke ili scias nur kelkajn tipajn parolturnojn, sufiĉajn por agrabla babilado; sed, kiam ili volas verki aŭ traduki ion beletristikan, esprimi komplikajn ideojn, delikatajn nuancojn aŭ malsimplajn temojn, ili plene malsukcesas". —Carlo Bourlet (1886-1913).

### KONATULO AŬ KONATO?

"Svisa T-Revuo" (aprilo) asertas, ke aldone de la personiga sufikso -ul al partcipa substantivo estas superflua, ĉar tiu substantivo jam enhavas la ideon de persono". Tiel same instruas La Plena Gramatiko, para. 56.

Lingve sentema E-isto ne konsentus pri tio. Karl Minor (L.K.) male demonstras diferencon inter "konato" kaj "konatulo". "Konato" estas home, kiun mi (aŭ vi) konas. "Konatulo" estas homo, kies karakteriza eco, esenca kvalito, estas, ke li estas konata, nome homo, kiun ĉiu konas pro lia famo, fama aŭ socia elstareco. Ekzemple: monda film-stelulo, granda sciencisto estas "konatulo".

Simile pri "instruitulo", vorto en la "Fundamenta Krestomatio"; nome, homo, kies karakteriza eco estas instruiteco. "Instruito" povas esti bubo, kiu jam ricevis instruon en lernejo aŭ aliloke. P.I.V. listas la formon "instruitulo" kiel arkaikismon por "scienculo"; sed ne ĉiu instruitulo estas scienculo. Li povas esti teologo, literaturisto aŭ alispeca artisto, ekster la kampo de la scienco.

Minor krome atentigas pri diferenco inter "lakeo" kaj "lakeulo". "Lakeo" estas servisto ĉe riĉuloj, ordinare portanta livreon. "Lakeulo" estas homo, kiu, ne estante lakeo, tamen havas la karakterizan econ, humilacan naturon, esti lakea.

Fontoj: "Homoj en Milito", p. 141 Esp-Deutsch Handwoerterbuch (Minor) Plena Gramatiko, sub -ul (indekso).

### SUBSCRIPTIONS

Would inter-State members paying their subs. by cheque kindly add cost of duty stamp In Victoria it is 7c.

## RECENZOJ

**SALOME:** Dramo en unu akto de Oskar Wilde. Tradukita de T. Chif. Japana Esperanta Librokooperativo, Nakatu-homadori 3-10, Ooyodo-ku, Osaka. 52 paĝoj.

Bulthuis tradukis la dramon antaŭ pli ol 50 jaroj; ĝi ne plu estas mendebla tradukon faritan de T. Chif (mortis 1944) reviziis Miyamoto Masao. Oskar Wilde en 1893 franclingve verkis la originalon; tradukis ĝin en la Anglan Aired Douglas ("Oxford Companion to English Literature") Pri ĝia temo Richard Strauss komponis operon, kiu prezentigis en Parizo en 1896. En Anglujo ĝi estis malpermesata ĝis 1931. En tiu jaro ĝi esti ludita en Londono.

Herodo, tetrarko de Judeo, murdis sian fraton kaj alprenis ties edzinon, Herodias. Salome estis ŝia filino per la murdito. Johano la Profeto kondamne riproĉis al Herodias kaj ŝia edzo pri iliaj pekoj. Tio forte kolerigis la virinon. Herodo, amore ŝorcite de Salome, ordonas al ŝi danci antaŭ li, promesante doni al ŝi ion ajn, kion ŝi petos. Urgite de sia patrino, Salome petis kiel rekompenco la kapon de Johano sur plado, kaj ricevis ĝin, kontraŭ la volo de Herodo, kiu timis la profeton.

La dramo finiĝas per ne-Biblia aldonajo en tio, ke Herodo, tuj post la senkapigo de Johano, jam timege rigardas ĝin kiel "krimon kontraŭ in nekonata Dio" kaj panike ordonas soldatojn mortigi Salome'n.

Bedaŭre, E-aj verkistoj malofte sekvas la tekston de la Londona E-Biblio (1926) kiam ili citas el la Sankta Skribo. Ignorante tiun libron, ili malhelpas unueciĝon de komuna lingvouzado.

La nomo Salome ne troviĝas en Mateo 14 kaj Marko 6 — la Biblia rakonto — sed Josefus en sia verko "Antikvaĵoj" tiel nomis ŝin.

Kromnote: Estas dube, ke Wilde tradukis la dramon **originale** en la Franca; Douglas en 1918 atestis kontraŭ tiu aserto. Cetere, Bulthuis tradukis ĝin en E-on laŭ germana traduko.

"**Telopeco**", junio, nro 4. Organo de E. F. de N.S.K. 18 paĝoj. Jarkotizo: 50 c.

Ĝi evidentigas la sinoferan laboron de fervora grupeto en Sidnejo kaj la multjaran spertecon de ĝia redaktoro. Per ĉiu nro li prezentas artikoletojn instruajn, amuzajn, informajn. Unu el ĝi, "Sekreta Lingvo", ekzempligas uzon de E-o kiel esotera lingvo. Ĉiuj E-istoj

sopiras la tempon, kiam la I.L. estos jam plene akceptita — lingvo ekzotera — uzata de ĉiuj legipovaj homoj tra la tuta mondo. Mendebila ĉe Wre. Chandler.

“**Tornistro**”: literatura kajero kun artikoloj, poemoj, recenzoj, spiritaĵoj rakontoj ktp. 52 paĝoj. 20 steloj. Prof. Adan Hryniewicz, C. C. 58, Suc. 12, Buenos Aires.

### RECENZOTAJ

“**Judoj sen Mono**”: Michael Gold. G. Saviile. 200 paĝoj.

“**Roseroj**”: 49-paĝa melodiario de Ramona van Delsen. Ambau libroj de Dansk E-Forlag.

### “Plena Ilustrita Vortaro”

El la 5000 presitaj restas nun proks. mil; bonega rezulto por multekosta, sed tre valora verko.

### PRI VORTKUNMETO

Esperanto estas lingvo Latin-Germanida; ĝia vortstrukturo estas esence Germana, dum ĝia vortrezoro estas precipe Latina. En la lingvoj Germana, Angla, k.p.t. la vortstrukturo estas karakterizita per la kunmeto de vortoj, kaj tiu kunmeto estas faciligita per la fakto, ke preskaŭ ĉiuj ofte uzataj vortoj estas unu- aŭ dusilabaj (ekzemple: steam-ship, Welt-sprach-amt, Zucht-haus, k.t.p. Kontraŭe, en la Latinidaj lingvoj la kunmeto de vortoj estas preskaŭ nekonata, kaj la simplaj vortoj estas ordinare multsilabaj (ekzemple: bateau a vapeur, bureau de la langue mondiale, maison de correction, k.t.p.); sekve, se oni volas kunmeti vortojn Latinajn laŭ la modo Germana, oni devas unue mallongigi tiujn vortojn kiel eble plej. Tion Zamenhof tre bone komprenis, elektante la formon “nacio” prefere ol “naciono”, kiu estas malpli oportuna en kunmetita vorto (ekzemple: la vorto “nacilingve” estas pli malpeza kaj pli facile elparolebla ol “nacion-lingve”). Simile pri “adulti” anstataŭ “adulteri” — Rene de Saussure en “Teknika Revuo”, Jul.-Aug. 1918.

(Lat P.I.V. enhavas la vorton “adulteri” — en senco medicina. — Red.)

### ESPERANTO — ĈU FACILA ?

Oni povas lerni E-on laŭ tri niveloj de lingvo-akiro:

(1) Per simpla, elementa uzado hejma, strata, hotela, klubronda. Per ĉi oni povas orientiĝi en fremda lando, demandante de lokaj E-istoj pri loko de stacidomo, kosto de ĉambro k.s. kaj

cetere kun ili bone babili.

(2) Por **pasiva** ĝuo de verkoj — niveloj, esoj de E-aŭtoroj, se vi havas kapablon atingi proksimume al ilia pensnivelo. Sed nur tiel.

(3) Por **aktiva** uzado, verkante mem en bona stilo kaj havante iom vastan scion pri la literaturo kaj lingvo-evoluoj de E-o, Neniu homo plene posedas E-on. Ju pli li akiras scion pri ĝi, des pli li kon-kampo vastiĝas. Jaron post jaro oni devas klasifiki milojn da esprimoj, frazturniĝoj kaj apartaĵoj, kiujn Zamenhof uzis en sia verkado. Iom multajn formojn frutempe uzitajn de li, li poste rifuzis aŭ ŝanĝis, preferante aliajn. Tiu kompila laboro postulas fortan paciencon kaj dediĉon. Tiel ĝuste ni devas agi, se ni deziras efektive mastri kaj manipuli la lingvon laŭ ĝia mirinda esprimkapablo, ĝis plena potenco.

### LA PLEJLONGE DAŬRA E-KLUBO

“Almenaŭ laŭscie seninterrompe dum la plej longa tempo aktiva klubo, la Grupo Esperantista de Stokholmo festis sian 75-jaran jubileon”: — “La Espero” 1/74. Fondis ĝin en 1898 Paul Nylen.

Pri la **unue fondita** E-klubo, oni longe kaj detale diskutis, eĉ disputis. Estas firme atestite, ke tiu estis la Nurenberga E-klubo, fondita en 1888. “The A.E.” ne donas vastan spacon al la demando, ĉar por iom granda proporcio de la legantoj, nove-venintoj al la movado, tiu tempo ne estus interesa. Historiemuloj povas sin turni al: “Originala Verkaro”, p. 513 kaj apude, aliloke; “Historio de Esperanto” (Privat) kaj aliaj tiaj verkoj, ekz. de Zakrzewski kaj Drezen; “Omnibuso”, jan. ĝis okt., 1969. En “Nuntempa Bulgario”, nro 2, 1961, aperas tre detala pritrakto fare de A. Holzhaus.

### PRI ALIAJ LANDOJ . . . .

La unuaj E-grupoj fondiĝis en:

**Franĉujo:** Sub Beaufront, por-Esperanta nacilingve propaganda societo en 1898. Antaŭ tiu jaro ne aperas mencio de grupo. En 1900: Pariza grupo sub Moch.

**Britujo:** E-societo sub Rhodes kaj Ellis en Keighley (Jorkŝiro) en 1902. Sammonate (novembro), Londona grupo sub O'Connor. Ĝi estis nukleo de la influa Londona E. Klubo.

**Usono:** En Bostono sub J. Twombly, 1905; samjare grupoj en Nov-Jorko, Filadelfio k.a.

**Japanujo:** En Okayama, 1906, jaro de ekorganizado.

**Belgujo:** En Gilly (apud Charleoi) 1898, sub Blanjean. Frukto de paroladoj de C. Lemaire.

**Italujo:** En Napolo, 1903; samjare: Itala Societo por la Prop. de E.

**Svedujo:** En Upsalo 1891 sub Lundstrom.

**Norvegujo:** En Oslo 1906 sub H. Thomsen.

**Svislando:** Svisa E-Societo en 1902; laŭage le dua post la Franca. Unua grup-fondo — ne menciita.

**Aŭstralio:** En Melburno sub John Booth, 1905.

**Rusujo.** Jam en 1891 grupetoj en Moskvo, Saratovo k.a., sed nur en 1892 en Peterburgo oni sukcesis **legitimi** societeton "Espero". — Laŭ: "Enciklopedio de E-o."

### AŬSTRIA RADIOSERVO

Esperanta Fako ORF Aŭstria Radioservo forte deziras, ke Australianoj povu sendi al ĝi avizon pri ricevo de ĝia programo. Tiu avizo tre impresus. En 11 kaj 12 majo ĝi elsendis sonbendan raporton de Ralph Harry pri kulturaj rilatoj inter Aŭstralio kaj Aŭstrio.

Radi-amatoroj! Mi havas ondlongan liston de elsendoj Aŭstria, krome tekston de la parolado de S-ro Harry. Se ili utilis por vi, bv. peti ilin ĉe mi. La Radioserva adreso estas: ORF Auslandsdienst, P.O. Box 700, A-1041 Vienna.

### KIU ELTROVIS AŬSTRALION ?

Rex Gilroy, direktoro de muzeo de natura historio en N. S. Kimrujo, asertis ("Age", 8 junio) Ĉinaj kartografoj desegnis mapon de la norda parto de Aŭstralio antaŭ 2500 jaroj; du skafandristoj lastatempe trovis du Ĉinajn jonkojn el la 12-a jarcento P.K. apud Geraldton (Okc. Australio); Feneca monero bronza estis elfosita en 1967 "apud Gippsland", kaj ekzistas supozataj Egiptaj aŭ Semidaj rok-ĉizajoj apud Sidnejo.

Cu vere, ke ne-Eŭropanoj eltrovis Aŭstralion antaŭ Kapitano Cook (kuk)? Kial la gazetoj ne reliefigis tiujn sensaciajn eltrovojn?

### AN DIE FREUDE

"Song of Joy" (Schubert).

Nu, vi bone scias la arion, ĉu ne? Do kantu ĝin laŭ la traduko de Kalocsay en: "Eterna Bukedo", p. 113.

Goj! Fajrero belradia!

Elizea di-filin'!

Fajrebrie ni al via

Templo iras, preĝi vin . . .

La kompleta traduko okupas kvar paĝojn. Eldonita de "Literatura Mondo" en 1931, la libro bedaŭre nun estas malfacile havebla.

EDZINO raportis per voĉo pikanta: "Hodiaŭ mi estas duone mortinta!"

La edzo riproĉis severe-admone: "Ĉiame vi ĉion plenumas duone!"

De tablo al tablo la mastro sin ŝovis, Demandis la gastojn: "Nu, kiel vi trovis La ŝafo-kotleton?" Kaj tuj gastronomo Respondis: "Harzarde — sub eta terpomo"

Ce la entombigo de milionulo Ĉeestis vireto kun larma okulo. "Vi estas parenco?" tuj kelkaj esploras. Li diris: "Ne, ne ! — ja pro tio mi ploras . . . ."

Doktoro konkludis, el tub' da urino: "Jen bona novaĵo por vi, sinjorino!" "Fraŭlin!" ŝi korektis, sekece lakona. "Se tiel", li diris, "novaĵo . . malbona!" Poul Thorsen.

THE WIFE droned out in tones of lead:

"Today I'm feeling half-way dead". The husband snarled with bitter laugh: "Like you to do all things by half!"

The maitre d'hotel went round To ask the guest just how he found The cutlet. "It was found, head waiter, Hiding 'neath the small potato!"

A rich man's burying: at the grave-pit's side there stood a mourner, sad-faced, tearful-eyed. "Your kinsman, sir?" asked someone passing by. He answered: "No, alas. Because of that I cry".

The doctor beamed; now finished was the test.

"Here's news for you, **madame**, the very best!"

"**Mam'selle!** I beg you get my title right".

Purred he: "If so, alas, prepare yourself for fright".

— Trad. Robo.

### AMIKOJ, ALIGU GRUPON !

De tempo al tempo ni vidas nomojn/adresojn de E-istoj, kiuj per alilandaj E-organoj petas korespondadon ktp. Ni ne trovas iliajn nomojn en nia "Adresaro" de A.E.A. Cu valorus la penon ilin inviti, per letero aliĝi al ĵu Aŭst-ralia grupo?

# The Australian Esperantist



(Successor to *La Suda Kruco* and *La Rondo*)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.

Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Avenue, Rosanna, Vic. 3084  
Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.  
A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Rd., Lindfield, N.S.W., 2070  
Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.  
A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W., 2036.

N-ro 131 (211)

MELBURNO

Aŭgusto, 1974

## LA PSIKOLOGIO DE ESPERANTISTOJ

Ciuj sincera religiulo sin trovas en momentoj, kiam li demandas al si: Ĉu vere, sufiĉe firme, mi kredas al Dio, la baza principo de mia kredo? Tiel ankaŭ dediĉitaj E-istoj murmuris al si similan demandon: Ĉu vere mi firme kredas, ke Esperanto fine venkos? Tion ni povas supozi almenaŭ ĉe Eŭropaj kaj Aŭstraliaziazaj E-istoj; pri aliaj mondpartoj ni ĉi tie ne povas preparoli.

Estas certe, ke sen neŝancebla fido al E-o ili ne impresas kaj sukcese alfrontus la neesperantistojn kun kiuj ili diskutus ĝiajn perspektivojn.

Ĉu ne vere, ke iuj E-istoj kaŝas sian E-istecon antaŭ laborkolegoj, superuloj, eĉ ĉiutagaj konatoj, sen paroli pri la granda publiko? Por tiaj E-istoj estas malfacile subpremi timsenton antaŭ moketanta mieno aŭ forigi la senton, ke ili riskas esti rigardataj kiel iel strangulaj? Oni povas rimarki similan malvolon flanke de kelkaj Kristanoj paroli pri sia kredo; ankaŭ en aferoj politikaj. En Aŭstralio oni, ĝenerale, ne volas aŭ inklinas paroli pri sia partiana kredo, siaj politikaj konvinkoj, rigardante tiajn aferojn, kiel la religiajn, ekster la kampo de facile konvena preparolo. Tiel ne estas en Britujo, kie homoj kvazaŭ fiere elmontras sian politikan partianecon.

Ni revenu al la E-istoj. La menciita kaŝemo devenas de tio, ke ni vivas en medio, kie E-o estas ignorata, aŭ rigardata kun aŭ malestimo aŭ almenaŭ kun indiferente indulga rideto. Sekve, estas nature, ke meze de tiu moketema medio E-istoj okaze evitas alfrontojn kun nek-

redantoj, kaj la movado iĝas sekteca, tiel ricevante ankoraŭ pli da malestima sinteno de tiuj ekster ĝi.

Tiuj rimarkoj neniel tuŝas E-istojn, kiuj sentime invitas debatojn, diskutojn kun neesperantistoj, publike aŭ individue. Laŭda ekzemplo de tio estas la agado de E-istoj en N.S.K., kie en Mosman grupoj sub Prof-oj Robertson kaj Dunstan debatis pri: Ĉu Esperanto estos la Latino de Morgaŭ? (A.E. 6/72). Wre Chandler faris sondendon. Pri la timuloj la rimarkoj tamen havas aplikon. Se ni iras al batalo, konvinkite, ke la malamiko estas supera, nia malvenko estas certa.

Kion fari? Necesas konvinki per solidaj argumentoj, ke E-o estas unike valora. Tion ni povas fari nur per funda studado de la lingva fenomeno el teoria kaj praktika vidpunktoj. Por fariĝi vere efika por-Esperanta aganto, ne sufiĉas lerneti ĝin nur por turismumi aŭ kolekti bildkartojn, poŝtmarkojn k.t.p. La E-a aktivulo estas iu multe pli ol nura hobi-amanto, kolektanto. Li estas funda fakt-esploranto; okupas lin ĉiuj flankoj kaj aspektoj de la movado, pri kiuj ekzistas multaj bonaj libroj, revuoj kaj konsultaj verkoj.

Necesas prezenti E-on al la ekstera socio ne fanatike, sed ja firme, per argumentoj bazitaj sur faktoj — ne nebule idealismaj diroj aŭ komparoj prilingvaj, kiuj falus sur ŝtonan teron, memkompreneble pro la nescio aŭ malsimpatio de la kundiskutulo. Prefere ni turnu lin al tiu el la bonaj prezentoj de E-o eldonitaj en la Angla lingvo, ekz., la malkara fakto-kompilajo. "A First Foreign Language for All Mankind" (D-ro B. Cavanagh) havebla ĉe B.E.A.

Per ridinde mizeraj rimedoj ni batalas kontraŭ grandaj ŝtataparatoj, kiuj enverŝas milionojn da dolaroj ĉiujare por altrudi siajn lingvojn al homoj, tiel vastigante sian prestiĝon, kulturon kaj ekonomian forton. Kontraŭ tio nia nura forto konsistas en la justeco kaj plena taŭgeco de nia solvo, kaj ĝuste pro tio E-o sukcesas iom post iom ricevi agnoskon de objektivaj pensantoj. Tiun nian forton povas ekspluati nur E-istoj firme konvinkitaj pri sia lingvo kaj brave provantaj penetri la progresemaĵn tavolojn de nia socio. Nur homoj bone ekipitaj per scio kaj ĝisoste kredantaj al la soci-politika potencialo de E-o povas sentime alfronti ne nur la simplajn homojn, sed ankaŭ la klerulojn kaj filologojn, kiuj sidas en sia "ebura turo", cerbumante pri fosilioj de mortaj lingvoj sen kontakto kun la praktika lingvosituacio de la moderna mondo kaj ties sociaj sekvoj.

Kiel religiaj homoj sin turnas al la Biblio por inspiro, animforto, tiel la E-istoj devus sin turni al la Biblio de sia afero. El la konsisto de tiu E-a "Biblio" ni indiku valoran ĉapitron: la eseo de Zamenhof, "Esenco kaj Estonteco de la ideo de Lingvo Internacia". Li verkis ĝin ĉ. 1900, sub pseŭdonimo, kaj ĝi aperis unue en "La Fundamenta Krestomatio"; represita en "Originala Verkaro".

Kiel la frutempaj Kristanoj komence kredis al la baldaŭa fino de la mondo, aŭ la tiama mondsocio, kaj al la dua alveno de Kristo ĉe la kosma kulmino, tiel ankaŭ la frutempaj E-istoj, inkluzive Zamenhofon mem, kredis al la baldaŭa venko de E-o. Pri la unua kazo, ni legis en la Epistolo al la Tesalonikanoj kaj aliloke en la leteroj de Skta. Paŭlo. En la kazo de la fruaj E-istoj, ni rimarkas similan senton de urĝeco, de optimisma certeco pri venko proksima. La brila eseo de Zamenhof portas en si elementojn kondiĉitajn de la penso de tiu jam longe forpasinta tempo, la jaro 1900. Kaj hodiaŭ verŝajne ni ne plene akceptus ĉiun esprimon tie verkitan. Tamen, zorge ĝin leginte, oni rajtas akcepti la bazajn premisojn, konkludojn kaj antaŭdirojn pri la daŭra vivpovo kaj certa sorto de la lingvo Esperanto. Jen demando: Se Zamenhof jam vivus ĝis nia tempo hodiaŭ, ĉu li estus kontenta pri la situacio de E-o en la nuna mondo? Mi pensas, ke jes, ĉar lia tezo estas ankoraŭ baze valida, kaj la efektiva progreso de la lingvo de post ĝia apero antaŭ 84 jaroj, kaj 73 jaroj post lia verkado de tiu tezo, konfirmas tion. E-o restas la unusola vivpova kaj

fakte ekzistanta internacia lingvo. Elektro de nacia kiel internacia lingvo estas ankoraŭ tute malpraktika, ĉar tute malakceptebla por la ceteraj nacioj.

Tial, vi kaj mi, faru kiel la Kristanaj homfratoj, nome, nin turnu al la vivdonaj fontoj de nia kredo, por ke ni povu senti en ni la fere firman fidon, kiu estas necesega al kuraĝa alfronto — per taŭgaj formoj de argumento — ĉe inerciaj simpluloj, malestimantaj kleruloj kaj la sinceraj demandantoj. Simpatiaj interesatoj feliĉe plinombrigas, pro la kreskanta signifo de la lingvoj en nia interkomunika mondasocio. Per publika informado, per gazetartikoloj, debatoj, publikaĵaj paroladoj, ni ebligu al tiaj varbebluloj liberan kontakton kun la Movado kaj ilian eventualan eniron en ĝin.

Revene al nia ĉefa temo: Scio plus firma fido signifas: Potenco.

Ni streĉe studadu, eĉ kontraŭ malfaciloj. "Ad astra per ardua": per malfaciloj ni atingos la stelojn.

Por Esperanto devas ni gajradi la estimon —

Por tio tre necesas, ke ni venku propran timon.

Parolante kun mokantoj kaj kun homoj skeptikulaĵ.

Se mankas al ni firma fido, impresoj restos nulaj.

—Robo.

## "AKURATA"

Laŭ "Naŭlingva Etimologia Leksikono" (Bastien, 1950) la radiko estas Latina, Itala, Germana, Angla, Rusa kaj Nederlanda. Laŭ P.I.V. ĝi signifas: Plenumanta promeson, servon, devon k.s. precize en la difinita tempo, je la interkonsentita horo.

Latine: accuratus = prepared with care, studied, exact. Itala: accurato = accurate, diligent (punctual = puntuale). Angla: accurate = zorge farita. Germana: zorge farita. Rusa: akuratnij = akurateco, precizeco.

"Accuraat" ne troviĝas en la Nederlanda-Espa vortaro de H. C. Mees (1927), sed jes ja en tiu de Schidlof (poŝvortaro, 1926). Ambaŭ tradukas Ned. "prompt" per "akurata, senprokrasta".

En 1938 T. Jung skribis: "Eble Zamenhof iom malbonŝance elektis tiun vorton 'akurata' por esprimi 'punctually'. Ankaŭ en la Germana lingvo 'akkurat' = ĝusta, korekta, senerara, zorgeme farita, sed neniam 'punctually'. Pro tio la ofta eraroj!"

## AUSTRALIA KRONIKO

**SYDNEY:** 24/6: Ni bonvenigis S-inon Edna Jullie, vizitanton el Kvinlando. Fritz Mueller-Sorau informis, ke 20 ĉeestas komenculan klason en "Wesley Centre". Russ Baxter, sek-io de A.E.A., gastparolis informe pri La Monda Lingva Problemo, emfazante la egan koston de interpretado seslingva ĉe la U.N.O.

1/7: David Gould, nia kasisto, gvidis la programon. Antaŭe li petis, ke membroj venu preparitaj paroli proks. 5 minutojn pri La Mondo en la Jaro 2000. Diversidee parolis 13 anoj, improvizante aŭ legante laŭ teksto. Kvankam ili ne solvis gravajn problemojn, ili tamen profitis per utila ekzerco en E-a parolado.

8/7: Gastparolanto Les Scott, prez-o de la federacio de N.S.K. rakontis pri La Dua Parto de la Historio de mia Vivo. Li priskribis kiel li, kun aŭto ŝarĝita per varoj, ekiris al la urbeto West Wyalong, for 15 mejlojn, por starigi karieron komercan. Post tri monatoj li akiris butikon por lui. La komerco bone kreskis; li gajnis premiojn en du Stataj Vendistaj Konkursoj. Li poste akiris pli grandan butikon kun stabo deklpersona. Li vendis ĉiaspeciajn elektrajn apartojn kaj perantis por aerlinia servo al Sidnejo. Post 26 jaroj li vendis sian florantan komercon kaj dum sep jaroj konstruis kaj administris motelon kun bona sukceso. La motelo, "The True Blue" (West Wyalong) estas bone konata tra Aŭstralio pro mineja ŝakto kun vindlaso, kiun li konstruis. En 1970 li vendis la motelon, translokiĝis al Manly, lernis E-on kaj nun servas en la aferoj de la Movado.

15/7: Sonbendo de intervjuo de Wre Chandler pri E-o 9 julio per Radio 2UE. Wre imprese argumentis por E-o, emfazante ĝian simplecon kaj utilecon multkampan. Oni ne povas trograndigi la publican valoron de tiaspeca disvastigo. Volo Gueltling parolis pri: Procento, laŭ artikolo en "Germana E-Revuo", 7/56. Ŝajnas, ke se iu elmetas monon, eĉ je 5%, la kapitalo duobliĝos post 15 jaroj. Laŭ tio, se iu estus elmetinta eĉ nur unu Germanan pfenigon (proks. cendo) ĉe la komenco de la Kristana epoko, ĝi duobliĝadus 130 fojojn dum la jaroj ĝis 1950 kaj atingus la miregigan valoron de 58 milionoj da teraj globoj de oro! Se vi ne kredas tion, kalkulu por vi mem.—Gerald. (Sed kiel difini: globon de oro?—Red.)

**MANLY:** Ni celebris la 13-an naskiĝ-daton de la E-Klubo en Manly ĉe la

Muzika Halo, kiam preskaŭ 40 anoj ĝuis bongustan manĝaĵon kaj teatraĵon. Kun alta plezuro ni tie vidis nian tre okupatan prez-on, D-ron Kevin Smith, ankaŭ kelkajn malnovajn membrojn, kiujn ni ne ofte vidas. — K. Morrison. 17 julio.

(The above reports are the only ones I had on July 31, when I sent the copy to press.—Editor.)

### EL RUSA LETERO

En 22 majo mi sendis marpoŝtan leteron al Taŝkento (USSR) kaj ricevis respondon per flugletero 27 junio — do post nur iom pli ol monato. Mia amiko komentas:—

Rusujo estas lando de pli ol 100 popoloj por kiuj la problemoj de komuna lingvo estas jam de longe solvita per uzado de "tegmenta" lingvo — la Rusa —simile kiel en Usono, kie la Angla ludas tiun saman rolon por la multaj ne-Anglalingvanoj, kiuj migradis tien.

La Rusa ŝtato ne diferencas de la aliaj ŝtatoj en tio, kio koncernas E-on. Verdire, ĝi ne "gloras" Zamenhofon, nek efike, rekte subtenas E-on. Kiu ŝtato ĝin nun faris tion? Neniu. Sed ĉiu homo en Rusujo rajtas okupiĝi pri E-o, kaj multloke estas E-aj rondoj en kluboj, laborbrigadoj, kulturaj centroj kaj tendaroj. Eldoniĝis granda Rusa-Esp-a vortaro de Bokarev, krom aliaj E-ajoj.

La poŝto Rusa enlasas ĉiujn presaĵojn, kiuj ne enhavas pornografion, religian propagandon kaj antisovetismon.

La grandnacioj ne volas E-on, ĉar ĝia akcepto signifus perdon de ilia kultura, komerca kaj ideologia influo, kaj bremsus la disvastiĝon de ilia pli-malpli granda prestiĝo lingva. Il ĉitas la erarigan diron de iuj kleruloj, ke E-o estas artefarita kaj uzas tion kiel pretekston por rifuzi lingvan eksperimenton per E-o.

Tamen mia amiko forte kredas, ke kun la ŝanĝiĝo de registara politiko pri tiu au alia afero, ankaŭ en Rusujo oni donos al E-o la saman atenton kiel "oni nun faras en Bulgario, Hungario Vjetnamio kaj aliaj socialismaj landoj". —Red.

### "SMORGASBORD" ?

Kiel traduki tiun Svedan vorton? "memserva miksmanĝaĵo"? Ĉu iu havas Sved-Esperantan vortaron?

### NOMSANGO

La brita esperantista asocio nun estas- La brita esperanto-asocio.

## KIEL ESPERANTO TRIUMFOS ?

Bonvolu relegi la vortojn de S-ro Koppel sur p. 68, The A.E., sept. 1970, kaj la komenton sur p. 76, okt. samjare. Poste konsideru la sekvantan opinion de "Lingvistika Informa Servo", jan.-marto, 1974:

... La nombro de 16 milionoj da E-istoj, nomita inter aliaj de Prof-o Mario Pei, estas eble la aro da homoj, kiuj foje ekde la komenco de la jarcento okupiĝis pri E-o. El ili la plej multaj certe ne plu vivas. La E-organizajtoj havas apenaŭ pli ol 50,000 membrojn. Scias ion pri E-o ankoraŭ kelkcent miloj, kiuj ne plu volas esti organizitaj aŭ ĉesis okupiĝi pri E-o... Estas evidente, ke la opinio pri la sukceso de E-o nur el si mem ("de sube") estas tute senbaza, nerealeca. La malgranda aro de la E-istoj povos neniam havi por tio la personajn kaj financajn rimedojn".

Similan sintenon havas Werner Bornmann en sia granda verko: "Bona Sanco" (A.E., 11/71), ĉapitro 12. Li argumentas, ke estas tre malfacile, krei ĉirkaŭ E-o amasmovadon. La spertoj jam de la epoko de Zamenhof kaj lia "Unua Libro" ĝis la nuna situacio permesas konkludon, ke la oficiala enkonduko ĝenerala de E-o ne estas "de sube" atingebla. Li vidas la mondon de la akademiuloj kiel la malplej pene penetreblan, kaj kredas, ke la unua paŝo al venko estus oficiala "ŝtata diplomo" por instruistoj de E-o, kiuj servus je ĉiuj niveloj jam de elementa ĝis universitata. Tio donus al E-o la prestiĝon, la bonfamon, kiun ĝi meritas pro sia 90-jara historio.

(Do, daŭras la debato inter du pensokoloj: unu opinias, ke venko venos pro popol-amasa premo "de sube"; la dua, ke ĝi venos nur "de supre", per dekreto de progresemaj registaroj jam konvinkitaj kaj motivigitaj per favora atesto de akademias, sciencaj kaj teknikaj rondoj. —Red.)

## LA POEMOJ DE HEINE

En 1969 aperis "Kantoj kaj Romancoj", tradukita de Kalocsay kaj Waringhien, Eld. Stafeto, 380 paĝoj. Recenzo en "The A.E." 5/71. En 1973: "Verkoj de Heinrich Heine en Esperanto"; eldonita je kosto de la kompilinto, A. Holzhaus. Ĝi enhavas ankaŭ pli ol cent paĝojn da prozo Germana-Esperanta. Entute 317 paĝoj. Recenzo en "The A.E." 11/73 Mendebila ĉe A. Holzhaus, 2748 Orchard Lane, Columbus, Indiana U.S.A., 47201.

## LA NEKONATA ZAMENHOF

D-ro Zamenhof estis ne nur la aŭtoro de Esperanto; li estis elstara personeco, kies prezento jam de juneco faras al konanto fortan, daŭran impreson. Se homoj estas kontentaj rigardi lin nur kiel iniciatinton de mondlingvo, lia rimarkinda personeco restas por li nekonata.

Fakte, li strebis al ankoraŭ pli alta viv-aspiro, en kiun li enteksis jen politikajn jen religiajn elementojn. Politike li bazmetis principon: "En ĉiuj rilatoj kun sampopolaroj — la gepatra lingvo; en rilatoj interpopolaj — la monda help-lingvo". El tio sekvas: pliproksimigo de ĉiuj popoloj, kaj defendo de la lingvo kaj kulturo de malgrandaj nacioj!

Etike li penadis eduki homojn kaj popolojn en sintenon per kiu ili simpatie komprenus unu la alian, kultivante reciprokajn respekton. Lia celo estis religia en tio, ke li ĉiam fortostreĉis eduki homojn laŭ toleremo kaj interamo — por li la belaj floroj de ĉiu vere religia kredsistemo.

Guste koni Zamenhofon postulas pli ol scion pri lia lingvo kaj la E-movado mem; estas necese profundiĝi en liajn verkojn prozajn kaj poeziajn — ankaŭ en liajn leterojn. Jam gajninte per tio legantoj vidos en li grandan eminentan instruanton, kies novaj ideoj en la edukado estas taŭge kaj ĝuste taksataj nur en la lumo de lia propra personeco. Homo povas esti brila praktikanto de Esperanto kaj tamen resti sen la inspiro, la instigo, la spirita kunuleco kun ĝia unika eltrovinto.

## PRI ESPERANTA VETERANO

En 1966j., legante malnovan E-libron: "Esperantaj Prezajoj", kompilita de De Beaufront, 1902 — mi vidis tradukon el la Portugala faritan de Antonio Caetano "Miozoto" titolitan. Postete, per Brazila E-gazeto mi sciigis, ke li ankoraŭ vivas. E-isto jam de 1898, li mortis en 1970, aĝa pli ol 90 jarojn.—Farbo.

## LA KOMPARATIVO

Kiel tradukj: "The learned may occupy themselves with metaphysics, but simpler folk should have nothing to do with it". Ne per. Erudiciaj homoj povas sin okupi per metafiziko, sed pli simplaj homoj devus ĝin eviti. Prefere: . . . sed malpli kleraj homoj . . . ĉar "erudiciaj homoj" ne estas "simplaj". Do, la kompara formo tie ne estas ĝusta.

**PETO DE ALPRUNTINTO**

Miaj librojn amas mi tre kare:  
 Librojn amas ankaŭ certe vi.  
 Frazoj sur la majstraj paĝoj 'klare  
 Gvidas homojn al pli vasta sci'.  
 Librojn miajn do, amiko, legu  
 En paco, kaj kun kon-avida menso,  
 Tagine, kiam laca vi, sur seĝo,  
 Enpaŝas en la regiono de la Penso  
 Se jam vi legis la pruntitajn librojn,  
 Bonvolu ilin al mi nun adresi  
 Se pri aliaj sentas vi leg-vibrojn,  
 Mi ilin al vi sendos "flug-eksprese".

**OFICIALA INFORMILO****NOVAJ ANOJ:**

Ashcroft, F-ino H. Glen Waverley,  
 Vic.  
 Oliver, S-ro A. C., Orelia, W.A.  
 Kelliher, S-ro R., Como, W.A.  
 Loneragan, S-ro O. W., Bentley, W.A.  
 Bomford, F-ino N., Bendigo, Vic.  
 Leake, S-ino J. A., Wembley Downs,  
 W.A.  
 Felby, S-ro R., Pennington, S.A.  
 Lorenzo, S-ro P. de., Surry Hills,  
 N.S.W.

**DONACOJ:**

Oliver, S-ino E. C., Orelia, W.A. \$5  
 Kelliher, S-ro R., Como, W.A. \$7  
 Manly Esp-Klubo, Manly, N.S.W. \$10  
 Chifley, S-ro J., Bathurst, N.S.W. \$3  
 Brimage, S-ro G. W., Tarroona, Tas. \$2  
 —Russ Baxter, Sek., 10 Julio.

**SUR NEŬTRALA FUNDAMENTO**

Here is the spirit of Zamenhof in action: When we invite another E-ist to our home, we know that we have already shown mutual respect by meeting each other halfway lingually. We do not expect or require him to speak in our language, nor does he expect or require that we speak his. We stand on neutral ground lingually; neither of us is embarrassed or amused — as the case may be — by any errors the one or the other might make were we trying the language of the other. We are using a common speech, and any imperfections in its use by one or the other is passed over with sympathetic understanding.

**KOMPLETAJ KOLEKTOJ**

Laŭ nia kredo la kompletoj de nia gazeto: La Suda Kruco, La Rondo, kaj The Australian Esperantist — ĝiaj tri titoloj — estas konsulteblaj ĉe la Biblioteko de B.E.A. kaj espereble ankaŭ ĉe la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Per tio ni informas niajn alilandajn kolegojn kaj amikojn.

**A LENDER'S REQUEST.**

My books I cherish dearly;  
 You too love books, I'm sure.  
 The lessons gathered as you read  
 Teach all you want and more  
 So, friend, my books, read them in peace  
 When tired at end of day.  
 Just settle in an easy chair  
 And while an hour away.  
 But — if you've read the ones I lent,  
 Please send them back with care;  
 Then — if you wish to borrow more  
 I'll send them on by air.

—Tradukis D. M. Sinclair.

**LINGVOJ KOMPARATAJ (6)****La Angla.**

La vokaloj (1), kiuj havas mirigan varion, ne akordiĝas kun tiuj de kiu ajn Eŭropa lingvo. Ne ekzistas lingvo, kiun maturaĝa fremdulo trovas pli malfacila ĝuste prononci. Por la tutmonda rolo la prononca estas por la Angla la plejgranda obstaklo. Krome ĝia ortografio estas eĉ pli malfacila ol la Franca.

Alia malfacilo ĝia konsistas en tio, ke malgraŭ ĝia simpla gramatikō, ĝiaj frazarangoj, vortordo kaj maniero sin esprimi estas ofte karakterizataj de specialaj uzoj ĉe apartaj okazoj, pri kiuj la lernado estas longa kaj atentopostula. — Meillet ("La lingvoj de la Nova Eŭropo").

(1) Estas 52, kiuj estas inter si tre subtile nuanciĝaj. THE A.E., 5-6/61.

**RALPH HARRY****AKCEPTIS DIPLOMATOJN**

La 6-an de Junio nia ambasadoro en Bonn, S-ro Ralph Harry, akceptis en sia rezidejo cent ambasadorojn, unuajn, sekretariojn kaj kultur-ataŝeojn, por doni ĉi ili oportunun informiĝi pri la ĉi-jara Univ. Kongreso en Hamburgo kaj pri la evoluo de Esperanto ĝenerale.

U.E.A.-Prezidanto Prof. Ivo Lapenna kaj la prezidanto de la Kongresa Komitato, D-ro W. Bormann, paroladis antaŭ 30 diplomatoj. D-ro Bormann, akompanata de sia edzino, profitis sian restadon en Bonn por renkontiĝi kun Federacia Kanceliero de Germanujo, S-ro H. Schmidt, kaj ministeriaj funkciuloj informante ilin pri la Hamburga Kongreso.

**PRI RUDYARD KIPLING**

Liaj aŭtografoj havas altan valoron. Tial li volonte subskribis ĉekojn, kiam li devis pagi malgrandajn sumojn, kaj kontente konstatis, ke multaj posedantoj de liaj ĉekoj ne iris por postuli pagon de la sumoj ŝuldataj al ili.



## RECENZOJ

"Judoj sen Mono": Michael Gold. El la Angla tradukis George Saville. Represo 1974. 221 paĝoj. Eld. Dansk Esperanto-Forlag, Ingemannsvej 9, DK 8230, Abyhoj, Denmark. Prezo 25 Dan. kr.

Laŭ noto de la Literatura Komitato F.L.E. la verko unue aperis iam inter 1940-45. La aŭtoro supozinde estas "Mike Gold", konata en la 1930-aj jaroj kiel Usona marksisto, kiu kontribudis al "The New Masses" kaj aliaj proletecaj periodaĵoj. Sur p. 202 la patro de la juna "heroo" estas nomata Gold, kaj la fina, batalvoka, paragrafo konfirmas senton, ke almenaŭ iom de la enhavo estas aŭtobiografia.

La rakonto estas intense interesa pri-skribo de la vivo de malriĉaj Judoj en la East-Side de Nov-Jorko, kvartalaŝa fandpoto en kiu suferas diversaj migrantoj el la cetera mondoparto. Tiu anim-detrua vivaĉado estas detale vort-pentrita en maniero ebla nur por homo ĝin intime spertinta. Abundas vort-miniaturaj satiraj, komikaj, doloraj, naŭzaj . . . ĉiam humanecaj, simpatiaj.

La libro teme, etose, similas al la verko: "Tur-Strato 4" (Weinghengst, 1934), tradukita de Bartelmes, al kiu Georgo Saville dediĉis la nune recen-zatan.

214: El la listo de 40 neologismoj en en P.V., 22 el ili troviĝas en P.I.V. kun jenaj modifoj: ĝigo (PIV: ĵigo); kopuli (PIV: kopulacii); paŭpero (en PIV nur "paŭperismo"); puf (PIV: esprimas falon; sinonimo de "pum").

216: Jack the Ripper murdis ne infanojn, sed prostituitinojn — almenaŭ kvin. Estas mirige, ke eĉ la Angla-lingva komitatano kontrolinta la tekston de la unua eldono ne rimarkis tiun eraron, kiu ankoraŭ makulas la nunan eldonon.

100, 128, 209: Kio signifas "fibrila"? Ne en PIV. 36: "kaforekremento", "supostoj"? 191: ". . . legis libron de Henty". Tio bezonas noton. Temas pri G. A. Henty (1832-1902) verkisto de por-knabaj aventurolibroj.

"Li neniam trovis amikan vorton por iu ajn" (. . . diris, voĉis, . . . al iu ajn); 124: "La plej maljuna frato de mia . . . (la plej aĝa . . .)"; "183: 'manoj odoraciis laŭ la sango' (. . . pro la sango). 218 (sub proksimumaj prononcoj) "Katz —Kats". Kial ne "Kac"? kaj "Kravic", "Hercl", "Moskovic"?

"Roseroj". Ramona van Dalsem. Melodioj kaj Tekstoj. 48 paĝoj. Ed. Dansk Esperanto-Forlag. 12 Danaj kr.

12 kantoj kun muziknotoj. Antaŭ ok jaroj aperis ŝia unua libreto de melodioj sub titolo "Simplaj Floroj". Sukceson ĝi havis; ankoraŭ oni kelklande uzas ĝin kiel valoran suplementon al sia reper-tuaro. Ŝia dua libreto meritas tiun saman sorton — ke ankaŭ ĝiaj kantoj plezurigu la korojn de miloj.

La kvaliton de ŝia voĉo povas aprezi la multaj posedantoj de ŝiaj diskoj. Ĉe niaj mondkongresoj ŝia trilanta kantotokapablo ricevu aplaŭdon de miloj jam familiaraj kun ŝia ĉarma muziko.

La eldonaĵo estas klare presita, formate neta, firme broŝurita, nur la mal-granda prestiĝo estas iom ĝena.

### LA PATRO NIA

S. Simenov en "Dia Regno" 1/74 atentigas, ke la Esperanta frazo: "Fariĝu via volo, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero" havas du sencojn: (a) Via volo estu ne nur sur la tero, sed ankaŭ en la ĉielo. (b) Via volo (tia, kia ĝi estas en la ĉielo) estu ankaŭ sur la tero.

La Angla traduko estas klara, pro tio, ke la tradukintoj aldonis la vortojn "it is" kiuj mankas al la Greka originalo.

D-ro W. J. Downes komentis, ke la dusenceco troviĝas en la Greka, kiun la Vulgato kaj multaj nacilingvaj Biblioj fidele sekvis; tamen tra la jarcentoj homoj bone komprenis la inten-citan signifon. Li proponas kiel ĝustan tradukon: Farata estu via volo sur la tero, kiel ĝi estas en la ĉielo.

### VINTRO

Lamentas arboj kaj ĉielen levas  
Skeletajn branĉojn kvazaŭ je pet-preĝo  
Respondon ili el ĉiel' ricevas:  
Ilian nudon vestas mola neĝo

La flokoj fal-faladas jam senĉese,  
Sur kampoj tolon brile-blankan formas  
De neĝ' ĝlimanta, milde kaj karese,  
Dum la Natur', por refortiĝo, dormas.

La arboj dormas; mutas ĉio tera . . .  
Aspekton mortan la pejzaĝo portas;  
Sed nevideble agas fort' ĝenera;  
Naskiĝas nova viv' — malnova mortas.

Alternas nasko kaj kreiva morto . . .  
Semetoj ĝermas, velkaj beroj falas.  
Vekiĝas la mortint' kun freŝa forto:  
La Viv-Princip' en ĉio ben-egalas  
—Farbo.

## EPITETOJ

Kiel en la Angla lingvo, tiel ankaŭ en E-o oni emas uzi superfluaĵajn vortojn por esprimi sencon jam memevidentan aŭ supozatan sen uzo de epiteto. Menciante vespermanĝon, oni senescepte nomas ĝin "bongusta"; parolado ricevas la nebulan epiteton "interesa"; ĉiuj lumbildoj estas "belaj"; ia nia sukceseto estas "brila"; ĉiu klubega ludo estas "amuzaj"; societaj kunvenoj estas "gajaj", "ĝuaj", "ĝuindaj" aŭ "ĝuplenaj". Parolante pri ne-alestanta E-amiko, oni nomas lin "fidela" aŭ "fervora" — fakto konata de ĉiuj aŭdantoj. Iu bonulo instruas E-on en "diversaj" lernejoj, kvankam tiuj lokoj povas esti samspecaj instruejoj, ne malsamspecaj. Kaj jam de longe la vorto "tre" perdis sian signifon.

Estas bone, ellasi tiajn gurditajn epitetojn, aŭ, je neceso, streĉi la menson por trovi vortojn kun pli impresa, senchava forto.

## KRIZOJ EN ESPERANTUJO

Kiam Zamenhof decidis en 1887 "transiri la Rubikonon", li metis sur la hazardon sian karieron kiel kuracisto. Ĉu la publiko rigardos lin kiel frezenulon?

En 1891 la ununura E-gazeto preskaŭ mortis post trijara eldonado. Ĝi saviĝis per helpo de Trompeter, kiu garantiis ĝin por tri jaroj. (Vidu biografion far A. Holzhaus; 1971; "British E-ist"; feb. 1972).

En 1894 reforma skismo minacis la movadon. Baloto rifuzis ŝanĝojn en la lingvo; la krizo pasis.

En 1907 venis kriza skismo pro la projekto Ido, "reformita Esperanto". Post iom da komenca sukceso Ido perdis impeton kaj iris al sia morto. Estas signife, ke dum preskaŭ 20% da E-ĝvidantoj aliĝis al Ido, el la amaso da E-istoj nur apenaŭ 3-4% tiel faris. Ili fidele restis al la Fundamento kaj laŭ ĝi laboradis. La tempo jam konfirmis ilian saĝecon.

La mondmilito 1914-18 kaj la morto de Zamenhof en 1917. Malgraŭ la kataklismo kaj lia morto, E-o transvivis la doloran situacion. Vico da talentuloj enspiris forton en la movadon.

En 1939-45: la Dua Mondmilito kaj malpermeso de E-o en Germanujo kaj Rusujo. Sekvis interalie ankaŭ aliaj gravaj batoj: ĉeso de nia centra kaj ĉefa libro-eldonejo en Budapeŝto, kiu dum 1931-38 eldonis 87 librojn. En 1951 Juan Regulo Perez komencis eldoni la jam pli ol 100 volumojn kaj ankoraŭ

esperas eldonadi.

Oni povas aldoni al tiu listo de krizoj kaj solvoj. Venos ankoraŭ pli, sed la senmorta spirito de dediĉitaj homoj nepre ilin venkos.

## MISA LINGVOUZADO

En eventuala komisiono por ekzameni la kapablon de E-o, ludos gravan rolon ĝuste la teorio kaj praktiko de preciza, klarsenca lingvouzo. E-o devas prezenti definitivan ateston, ke ĝi povas redoni la puran signifon de ĉia nocio; Bedaŭrinde, svarmas en nia literaturo ĉiaspeca vortoj missime uzataj, ĉefe pro influoj nacilingvaj. Niaj kontraŭuloj je tia komisiono en tia okazo certe montrus al tiu forta difekto, kiu kaŭzas erarigajn impresojn ĉe legantoj. Povas ja esti, ke tiu aspekto de nia lingvouzo prezentas la plej gravan danĝeron al akcepto de E-o fare de tia komisiono. Tre ofte oni devas konsulti Francan, Germanan, Hispanan vortaron, por kompreni kion volas signifi E-istoj, kies gepatra estas unu el la menciitaj.

Skeldido en "Sennaciulo" konfirme "konstatas tendencon — sendube pro nacilingva influo — uzi vorton por esprimi du malsamajn signifojn, malgraŭ ke E-o proponas la necesajn du terminojn; ekzemple, ni legas **permesi**, uzita kun la senco **ebligi** . . . Oni uzu **permesi** kiam temas pri . . . **permeso**, sed ne kiam temas pri **ebleco**. Se tiu senzorga tendenco pli daŭros, oni certe povos iam riproĉi al E-o, ke ĝi ne estas tiel preciza, kiel iu aŭ alia lingvo nacia, pri iu aŭ alia punkto".

Do, ne uzu "permesas", tradukante: "Such a contrivance permits entry of the desired quantity". Jen unu ekzemplo el miloj.

## TRO-SPICA PUBLICO . . .

En "Sunday Mirror" (Sidnejo), feb. 10, oni legas, ke "The Australian Esperanto Association estimates that about 12,000 Australians are fluent in the language (Esperanto)"; krome, ke "800 students graduated last year". Verdire, forigo de la fina nulo ĉe ambaŭ ciferoj pliproksime informus pri la fakta aferstato. — Red.

## EMILE GASSE

Li mortis en marto, 93-jara. E-isto jam de 1900 aŭ 1901, li tradukis: "Eŭgenino Grandet" (Balzac) kaj "La Vivo de Jesuo" (Renan). Li partoprenis la Unuan E-Kongreson en 1905. Ĉu ankoraŭ vivas homoj, kiuj alestis tiun Kongreson?

## PRI LINGVO-LERNADO

E-istoj aprobas lernadon de fremdaj lingvoj, kiel utilan okupon; krome ili atentigas pri la helpo, kiun E-o povas doni en tiu lernado. Tamen, lingvoj estas nur rimedo, ne la fincelo de edukado. Kapablo esprimi la saman aferon en diversaj lingvoj ne per si mem indikas eksterordinaran mensopovon aŭ superan intelekton. Male, ju pli da tempo oni dediĉas al lingvo-lernado, des malpli oni havas tempon por studi pozitivajn sci-fakojn. Pri tio D.P. Boatman tradukis versaĵon de Samuel Butler (1612-1680):

Kiu pri multaj lingvoj diligentas,  
Des pli aliajn sciojn malatentas;  
Kaj ĝuste ĉar li tiucele ŝvitas,  
Pro tio aliflanke malprofitas.  
Hebreaj skriboj kaj maldekstren  
iras,

Kaj same mensojn malantaŭen tiras.  
Igante ilin tute malprogresaj,  
Ĉar pri ceteraj studoj nesukcesaj.  
Se, tamen, iu sensencaĵon diras  
En pluraj lingvoj, nu — la homoj  
miras!

Kaj kvankam lia scio estas nulo,  
Admiras lin, kaj kredas lin saĝulo.

## MANKO DE RIMOJ

La Angla lingvo estas malriĉa je rimrimedoj. Almenaŭ 6000 vortoj ne trovas rimon, malgraŭ ke multo el ili estas tre poeziecaj. Kelkaj havas nur unu: ekz-e, "babe" (astrolabel!) Sekve tial oni preskaŭ neeviteble rimas: strength — length; breath — death; wealth — stealth; jollity — frivolity; mountains — fountains; frigid — rigid; strife — life; roam — home (foam); breast — rest; arms — charms; heart — smart k.t.p.

En Esperanto estas multaj nerimeblaj radikoj — el ili kelkaj, kiujn poetoj bezonas, sed ne povas uzi:— monah', haladz', fajf', majstr', akv', falĉ', ambl', Angl', marŝ', taŭg', ŝaŭm', hejm', edz', fremd', venĝ', bird', ĉirp', kirl', dolĉ', song', korv', bukl', ŝultr', simpl', himn'. Help' (nur felp!); regn' (nur desegn'). En "La Rondo" 9/56 troviĝas amuza poemeto tiutema. Vidu ankaŭ: "Esperanto", 9/55 p. 250; 12/61, p. 209; "British E-ist", 1/52, p. 131; 7/22, p. 82; "The A.E.", 7/73, p. 13.

## LIBERA JE (aŭ) DE?

Per ĝenerala akcepto de la jena sugesto, oni povus utile distingi inter JE kaj DE post 'liber', ekz., "liberigo de (aŭ, el) la volo, povo, potenco DE

io; kaj JE indiku absolutan liberon, t.e. ke io **neniam** estis karakterizata de ia mallibereco.

(a) Esperanto estas libera JE ĉiuj esceptoj (E-o **neniam** havis esceptojn).

Lia spirito estis libera JE antaŭjuĝoj.

La varo estas libera JE doganpagoj.

(b) Li nun estas libera DE sia peko (Li pekis, sed nun estas libera DE tiu peko).

Lia dorso estas jam libera DE tiu ŝarĝo.

Per tio, stilisto povus delikate nuanĉigi sian lingvaĵon, kaj konscia elekto de unu aŭ la alia prepozicio pli kapablus la lingvon mem

## YOUTH HOSTELS

### (Restejoj por Junuloj)

Estas 70 en Aŭstralio; pli ol 4200 tra la mondo. Iliaj normoj varias, sed principe ili ĉiuj celas helpi vin vojaĝi kaj renkonti homojn samcelajn — nemultkoste. Ili provizas la bazajn objektojn kaj servojn por viroj kaj virinoj.

Ĉiu nacia asocio eldonas sian propran manlibron. Aŭstralianoj povas aliĝi nur al sia landa sekcio. La Internacia Junulara Federacio eldonas tutmondan manlibron.

Tranoktaj pagoj ĉe la ejoj varias jam de 30c. ĝis dolaro; en Eŭropo, meze je 63c. Matenmanĝo provizata ĉ. 40c; vespermanĝo 70c.

Interesatoj sin turnu al la adresoj de Youth Hostels Assn. (telefonlibro) en sia ŝtato.

## EL "HAMLETO"

"I have been sexton here, man and boy, thirty years". Akto 5, Sc. 1.

"... mi jam tridek jarojn estas tombisto" (Zamenhofa traduko, p. 149).

"Kiel viro kaj knabo, jam tridek jarojn mi estas tombisto" (traduko de Newell, p. 192).

Pri la tiea uzo de "estas", William Bailey komentas en "B.E." jan.-feb., 1942: — De tempo al tempo oni demandis: "Kial 'estas' ? Kial ne 'estis'?"

Laŭ mia opinio la respondo devas esti jena:—la tombisto diris 'estas', ĉar en tiu sama momento, kiam li parolis, li efektive fosis tombon. Se li estus eĉ pli babilema, li kredeble dirus: "mi jam tridek jarojn estis tombisto, kaj, kiel vi vidas, sinjoro, mi ankoraŭ min okupas per tiu sama laboro". Tamen lia simpla diro sufiĉis; post ekŝigo li povus ripeti ĝin, sed kun "estis" anstataŭ 'estas'.

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Krucio and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



Redakcio: "Esperanto", Box 2122 T., G.P.O. Melbourne, 3001, Aŭstralio

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Rd., Lindfield, N.S.W., 2070

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W., 2036.

N-ro 134 (214)

MELBOURNE

Novembro, 1974


## FIRST PACIFIC ESPERANTO CONGRESS

4-10 JANUARY, 1976

## 20th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

2-4 JANUARY, 1976

Queens College, Melbourne University.



An interior view of the imposing Dining Hall of Queens College, where also the Congress Banquet will take place.

Congress Fee before 1st July, 1975: \$9.50, Pensioners, Students, \$5. After 1/7/1975: \$11, Pensioners, Students, \$6.

Send your room reservations (\$10 Deposit) and Congress Fee to "ESPERANTO CONGRESS", Box 2122 T., G.P.O. Melbourne, 3001 and enclose stamped, addressed envelope for your receipt.

### Second List of Congress Members:

19. Mr. R. Brittain, Perth.
20. Mr. S. J. Campbell, Walgett, NSW
21. Miss S. L. Boston, Sydney.
22. Miss M. Sanders, Melbourne.
23. Mrs. M. Sanders, Melbourne
24. Miss V. Strachan, Melbourne
25. Mrs. D. Sinclair, Caloundra, Q'ld.
26. Dr. A. Einihovici, Perth.
27. Mrs. I. Einihovici, Perth.
28. Mr. E. W. Chandler, Sydney
29. Miss D. Hasluck, Sydney.
30. Mrs. M. Gibson, Auckland, N.Z.
31. Mrs. E. Strawbridge, Kingscote, S.A.
32. Mrs. D. Wooldridge, Kingscote, S.A.

State Distribution: Vic. 16; N.S.W. 8; W.A. 3; S.A. 3; Q'ld. 1; N.Z. 1.

Mr. Robert Brittain of Nedlands, the first West Australian; Mrs. Doris Sinclair of Caloundra, the first Queenslander and Mrs. Mavis Gibson of Auckland, the first New Zealander, will receive a small book prize at the Welcome Evening of the Congress. Who will be the first Tasmanian.

## A.E.A. OFICIALA INFORMILO

## Novaj Anoj:

Madalena, S-ro D. J. Kirrawee, NSW  
 Isaac, S-ro G., Croydon, Vic.  
 Corner, F-ino J., Glendalough, WA  
 Elliott, S-ro H. W., Wagga Wagga,  
 NSW.

Clugston, S-ino M. F., Springwood,  
 NSW.

## Donacoj por la nova Fratuleco:

McKenzie, S-ro E., Warrandyte,  
 Vic. \$25.00  
 Cohen, S-ro H. M., Preston, Vic. \$25.00  
 —Russ Baxter, Sek., 1 Okt. 74

## LA KONSTRUAJO

(Fantazio)

Eble vi ne konsiderus ĝin tute konkreta afero. Oni devas ĝin vidi laŭ aparta maniero, sub apartaj cirkonstancoj. Kelkaj tute ne povas ĝin vidi. Vi devas kompreni, ke ĝi ne estas senviva amaso da ŝtonoj kaj signifiĝa ligno. Ĝi estas vivanta afero.

Kiam vi eniras, vi aŭdas sonon — kvazaŭan ĉanton de ia grandioza poemo. Aŭskultu sufiĉe longe, kaj vi ekscios, ke ĝi konsistas el la batado de homaj koroj kaj la sennoma muziko de homaj animoj — se vi havos la ĝustajn orelojn por aŭdi. Se vi havos la ĝustajn okulojn por vidi, vi baldaŭ vidos la templon mem — ekaperantan misteron el multaj formoj kaj ombroj etendiĝanta ekde la planko tute ĝis la kupolo — la verkon de neniu ordinara konstruanto.

La kolonoj staras, kiel la muskolaj torsoj de herooj; la dolĉa karno de viroj kaj virinoj estas muldita ĉirkaŭ ĝiaj reparaĵoj fortaj kaj nemoveblaj la vizaĝoj de feliĉaj infanoj ridetas el ĉiu voluto, la imponaj etendiĝoj de ĝiaj arkoj estas la interkroĉiĝantaj manoj de kamaradoj; kaj supre en la altaĵoj estas enskribitaj la sennombraj meditoj de ĉiuj revantoj de la mondo. Ĝi ankoraŭ konstruiĝas — konstruiĝas kaj surkonstruiĝas.

Foje la laboro daŭras en tuta mallumo, foje en blinda brileco; jen sub la ŝarĝo de nepriskribebla angoro, jen kun la sono de gaja ridado kaj tondra akklamado. Foje dum la silenta nokto oni povas aŭdi la etan sonon de la martelado far la kamaradoj laborantaj en la supra de la kupolo — la kamaradoj, kiuj tien grimpis en antaŭa tempo.

El la angla tradukis Ken G. Linton.

Si: Min vi tre kolerigis ĉi matene en la preĝejo. Dum la "Patro Nia" ĉe la vortoj: "Kaj liberigu nin de la malbono" vi rekte rigardis min.

## NIA GAST — ARTIKOLO

De tempo al tempo, laŭ ricevo, ni aperigos Gast-Artikolojn de transmaraj Esperantistoj. Jen la unua de Prof. D-ro Ivo Lapenna, kiu kaptis la oportunon klarigi siajn vidpunktojn:

## Kial mi ekŝiĝis

Kiel mi klarigis al la kongresanaro dum la adiaŭa parolado, la kaŭzoj de mia kompleta ekŝiĝo el ĉiuj funkcioj en UEA kaj rezigno pri honora membreco kaj en UEA kaj en TEJO, estas **principaj kaj personaj**.

La ĉefa **principa kaŭzo de la ekŝiĝo** estas la kruda malobservo de neŭtraleco, kio siavice estas ligita al aliaj, same krudaj malobservoj de la Statuto de UEA. La malobservado de neŭtraleco fare de la gvidantoj de la aliĝintaj asocioj Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Pollando havas longan historion. Tri aspektoj estas distingindaj: (1-e) malobservadoj interne de la menciitaj organizaĵoj, kio estis iel akceptebla pro la politika reĝimo en ili, kaj kio ne tuŝis rekte la neŭtralecon de UEA; (2-e) malobservadoj tra la t.n. Mondpaca E-Movado (MEM), kio estis iel tolerebla, ĉar la antaŭaj estraroj de UEA povis ĉiam pruvi, ke MEM ne estas UEA, kiam ajn MEM per siaj politikaj kunvenoj kaj rezolucioj en la universalaj kongresoj kaŭzis ĝenojn interne de la Asocio kaj gravajn malfacilaĵojn antaŭ la aŭtoritatoj; (3-e) malobservadoj fare de TEJO, kies maldekstrula estraro de la lastaj jaroj, "elektita" surbaze de blufaj membrociferoj, faris grandan nombron da pure politikaj elpaŝoj kaj establis intimajn rilatojn kun ekstreme maldekstraj politikaj organizaĵoj — kaj tio neniel plu estis tolerebla, ĉar ĝi plej serioze kompromitis la neŭtralecon de UEA. Tiun konscian kontraŭneŭtraleman agadon mi firme kontraŭstras. Tial mi fariĝis la faligenda "bastiono de neŭtraleco" por uzi ilian propran esprimon.

En decembro 1973 kaj komence de 1974 mi eksciis, ke la gvidantoj de la menciitaj 4 landaj asocioj, helpataj de pluraj estraranoj kaj estintaj membroj de TEJO, planas novan atencon kontraŭ la neŭtralecon, ĉi-foje rekte kontraŭ la neŭtralecon de UEA. En tiaj kondiĉoj mi opinis, ke estas mia devo informi la membraron pri la danĝero, kaj mi faris tion en la aprila "Esperanto". Laŭ la jam bone eltrovita taktiko en difinita tipo de politikaj sistemoj, por detru ian "danĝeran" idearon, en la kazo de UEA la idearon liĝitan al principoj de neŭtraleco kaj domokrateco,

ne sufiĉas nur sisteme atakadi la idearon ("mucida neŭtraleco"), "kadavro" ktp.), sed ankaŭ senskrupule nigrigadi ĝiajn ĉefajn protagonistojn, en nia kazo unuavice min mem, Aldone, la taktiko postulas misuzon de ĉiuj homaj malfortoj (ekzemple blovitaj ambicioj, envioj kaj jaluzoj), de personaj amikecoj, eĉ de familiaj ligoj en medioj gajnotaj por atingi celon, Precize kiel antaŭvidite en la aprila artikolo, ĉio-ĉi fakte okazis. La du ĉefaj centroj de la komploto — tiu de la 4 orient-eŭropaj asocioj, gvidata de komitatano Aleksiev, kaj tiu de la sekreta kunveno en Kassel — apogitaj de ambiciaj aliancanoj en kelkaj aliaj landoj, intensigis sian kampanjon de intrigoj kaj kalumnioj per pliaj artikoloj en "HEROLDO" (tuta paĝo en la n-ro de 1-a de julio), la "Brita Esperantisto (groteskaj atakoj, inkluzive la plej groteskan komparon de mi kun Beaufront, en la maja-junia kaj julia-aŭgusta n-ro) kaj 1-2 aliaj periodaĵoj; per pliaj amasaj cirkuleroj de U. J. Moritz, E. J. Woessink, T. Boersma, k.s.; per pliaj sekretaj kunvenoj, el kiuj la lasta okazis en Orienta Berlino senpere antaŭ la hamburga kongreso. Ampleksa dokumentaro, inkluzive pliajn aŭtentikajn informojn ricevitajn el Orienta Eŭropo post la kongreso, baldaŭ aperos. Ĉi-tie sufiĉas nur mencii, ke la nova, tute politika programo de Bulgara E-Asocio aperte forjetas la principon de neŭtraleco kaj anstataŭe postulas la aplikon de t.n. "proleta" internaciismo."

En tiaj kondiĉoj okazis la "elektoj" ĉe komitatanoj C fare de la 49 komitatanoj A kaj B. La bloko de komitatanoj el la 4 orienteŭropaj landoj (18) kaj de iliaj samopiniantoj el aliaj landoj (4) plus kelkaj, kiuj aliĝis al la bloko pro aliaj motivoj, havis absolutan plimulton kaj laŭplaĉe elektis "siajn homojn", el ili tri (U. Moritz, P. Luin kaj R. Triolle) estis klare forjetitaj en la elektoj de komitatanoj B, almenaŭ 3 devus esti eksigitaj el kiu ajn kultura organizaĵo, dum la aliaj, kun 2-3 esceptoj, apenaŭ havas iajn meritojn por la Asocio. Tiel kreiĝis en la Komitato artefarita plimulto, kiu ne nur ne spegulas, sed rekte kontraŭas la starpunkton de la grandega plimulto de la membraro, kiel tion evidente montras la rezultoj de la elektoj de komitatanoj B, la kortuŝaj manifestacioj okaze de mia adiaŭa parolado kaj multnombraj aliaj signoj de apogo. La fakto, ke la supera organo de UEA ne kondamnis — kaj kun tia plimulto evidente ne povis kondamni sen kondamni sin mem — lanauzajn nigriĝojn de mia homo, estas la **persona** kaŭzo de la

eksiĝo. La postaj laŭdoj, la formalaj promesoj pri daŭrigo de mia linio — cetere, jam dementitaj per la unuaj decidoj de la nova Estraro — kaj rezolucioj pri neŭtraleco fare de tiuj, kiuj krude malobservis ĝin, povas, eble, plu blindigadi naivulojn, sed ne povas ŝanĝi la bedaŭrindan realaĵon.

Kun koraj salutoj al la Aŭstralia esperantistaro, sincere via,

D-ro. Ivo Lapenna.

## AŬSTRALIA= =KRONIKO

**PERTH:** 28/8 Ceestis 20 membroj por bonvenigi gaston, Sro Hawley el Sudafriko, kiu vizitas parencojn en Perth. Sro Hawley, iama prezidanto de la E-grupo en Johannesburg, iom rakontis pri la movado en tiu regiono. Car li nun loĝas 60mejlojn for de J. li ne plu povas aktive partopreni en la klubaj aktivecoj. Li petis informojn pri malnova amiko, Sro E. Woodruff. Samvespere la prezidanto voĉlegis amuzan poemon senditan al Jack Hawks de plumamiko; Jim Mazza kaj Droj Caldera kaj Einihovici mallonge diskutis la demandon "Ĉu ni sufiĉon faras por la E-junularo"; Ruth McGrath iom rakontis pri la unua Aŭstralia E-Kongreso en Adelaide, 1911, kaj Idyss Einihovici regaligis nin per bongusta manĝeto.

11/9. La kunveno komenciĝis per omaĝo al la memoro de S-ro. F. R. Banham. Poste, Jessie Gray demandis nin pri vojaĝado kaj ni sciiĝis interalie pri la biciklaj vojaĝoj de la energia familio Dean en Anglujo, antaŭ ol ili translokiĝis al Aŭstralio. Kvankam ni ĉiuj jam sciis pri du-personaj bicikloj, tri-persona biciklo estis por la plejmulto io nekonata, kaj certe ne ĝuste nomebla bi(du) ciklo.

Olive Hunt raportis, ke bedaŭrinde pro manko de partopreno la anoncita E-kurso ĉe Midland, sub aŭspico de la Fako por Teknika Edukado estas nuligita. Klubanoj tamen ĝojis sciiĝi ke la kurso ĉe Floreat Elementa Lernejo tre vige daŭras kun du lecionoj semajne.

W. Illingworth legis al ni tre interesajn leterojn kiujn li ricevis de iama Nederlanda korespondanto. Ili klare kaj dramece bildigis al ni la timojn kaj suferojn de la dummilita Nazia okupado de Nederlando.

25/9 Ĉeestis nur 8 personoj, ĉar estis ferio, sed malgraŭ (aŭ eble pro) tiu fakto la kunveno estis tre vigla kaj ĝuinda. Ĉefero estis streĉa rakonto de Jack Hawks pri serĉado en malluma, ŝlima puto. Ni ĉiuj devis partopreni en tradukado, jen el Esperanto anglan, jen el la angla en Esperanton. La rakonto atingis harstarigan klimakson kaj — punkto! La aŭtoro rifuzis liveri la finon. Tion ni devis mem inventi. Ni ankaŭ partoprenis en la voĉlegado de kelkaj pli-malpli ĉastaj limerikoj de Raymond Schwartz kaj finis la kunvenon per provo kanti laŭ ne tre sukcesa akompano kiun oni, sub influo de Schwartz karakterizis jene:—

“Virino nesaga en Perto  
muzikas kunvene sen lerto.  
Se spiro sufiĉas  
bekflute ŝi kriĉas —  
kio tedas klubanojn en Perto.”

En la kunveno 9/10 oni diskutis diversajn klubaferojn kaj helpe (aŭ malhelpe!) de la ĉeestantoj la sekretario, Bill Howard, preparis saluttelegramon por alsendo al la malferma kunsido de la monda konferenco de C.W.A. okazanta en Perth. Owen Loneragen raportis pri siaj spertoj kiel komitatano de UNAA (Asocio por Unuiĝintaj Nacioj) kaj provoj informi en tiu medio pri Esperanto. Dro Einihovici legis al ni kelkajn tre interesajn malnovajn leterojn de F. R. Banham kaj Montagu Butler kaj rakontis pri konversacioj kun la fama eseisto, Walter Murdoch, kies nomon oni donis al nia nova universitato. — R. McG.

**MELBOURNE:** La prezidanto, S-ro H. Beechey, parolis je 16/9 pri la arto esti fajron sen alumetoj, eĉ en pluvo aŭ sen seka brulajo.

Nia jara merkat-vespero — “Amerika Teo” — okazis je 30/9. Ĉeestis 27 personoj, kiuj vigle marĉandis, interbabilis kaj partoprenis 2 loteriojn super luksa vesperrango. La fina rezulto estis \$48.82, kio inkludis ankaŭ mondonacojn poste ricevitajn de F-ino V. Cox kaj Ges-roj J. Fallu, kiuj ne povis persone ĉeesti. (Lastjare 29 personoj kontribuis \$59.28).

S-ro Bob Reed de la Oakleigh-grupo estis gastparolanto je 7/10. Li montris diapozitivajn pri vizitoj al Anglujo, Usono kaj Kanado, kie sendube konatiĝo kun Niagara-Akvofalo estis elstara travivaĵo.

**SYDNEY:** 23/9 Wre Chandler anoncis, ke “The Saturday Quarterly”, gazeto de la “Superannation Board”, publikigis leteron lian, en kiu li skribis kiel

Esperanto donis al li interesan kaj utilan okupadon post lia emeritiĝo. Li rekomendis, ke aliaj emeritoj lernu kaj uzu la lingvon, kaj ne nur trovu ĝojon sed helpu solvi la lingvan problemon. Wre prezentis sian filinon, Joyce, kiu montris interesajn, nekutimajn bildojn pri vojaĝo en Ruslando kaj Siberio. Si lerte klarigis (angle) la multdiversajn bildojn pri Moskvo, Leningrad, Tashkent, Samarkand, kiel ankaŭ pri la Kremlin, Universitato, Palaco de Kongreso kaj multaj aliaj — fakte ŝajnis, ke ŝi estis permesita fotografi libere. Maja procesio kaj bildoj pri personoj en stratoj donis ideon pri bonorda kaj prospera lando.

30/9 Shirley Fanos parolis pri “Memorindaj Personoj”, kiujn ŝi renkontis kaj komence menciis la bone konatan sed strangan viron, por kiu ŝi laboris en sia unua oficejo, ĉe viandkomerco. Li estis milionulo kaj havis titolon, “Sir”. Sed li estis tre avara; li eĉ postulis, i.a., ke ŝi maŝinkribu ambaŭflanke de la papero. La lastaj “Memorindaj Personoj” menciitaj estis ŝiaj instruistoj por Esperanto. Si diris, ke ili — Fritz kaj Wre — estis entuziasmaj, paciencaj, helpemaj kaj bonkoraj. Volo Guelting daŭrigis per siaj spertoj.

14/10 Nia gast-parolanto estis S-ro Dimitar Hadjiev, la Bulgara Konsulo por Aŭstralio, flua Esperantisto. La temo estis “Esperanto en Edukado”, kaj poste li respondis informe al demandoj. Sekvis Adrian Cooley, kiu parolis pri “La Romantikismo en Literaturo” kaj pianludis.

**MANLY:** Ni decidis, ke, dum la 3a trimetro, la klasoj daŭru ĝis la 8.30a, post kio la tuta klubo kuniĝos por partopreni la programojn.

10/9 Prof. Robbie Robertson klarigis la tutan Esperanto-organizaĵon; 17/9 okazis ludoj aranĝitaj de elementaj kursoj; 24/2 “La Unua Eksterlanda Kontakto” estis la temo de Nancy Witham. Post ĉiu programo ni vigle kantas.

Klubanoj aranĝis publikan kunvenon en la Halo St. Mathew de Manly, kiam Frank Preacher montris lumbildojn pri Sud-Ameriko kaj multe informis pri ĉiu Stato. Merla Troy pianludis antaŭ la komenco kaj Robbie dankis ŝin kaj Frank Preacher pro la programo. Li ankaŭ gratulis Frank pro lia reelektiĝo al la Konsilantaro de Manly. Ĉeestis 35.

Novaj Klasoj: Malcolm Ross gvidas klason en “School for Seniors” ĉe Chatswood kaj Simon Wickenden komencis instrui du kolegojn el sia oficejo kaj la edzinon de unu. Ili esperas, ke ĉi tiu malgranda komenca grupo baldaŭ

kreskos. Cetere, Simon komencis lerni Esperanton pasintjare kaj Malcolm ĉijare. — K.M.

**ROCKHAMPTON:** Ni donacis ekzempleron de la nova libro "9-lingva Komerca-Ekonomika Vortaro" al la Kaprikornia Instituto de Altnivela Eduko. La Bibliotekisto tre afable akceptis ĝin kaj estis favore impresita pri ĝi. Li certigis ke ĝi estos en la biblioteko de la Instituto; ankaŭ kelkaj volumoj de "La Monda Lingva Problemo" kaj fasko da "verdaĵ kartoj".

Ni intencas doni la libron ankaŭ al la Urba Biblioteko, kiu jam havas plurajn Esperanto-librojn. — John Moore.

**Adres-Sanĝo:** John Moore: Korespond-kursanoj bonvolu noti, ek de februaro 1975: John Moore, Pelican Street, EMU PARK, C.Q., 4703 (La nuna adreso 34, Hadgraft St., Rockhampton North, validos ĝis tiam.)

### Federaciaj Raportoj

**SYDNEY:** La 14-an de Sept. 1974 okazis en la Esperanto-Domo la 7-a Generala Kunveno de la E-Federacio de Nova Sud-Kimrujo. Ceestis 24 membroj kaj, kiel gasto, S-ino Doris Sinclair, Prezidanto de la E-Fed. de Kvinlando. La kunveno elektis novan Direktoraron por la venonta jaro, nome S-inon M. Chaldecott, S-rojn R. Baxter, W. Chandler, T. Elliott, J. Matasin, L. Scott kaj Prof. R. Robertson.

La Prezidanto (Ls Scott) dankis al Shirley Fanos kaj Arturo Cocking, kiuj ekzigis, pro ties fidela kunlaboro dum la pasintaj jaroj. Post vigla diskuto pri estonta reklamado sekvis bufeda ĉefmanĝo kaj distra vespero kun konkurso pri mallongaj historietoj. La kunveno finiĝis per muziko kaj komuna kantado.

**MELBOURNE:** Je 2-a Okt. 1974 anoj de la E-Federacio de Viktorio partoprenis viziton al la Melburna Guberniestra Palaco. Bela sunbrila tago benis la okazon, kiam proks. 30 personoj kunvenis ekster la pordego, de kie ili estis gvidataj de du ĉarmaj sinjorinoj de "National Trust".

Travagante la imponajn Akceptejojn, Manĝsalonon, kaj vere belan balsalonon, kie okazas ankaŭ oficialaj honorigoj, la vizitantoj aŭskultis informplanan komenton rilate la historion, signifon kaj gravecon de la konstruo, la ornamadoj, pentraĵoj, porcelano ktp.

Kiel dankesprimon al la gvidintoj, Grupestro F-ino Ann Hearn transdonis utilajn E-ajojn — Viŝtukon kaj ŝlosilringon.

### INSTRUISTA FORUMO

Estas nia espero aperiĝi de tempo al tempo konsilojn por instruistoj. S-ro Trevor Steele estas preta respondi al demandoj. Sendu viajn demandojn NUR en Esperanto, ĉar oni povas atendi ke instruistoj kapablos esprimi sin en almenaŭ simpla Esperanto.

Trevor skribis: "Mi antaŭ nelong komencis kurson en ĉi-tiea studenta domo. Ĝi bone progresas, sed la malfeliĉo estas, ke mi scias ke estas **CENTOJ** da studentoj, kiuj interesiĝus pri Esperanto, se ni havus **pli da kompetentaj instruistoj**. Mi ne kuragiĝis alparoli multajn studentojn, ĉar mi mem devas okupiĝi pri cent aliaj aferoj. Jen la plej urĝa bezono — **INSTRUISTOJ!** Mi supozas ke ĉiuj Universitatoj estas eblaj fontoj de inteligentaj junaj Esperantistoj".

### Trilanda Konferenco en Aachen

Sesdeko da geesperantistoj el Belgujo, Nederlando kaj Germanujo kunvenis ĉe dutaga renkontiĝo la 5 kaj 6 okt. 1974 en la junulargastejo de Aachen. Jam pli ol 40-jara estas la tradicio de tiuj renkontiĝoj kaj baldaŭ okazos la 100-a renkontiĝo.

Malgraŭ malbona vetero regis gaja kaj amuza atmosfero, vere esperantista, inter la konferencanoj inter 6 ĝis 70 jaroj. Lumbildprelego, distraĵoj, ŝercoj, lotumado kaj dancado konsistigis la sabatan programon. Dimanĉe oni traktis pli seriozajn aferojn: D-ro Pol Denoel (Lieĝo) parolis pri problemoj de gastlaboristoj kaj U.J. Moritz prezentis la temon "Etno - politiko - Esperanto".

Interesa estis gazetara konferenco, al kiu venis 4 ĵurnalistoj, kiuj faris multajn demandojn. Montriĝis denove, ke mankas aktuala dokumentado de Esperanto por respondi kompetente ĉiujn demandojn.

La Esperanto-Rondo de Aachen respondecis pri la ĉijara konferenco. La venontjara renkontiĝo okazos dum majo en Nederlando.

Gratulojn al F-ino May Reader kaj S-ro Arnold Baldwin, kiuj ĝojas anonci sian gefianĉiĝon je la 18-a de Oktobro, 1974.

(May estas la kasisto kaj Arnold la sekretario de la Esperanto-Federacio de Viktorio kaj ambaŭ apartenas al la Organiza Komitato de la venonta Pacifika E-Kongreso)



Perth Daily News 17/9/1974.

**An Answer to Lingual problems:** Kirwan Ward's comment (Peepshow Sept. 11) provokes me into defending the worthwhile studying of Esperanto.

Esperanto is the answer to smoothing out lingual problems. This international language is already used widely. Not only is the knowledge of such a universal language a very useful skill, but it has the cultural advantage the national languages do not possess.

We can widen the variety of human contacts immensely, we can multiply infinitely the interchange of ideas. It takes one-tenth needed to learn a foreign language.

There is a vast library of translated and original literature of prose and poetry. There are chairs of Esperanto at some universities and hundreds of Esperanto journals are published throughout the world. It is a blessing in human relationship and a boon in commerce. — Idyss Einihovici (Floreast Park).

Perth Daily News 9/10/1974.

**The Use of Esperanto:** I would like to add my commendation to that of Idyss Einihovici (Opinion Sept. 17) regarding the use of Esperanto.

If one could solve the communication problems of the world, then the major causes of political unrest would be solved.

The language is not difficult to learn, and the mind finds it hard to fully comprehend the heights to which man could climb without any language barriers.

Our Government, young in years of experience, could do well to make a study of this tongue; imagine being able to comprehend the language used on the floor of Parliament House.

Further still, imagine being able to understand our fellow men in other countries, instead of having to resort to interpreters who unwittingly at times inject their own bias into an interpretation. Prof. A. C. A. Page, Director, Italian Cultural Lyceum.

## RECENZOJ

**"Sennacieca Revuo"** N-ro 102, Jaro 1974. Eld. SAT, Parizo. Aŭstralia Peranto Volo Gueltling 9/45 Alt St., Ashfield, 2131 — 80 cendoj.

Fonto de informaj artikoloj, kiujn C.J.C. iom detale priskribis kaj en ĉi tiu n-ro aperas nur la unua. Aliaj troviĝos en sekvontaj n-roj.

**La Romantiko-** Beaudelaire difinas la belon kiel konstruaĵon de elemento eterna, senvaria, malfacile difinebla kaj relativa laŭ la cirkonstancoj, kiuj estas laŭvice: la epoko, la modo, la moralo la pasioj. Sen tiu dua elemento, kiu estas kvazaŭ ĉarma kovro, tikla, apetitiveka, la unua elemento fariĝus ne digestebla aŭ akceptebla por la homa naturo. El la literatura studo, oni trovas, ke la klasikismo rilatas al la ordo kaj sintezo, al obeemo kaj ekvilibro laŭ reguloj; dum la romantikeco rilatas al niaj pasioj sentoj, emocioj, al aktiva moviĝemo. Goethe nomis la romantikon malsana kaj al li plaĉis Shakespeare kiel fama klasikulo, tute ne vi-

dante en li romantikulon pro la enkonduko de eksterecaj fantaziaĵoj. Oni ne povas trovi la samajn sentojn pri romantiko en poetoj de 1600 kaj de 1800; ĉi lastaj jam spertis la sentojn de la Franca revolucio kaj de la procesoj de urbiĝo kaj de industriiĝo. Keats, Shelley, Byron, Schubert, Victor Hugo, Petofi, Delacraix, Manet, Van Gough, Maupassant, Donizetti, k.t.p. formis eliton de romantikuloj en literaturo, muzikkompono, pentraĵo kontribuante al plia kolorigo de nia vivo en senkolora kapitalisma socio. — C. J. C.

**JARLIBRO de U.E.A.** 1974. Unua Parto. 352 paĝoj. Delegita reto. Ĉi tiu valorega kompilaĵo estas ankaŭ unu el la plej efikaj varbiloj, montrante la praktikan utilecon de la lingvo. Laŭ ĝiaj informoj U.E.A. nun havas 3,521 delegitoj en 66 landoj.

Por tiuj kiujn timigas la kosto de M/A (Membreco de UEA plus abono de la gazeto "Esperanto") ekzistas la kategorio M.J. (Membro kun Jarlibro). Peranto K. G. Linton.

"**Dek kvin Komedietoj**": Robert Mackay. Eld. Brita E-Asocio. Angla prezo 60 p Havebla de A.E.A. Libro-Servo.

La aŭtoro estas bone konata kiel skothumora verkisto de komedioj. Lia komedio "Amo per floroj" tre brile sukcesis ĉe la U.K. en Parizo (1950). La Brita Asocio de E-Instnuitoj eldonis en 1965 kolekton de komedietoj de S-ro Mackay, sub la nomo "Fajro! Fajro!". Kaj nun alia kolekto prezentigas kun elementoj de diversa longeco, sed ĉiuj tre taŭgaj por prezentado en la diversaj kunvenoj. Bonega lingvaĵo kiu kovras la tre varian skotan humorsenton kiel en "Bonan Sanon", "Ĉe dentisto", "La komitato devias" ktp.

Do, komitatanoj, bone uzu la dek kvin komedietojn! — C. J. C.

Oferti: — To offer, to tender for sale or supply.

1. Zamenhof oferis siajn plej bonajn jarojn por Esperanto.
2. Mia amiko proponis al ŝi cigaredon.
3. Mi proponas, ke ni honoru ilian memoron.
4. La vendisto ofertis siajn varojn tre malkare.

### Insulto

La konata Sidneja Ornitologo — Esperantisto Wre Chandler loĝis dum multaj jaroj en antaŭurbo nomita "Crows Nest" ("Korva Nesto"), tre taŭga loĝloko por ornitologo. Sed lastatempe la loka konsilantaro ŝanĝis la nomon al Naremburn. Ni kunsentas kun li kaj proponas translokiĝon al Cockatoo Island, Emu Plains aŭ eble eĉ al Eagle Farm aŭ Birdsville.

### Esperanto en Perth-lernejo

"Rezulte de la penoj de nia fervora samideano D-ro C. J. Caldera, kaj la membroj de la W. A. E-Ligo, la estroj de edukado en Perth donis permeson por E-kurso en Perth Technical College. La kurson gvidos S-ro David Miller, B.A., D.B.E.A., membro de W. A. E-Ligo. La tieaj samideanoj faros ĉion eblan por disvastigi la novaĵon pri la kurso en Perth kaj sukcesigi ĝin."

Ĉu sensacia lastatempa novaĵo? Tute ne, sed raporto en "La Rondo" de Marto 1945, paĝo 78.

### TO THE HILLS

Esperanto-speaking geologists assembled in Warsaw, Poland earlier this year. Their post-conference Resolution declared in part that the "International Language is suitable for world-wide use in the field of earth sciences".

The visiting geologists put theory into practice when they went with Dr. Kowalczewski to the Holy Cross hills and dug up fossils and looked at rock strata from cambrian to mezozoic times talking Esperanto all the while.

Prof. Roman Osika, director of the Polish Geological Institute supplied transportation and equipment.

A pre-conference dig was led by Dr. Skompski to the Plocka basin, 200 km Northeast from Warsaw. There, the Esperantist geologists looked at sedimentary material from the pleistocene period.

## Gramatike-

### STUDENT —, STUDANT —, LERNANT —;

Ni komprenu bone la diferencon inter tiuj tri vortoj.

Studento: — Undergraduate, University or College student.

Studento: — Tiu, kiu studas. (a very general term).

Lernanto: — Learner, pupil.

1. Li estis studento en la urba kolegio.
2. Studento estas homo, kiu studas, sed ne ĉiu studento estas studento.

### EKZEMPL —, EKZEMPLER —, KOPI —;

Ni klare distingu inter ĉi tiu triopo da vortoj:

Ekzemplo: — example.

Ekzemplero: — copy (of a book or newspaper, etc.)

Kopio: — copy (a reproduction)

1. Jen ekzemplo de la misuzo de la refleksivo.
2. Ili disdonis multajn ekzemplerojn de la lastmonata revuo.
3. Li petis, ke la tajpistino faru du kopiojn de la dokumento.

### OFER —, PROPON —, OFERT —;

Jen plua triopo, kiu ofte konfuzas.

Oferi: — To sacrifice.

Proponi: — To offer, to proffer, to propose.

# NEWS - DIGEST

## BRILLE COURSE

From North America comes news of a three-level course in Esperanto for the Blind. The course is offered without charge to any sightless person anywhere in the world.

Mrs. Dorothy Holland of the Hadley School for the Blind is the instructor. She advises that potential students for Esperanto 1 and 2 should be able to read Grade 2 English braille. "Anyone who can write a braille letter in acceptable Esperanto" can go straight into Esperanto 3.

Students are expected to complete a lesson a month and the school provides practice pronunciation tapes, braille dictionaries, texts and tuition. Legally blind people who want to do the course should request an application form from: The Hadley School for the Blind, 700 Elm Street, Winnetka, Illinois 60093, U.S.A. Material in ordinary print as well as braille can be had from Mrs. Holland. Her address is 5140 San Lorenzo Drive, Santa Barbara, California 93111.

## TINY TOTS

The Floreat Park Primary School in Perth has an Esperanto class for the "littlies". It is once a week and Mrs. D. Martini takes it. The headmaster is Mr. H. Runciman.

## NUMBERS

Esperanto songs were sung, speeches spoken, and verse declaimed at an "Eisteddfod" in Bulgaria last month. The town of Kazanlak was the site of the now-traditional Esperanto get-together. Six hundred Bulgarian Esperantists turned up.

Six hundred was also the number of South Koreans in Seoul who enrolled for the Esperanto Course at Meong University run last year by Prof. Gim Taekeng. Half of the enrollees finished it.

Twenty five thousand copies of the Polish-Esperanto text by A. Pettyn have rolled off the presses since 1963. If you want to order a copy, ask for 'Esperanto - podręcznik języka międzynarodowego'.

One thousand Rumanians have now taken the correspondence course devised

by Prof. Ioan Lazar. There are 400 Esperantists in Suceava, the Professor's district.

## STAMPEDE

A hundred years of history, ninety minutes from the Rocky Mountains is offered by the Canadian Esperanto Association to participants to their congress in Calgary, Alberta next year. 1975 is Calgary's centennial year.

## FISH STORY

This year's International Summer University Course (SUK) in biology featured Prof. Enrique Balech. He is head of the Quequén Hydrobiological Centre in Argentina, and lectured on plankton. The course was based on his textbook written in Esperanto. All courses at SUK are given in the international language.

## BALLOT BOXES

British Esperantists are paying close attention to the results of the recent General Election. For them, this election was of more than usual interest for they want to see how the "Esperanto Lobby" fared.

The "Lobby" consisted of more than fifty Westminster parliamentarians from the three major parties — Conservative, Labour and Liberal. Its chairman was Lord Davies of Leek, and they were urging for the introduction of Esperanto into the school curriculum amongst other things.

The lobby's joint-secretary is Ernie Money, a Labor MP, who was Harold Wilson's shadow Minister for the Arts. British Esperantists have their fingers crossed.

## THE FIRST

Dr. Zamenhof, creator of Esperanto, listed all Esperantists enrolled 1889-90 in his first "Adresaro". It included two from New South Wales — D. G. Reinitz and H. B. Ritz. AEA historian, Ivan Maddern, went delving and found that Herman Balthazar Ritz was a lecturer in languages at Hobart University. He wrote a 55-page essay on the psychology of language. Believed to be the first Esperantist down under, he died in March 1916.

## NEWS DIGEST

Worldwide sources are used for this review. Acknowledgements this issue to PP, ISAE, HdE, ELNA, AH, SUK and LVE.

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



Redakcio: "Esperanto", Box 2122 T., G.P.O. Melbourne, 3001, Aŭstralio

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Rd., Lindfield, N.S.W., 2070

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W., 2036.

N-ro 135 (215)

MELBOURNE

Decembro, 1974

## "BONA ESPERO"

### ESPERANTISTA KOMUNUMO EN BRAZILIO

Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia, ĝis antaŭ kelkaj monatoj, estis aktivaj Esperantistoj en Norda Italujo. Giuseppe estis UEA-Delegito en la industria metropolo Torino kaj Ursula Fak-Delgito pri Interpretado. Ambaŭ reprezentis la Italian E-Federacion en la Komitato de U.E.A. kaj Giuseppe agis kiel UEA-Komisiito pri Aŭtomobilismo.

Antaŭ kelkaj monatoj ili decidis elmigri al Brazilo kaj en aŭgusto ili ekloĝis en "Bona Espero", la esperantista komunumo, ne tro malproksime de la ĉefurbo Brasilia. Ilia Esperantujo ampleksas nuntempe ĉirkaŭ 14 kvadratajn kilometrojn, preskaŭ dekoble la areon de la Princlando Monako. Tie troviĝas 4 riveroj, 2 lagoj, akvofaloj, montoj, fruktarboj kaj 34 ĉevaloj: vera edeno precipe por eŭropanoj naskitaj sur asfalto, enskatolitaj en poluciitaj urboj kaj avide sopirantaj al Dio "Mono"!

Preskaŭ neniu en la cetera mondo eksciis pri "Bona Espero", unika eksperimento en belega subtropika regiono. Sed kiam Giuseppe kaj Ursulo vidis ĝin dum antaŭa vojaĝo, ili decidis

definitive translokiĝi. Laŭ materia vidpunkto la vivkondiĉoj estas ankoraŭ multe plibonigendaj, sed laŭ spirita vidpunkto ili vere vivas sian esperantistan idealon en frata kaj ideala etoso.

La lernejo tie estas eble la nura en la mondo kie ĉiutage oni instruas Esperanton kaj la Internacia lingvo estas vere la dua hejma lingvo, post la portugala, por la infanoj.

Rimarkinda estas la apogo, kiun "Bona Espero" ĝuas ĉe la ŝtataj kaj Federaciaj instancoj. Baldaŭ oni konstruos terkulturan gimnazion, la solan en la vasta regiono. Tagjurnaloj favore raportis pri "Bona Espero" kaj pri la rolo de Esperanto tie. En oktobro en la ĉefurbo Brasilia okazis bankedo, kies profito estis utiligita por helpi la konstruon de la terkultura gimnazio.

Tiel "Bona Espero" plenumos vere gravan socian taskon por helpi la infanojn kiuj suferas la mankojn de subevoluinta socio. Nia gazeto esperas observi la estontan evoluon de tiu esperantista komunumo kaj ni petis Gesrojn Grattapaglia verki por ni specialajn raportojn en la estonteco.

#### Redaktoroj Transmaraj Atentu:

Post la morto de nia redaktoro, S-ro. F. R. Banham, nia redakcia adreso estas: "ESPERANTO", Box 2122 T., G.P.O. Melbourne, 3001, Aŭstralio. Sendu ĉion por nia gazeto al la supra adreso.

#### Dispatch

Please report all changes of address to our Dispatch Officers, Mr. and Mrs. J. Fallu, 10 Sumersett Ave., Oakleigh South, Vic., 3167 — Tel: 57 2232.

## OFICIALA INFORMILO

### Sanĝita Adreso:

Bonvolu noti, ke nia Skolta Komisiito S-ro John Moore translokiĝos la 1-an de Feb. 1975 al:

Pelican Street, EMU PARK,  
Q'ld., 4702

Tel: Emu Park 39-6393

15 Okt., 1974 Russ Baxter, Sek.

## HEJMA NENIFARADO

La granda bezono en ĉi tiu mondo estas fidinda formulo por ĝui la posedon de domo. Nu, iu ajn, kiu posedas iom da mono kaj pli da optimismo, povas aĉeti domon, sed tre malmultaj kapablas rezisti la tenton prilabori tiun domon, tiel perdante la okazon ĝui ĝin. Vi devas esti obstina, kuraĝa, kaj malkonvencia. Vi devas posedi tian kuraĝon, kiu permesas al vi kuŝi en la sunlumo, dum la najbaroj laboras. Vi devas posedi la kapablon malatenti tiun malvarman riproĉeman rigardon, al kiu vi edziĝis, sed la ĉefa afero estas rezisti la tenton labori.

Vi devas repuŝi tian deziron demonstri al via najbaro, ke vi estas tiel bona riparisto kaj konservisto, kiel li. En nia kvartalo sabaton matene ĉiuj miaj najbaroj kutimas farbi, falĉi, rasti, kaj marteli; konstrui kaj malkonstrui; planti kaj transplant; kaj kompreneble, batali kontraŭ la herbaĉoj, anstataŭ ludi kun la infanoj, por kiuj vi unue aĉetis la domon.

Ho, jes, mi bone scias, ke ĉiu homo deziras fari iom da laboro ĉirkaŭ la domo por kontentigi la emon ion krei, sed la granda danĝero estas, ke iu eta tasko povas naski tutan ĉenon da taskoj.

Ekzemple, mia edzino petis min farbi la fenestrojn de la litkabano, kaj en nesingarda momento mi konsentis. Antaŭ ol farbi, mi devis kompreneble, purigi la fenestrojn kaj tion farante, mi rimarkis, ke unu vitro estas difekta, do mi devis mezure viziti la butikon, aĉeti novan vitron, kaj ĝin instali.

Tion farante, mi rimarkis, ke la ŝutraj ĉarniroj estas rustiĝintaj. Ho, mi devas aĉeti novajn, Kie estas la martelo? Ho, jes, mi memoras! Mi lasis ĝin en la garaĝo. Mi eniras la garaĝon. De kie venas tiu lumo? Sajnas, ke estas truo en la tegmento. Mi inspektas. Ho, jes, mankas tegolo. Ho, mi povas facile ĝustigi tion. Mi alprenas la eskalon kaj grimpas sur la tegmenton. Mi rimarkas, ke la defluiloj estas ŝtopitaj. Mi komencas elpreni la foliojn. Tion farante, mi rimarkas, ke la farbo komencas bukliĝi. Mi devos refarbi,

antaŭ ol ĝi kadukiĝos, sed mi ne povas fari ĝin nun, ĉar mi devas malŝtopi tiun pluvtubon. Ha, mi sukcesis malŝtopi tiun; nun la akvo liberigās, sed, ho ve, ĝi elverŝiĝas sur tiu arbedo. Kia loko planti arbedon! Mi devas transplanti ĝin. Nu, kion mi nun bezonas — ŝovelilon, kaj iom da sterko, kaj . . . kion alian. Sed, atendu! Mi ankoratne farbis la fenestron! Tion ĵus petis la edzino. Ho, kie mi lasis la penikon? Ho, eble mi lasis ĝin sur la tegmento de la garaĝo. Sed mi jam sufiĉe klarigis. La ĉefa afero estas rezisti la tenton labori.

El la angla tradukis Ken G. Linton.

## La Eksiĝo de D-ro Ivo Lapenna

La kompleteo de la retiriĝo de Prof. D-ro Ivo Lapenna estis sendube la plej ŝoka el ĉiuj surprizoj de la U.K. en Hamburgo, sed krome retriĝis kiel Honora Membro kaj komitatano "B", F-ino Marianne Vermaas, kiu dum jaroj servis la Asocion kiel direktorino de la Centra Oficejo kaj poste kiel unu el niaj plej aktivaj komitatoj kaj kunlaborantoj. S-ro Jean Thierry demisiis kiel komitatano B; S-ro Harry Holmes anoncis sian intencon retiriĝi el la Honora Prezidanteco, kaj D-ro Juan Regulo Perez anoncis, ke li verŝajne ĉesigos sian agadon ĉe la eldonado de libroj.

D-ro Humphrey Tonkin, la nova prezidanto de U.E.A., diris en Hamburgo: "Ne estas eble al mi, en malmultaj vortoj, skizi la kontribuon de la ekxiĝinta prezidanto de U.E.A. al Esperanto. Entute, oni bezonus longan paroladon por tion fari, kaj eĉ tiam, tamen, la vortoj neniel sufiĉus. Dum trideko da jaroj, d-ro Ivo Lapenna, universitata profesoro nun en la Londona Universitato, per sia spirito kaj sia kuraĝo trenis la Esperanto-movadon al novaj altoj de atingoj. Apenaŭ jam antaŭe en la Esperanto-movado ni vidis tiel gigantan personecon. Anstataŭ lin laŭdi ĉi tie, ĉar ni scias, ke li tion ne volus, mi nur ripetu tion, kion mi diris jam en la komitato: Se mi kaj mia Estraro havos nur etan parton de la kuraĝo de prof. Ivo Lapenna, ni estos kontentaj. Kaj se ni povos per tiuj niaj malmultaj fortoj porti UEA ankoraŭ pli alten, al tiu pinto al kiu ni ĉiuj strebas, ankaŭ tiam, mi estos dankaj ĝuste al la vojo, kiun montris al ni Ivo Lapenna". D-ro Tonkin ankaŭ forte akcentis, ke "neŭtraleco estas kaj restos la ĝusta vojo por nia internacia Asocio. Ken Linton, ĉefdelegito.

**KIEL ESPERANTO TRIUMFOS ?**

En la numero de aŭgusto (p. 112) vi publikigis opinion de Interlingvistika Informa Servo, fakte de D-ro A. Bormann, kaj tiun de D-ro W. Bormann, filo de D-ro A. Bormann, sub la titolo "Kiel E. triumfos". La redakcio komentis, ke, do daŭras la debato inter du pensoskoloj: unu opinias, ke venko venos pro la premo "de sube"; la dua, ke ĝi venos nur "de supre".

Efektive, sukcesa agado por E. postulas samtempan, laŭplanan laboron en pluraj direktoj, inkluzive celtrafan informadon kaj premon ĉe la internaciaj, ŝtataj, regionaj kaj eĉ lokaj aŭtoritataj, unuflanke kaj kiel eble plej amasan disvastigadon de la lingvo, aliflanke. Agante laŭ tiu fundamenta formulo, pli detale ellaborita en la 1-a kaj 2-a Bazaj Laborprogramoj de UEA, la Asocio atingis rimarkindajn rezultojn.

Sendube, la rezultoj estos povintaj fariĝi eĉ pli grandaj, se ĉiuj konsistaj partoj de UEA estus agintaj simile en siaj respektivaj medioj. La menciitaj 2 programoj, la enkondukoj kaj la multnombraj instigaj artikoloj por realigi ilin, ĉiam emfazis la interdependecon kaj kunligitecon de ĉiuj agadoj kiel antaŭkondiĉon de kia ajn sukceso. Kaj tiu estis la tria skolo, laŭ kiu estis konstruata la moderna, forta kaj prestiĝa ĝishamburga UEA.

—D-ro Ivo Lapenna.

**LETERO EL BONN**

Mi tutkore lamentas la morton de nia amata redaktoro, F. R. Banham, pri kio mi lernis nur antaŭ kelkaj tagoj.

Dum multaj jaroj mi korespondis kun "Farbo", pri lia ŝatata "Rondo" kaj ĝia postveninto "Australian Esperantist". Li bonvenigis miajn nespertajn eseojn kaj ĉiam plibonigis, kun aŭ sen permeso, la gramatikon kaj stilon.

Mi ankaŭ partoprenis, dum kelkaj jaroj, lian tradukan rondon, kaj lernis per liaj severaj sed amikaj kritikoj multajn nuancojn de vortoj kaj multon pri la traduka arto.

Nur unufoje mi kunvenis kun li persone, en lia hejmo en Essendon, kie mi admiris lian bone organizitan libron kaj la sliparon, en kiu li sisteme notadis.

Farbo havis nur unu ambicion, pri kiu li petis de mi helpon. Li deziris fariĝi membro de la Akademio de Esperanto. Mi varme subtenis lian kandidatigon, ĉar li estis bonega gramatikisto, tradukisto, recenzisto, redaktoro, kaj verkisto. Sed li ne sukcesis. La ĉefa faktoro, mi opinias, estis la fakto, ke li neniam verkis libron, kvankam la sumo de lia

verkaro en gazetoj kaj en Angla Antologio plenigus kelkajn volumojn. Nur kelkajn semajnojn antaŭ lia morto mi parolis pri Farbo kun Profesoro Lapenna, la tiama Prezidanto de UEA kaj membro de la Akademio. Mi sugestis, ke li subtenu, ĉe la aliaj akademianoj, ke Banham ricevu tiun honoron. Li tui varme respondis, ke, kiel Direktoro de la Centro de Esploro kaj Dokumentado, li povas atesti, ke el ĉiu numero de "Australian Esperantist" li elĉerpas ion valoran pri la lingvo, pri ties historio kaj pri la movado. Li konsilis al mi renovigi mian rekomendon al la Prezidanto de la Akademio, kaj promesis sian varman subtenon.

Bedaŭrinde mi ne povis ĉeesti la Universalan Kongreson en Hamburgo, kaj Prof. Lapenna havis aliajn problemojn tie. Farbo ne fariĝos akademiano.

Sed mi kredas, ke la Aŭstralia Esperanto-Asocio povas, memore je lia fidela laboro, fari tion, kion li mem ne sukcesis fari dum sia vivo, dank' al la tempo, kiun li dediĉis al la redaktado de nia organo. Mi proponas, ke la Asocio eldonu libron de lia verkado. Kvankam liaj poemoj, originalaj kaj tradukitaj eble meritas represon en libra formo, mia prefero estus kolekto de liaj "Lingvaj Notoj" kiuj estus treege valoraj por ĉiuj studentoj de Esperanto, ne nur en Aŭstralio sed ĉie en Esperantujo.

Mi sugestas, ke vi organizu komitateto por entrepreni la kompiladon de libro, modeste laŭ la modelo de la Lingvaj Respondoj de Zamenhof. Mi sugestas ankaŭ, ke vi starigu fonduson por helpi pri la kosto de taŭga eldona "vesto". Espereble la libro rapide vendiĝos, kaj la Fonduso F. R. Banham povos ebligi aliajn eldonaĵojn.

Mi kune sendas ĉekon de \$50 por iniciati la aferon.

Malgaje,

Ralph Harry.

**Ralph Harry — Ambasadoro ĉe U.N.**

La aŭstralia Ministro por Eksterlandaj Aferoj (Senatoro Willessee), 25-an de oktobro nomis S-ron Ralph Harry ambasadoro kaj daŭra reprezentanto ĉe la Unuiĝintaj Nacioj. A.E.A. gratulas al li.

Sipservisto: (al marmalsana pasaĝero)

"Ĉu mi alportu ion al vi?"

Pasaĝero: Ho, jes, insulon.

Si: "Ĉu vi ŝatas kaj komprenas muzikon?"

Li: Jes, iomete.

Si: "Bone! Kion mi nun ludas?"

Li: "Pianon".

## NIA HISTORIO

### 1. La Esperantistoj de 1907

Ni ekkomencas nian Historion de la Esperanto-Movado en Aŭstralio per listo de kelkaj eminentuloj en 1907.

Estis entuziasmaj Esperantistoj en Aŭstralio antaŭ 1907 kaj eĉ en 1890, nur 3 jarojn post Zamenhof eldonis sian unuan libron pri la lingvo (1887), sed ni ne havas iun oficialan liston aŭ plenan liston de ĉi tiuj pioniroj. La unua listo — ankoraŭ nekompleta — troviĝas en la "Jarlibro de 1907" de la "Monda Ligo de Esperantistoj" de Zamenhof. Unu sekcio de la Jarlibro pritraktas pri la Esperantaj kluboj aliĝintaj al la Ligo.

Estis nur unu klubo en Aŭstralio en 1907 — la Melburna Esperanta Klubo, starigita la 10-an de februaro 1905 de John Booth. La Zamenhofa listo de nomoj kaj adresoj montras ke la Melburna Esperanta Klubo enhavis 79 anojn. Kompreneble, la plejmultaj el ĉiuj membroj loĝis en Melburno aŭ ĝiaj antaŭurboj, sed estis 3 kiuj loĝis en la kamparo de Viktorio, kaj 9 en N.S.W. kaj unu en Sud-Aŭstralio. Do, preskaŭ ni povus diri, sed ne tute, ke la Melburna Esperanta Klubo en 1907 estis ankaŭ la Aŭstria Esperanta Klubo.

Ni akceptas ĉi tiun liston de 1907 — sed kun tri rezervoj. Unue, estas certe ke estis je tiu tempo aliaj gravaj Esperantistaj pioniroj, kiuj ne estis membroj de la Melburna Klubo. Due, pro la malrapideco de la poŝto inter Eŭropo kaj Aŭstralio en 1907 kaj la tempo bezonata por prepari kaj eldoni la Jarlibron, la listo probable estas tiu por 1906 anstataŭ por 1907. Ekzemple, William Drummond, D-ro A. E. Barrington kaj Maurice Hyde, tri elstaraj Esperantistoj, ĉiuj aliĝis al la Melburna Klubo en 1907, sed iliaj nomoj NE troviĝas en la listo. Trie, estas evidente ke, tiam same kiel nuntempe, estis multaj nur portempaj membroj, kiuj faris nenion krom pagi siajn kotizojn dum unu-du jaroj, kaj baldaŭ forlasis la movadon. Tiaj "Esperantistoj" rememorigas al ni la parabolon de la Semisto en la Nova Testamento:

"La semisto eliris por semi siajn semojn. Kaj iuj semoj falis sur ŝtonan lokon, kaj kreskinte tuj velkis. Kaj aliaj falis inter dornoj; kaj la dornoj kunkreskis, kaj sufokis ilin. Kaj aliaj falis en bonan teron, kaj kreskinte, produktis frukton centoble."

El la 79, ni certe povas registri la nomojn de ĉi tiuj Esperantistoj, kiuj laboregis dum la plej bonaj jaroj de siaj vivoj por la progreso por Esperanto: John Booth, George Gordon, D-ro S. M.

McBurney, Charles Thonger, William Vogt, Cedric White, S-ino May Harrison, F-ino Edith A. Synotte (poste S-ino S-ino Mumford), S-ino Tillotson.

Sendube, estas aliaj el la 79, kiujn ni devus aldoni al nia listo, kaj eble, post plua serĉado, ni povos tion fari. Ni devas ankaŭ eltrovi tiajn aliajn Esperantistojn, kiuj vivis kaj laboregis en Aŭstralio en 1907 kaj antaŭ 1907. En niaj sekvontaj artikoloj ni diros ion pri la vivoj de ĉiu el tiuj pioniroj.

Ni petas kaj volonte akceptos la helpon de Esperantistoj en la aliaj ŝtatoj por informiĝi pri iliaj antaŭaj eminentuloj kaj la vivoj kaj laboroj de la pioniroj. — I. T. Maddern.

## AŬSTRALIA= =KRONIKO

**MELBOURNE:** Je 14-a de Okt. S-ro Ken Linton legis tradukitajn artikolojn, el kiuj la unua "Malluma Epoko" instigis pensojn pri la ĝusta signifo de "Barbaro", sendube dependa de la vidpunkto de la uzanto. La dua informis pri la historio de la fabelo "Pinokio" kaj ties verkisto. La tria estis iom amuze verkita pri "La Gojo vojaĝi kun infanoj kaj kun gepatroj". — denove afero de vidpunkto. La parolanto ĉe la amuzvespero de la 28-a de Okt. estis S-ro Kamal-U-Din Diradje, neesperantisto. Li montris diapozitivojn pri Bali kaj Java — templojn kaj skulptaĵojn — ankaŭ pri sia hejm-insulo Lombok.

La Esperanto-Konferenco ĉe Morwell estis la temo de raportoj fare de partoprenintoj, kiuj inkludis S-inon Thea v.d. Boogaard el Adelaide (4/11). La prezidanto (S-ro Harry Beechey), 11-a Nov., rakontis pri feria vizito al la farmbieno de bofilino en Nov-Sud-Kimrujo.

**MANLY:** Programoj inkludis lastatempe: 8/10 Prezento de la parolado de ĉiuj. 15/10 Ludoj, prezentitaj de la elementaj kursanoj; 22/10 Eksterlandaj kontaktoj; parolis Arthur Cocking, Edna Giles, Kay Morrison. Je la 12-a de Oktobro okazis amuzvespero ĉe Edna Giles. Eunice Graham montris lumbildojn pri sia eksterlanda vojaĝo. Sekvis kantado kaj bongusta vespermanĝo. Ni ĉiuj estas dankemaj al Edna, kiu ĉiam proponas la uzadon de ŝia domo. — K.M.

**ROCKHAMPTON:** 3/11 Aperis surtelevide en la ero "Seven Days" de la loka komerca stacio, 8-minuta intervjuo pri Esperanto, kun John Moore (loka prez.) Desley Davies (sek) Maureen Norton (unuajara lernantino), kaj Dorothy Hasluck, vizitanto el Sidneo, Dorothy parolis pri propra sperto ĉe Kongreso en Tokio. Tre glate iris intervjueto kun samtempa interpretado, inter la gvidanto kaj Maureen, kiu respondis Esperante; John kaj Desley interpretis. Sekvis la normala anglalingva demandado, kun favora sinteno.

### Nekrologo

La 18-an oktobro mortis en hospitalo "Woden Valley", Canberra, S-ino Mitzi Zagorskis, rezulte de leukemio. Si estis la prezidanto de la Kanbera E-Klubo. Mitzi estis konata pro sia gaja naturo kaj entuziasmo. Si naskiĝis en Latvujoj en 1926. Niaj sinceraj kondolencoj iras la ŝia edzo Alex kaj infanoj Diana, Leon kaj Irena.

### A.E.A.-LABORPLANO - GESKOLTA MOVADO

Ek de Aŭgusto studas Esperanton 15 Skoltinoj kaj 12 Skoltinetoj de 1-a Perta (Pionira) Kompanio kaj 1-a Perta Grupo. Gvidas ilin Christina Rockliff. Multan dankon, Christine. Aĝoj parolas pli laŭte, ol vortoj. Tamen, vortoj povos helpi. Diru la vortojn, pri la Skolta Esperantista Ligo, al via loka Skolt(in)estro. Skribu al mi petante informfoliojn. — John Moore, 34 Hadgraft Street, Rockhampton 4701. (Ek de Februaro, Pelican St. Emu Park, Qld. 4703).

### El la Federacioj

**N.S.W.** Urbeto Bundanoon, 100 mejlojn for de Sidnejo, survoje al Kanbero kaj Melbourne, estis la rendevuejo por la printempa federacia konferenco, je la 26-a kaj 27-a de oktobro. Tridek anoj kaj amikoj ĝuis la restadon en la malnova hotelo de Bundanoon, kie ni ĉiuj loĝis, manĝis kaj konferencis.

Post la kutima formala kunsido, sub prezido de Les Scott, Wre Chandler prezentis skribitajn artikolojn de ne-ĉeestantoj. Post teo kaj interbabilado, S-ino Eunice Graham el la Manly Klubo prezentis diapozitivojn de vizito al la Beograda Kongreso kaj vojaĝo tra Eŭropo. Tiu prezentado de belaj bildoj kun bona Esperanto-komentario malebligis eĉ al la plej dormemaj sekvi la kutiman okupadon.

La plej elstara kontribuo al la konferenco estis prezentado de Tom Elliott,

kiu priskribis la funkciadon de la Sidneja Televida Kontrola Sistemo. Li prikomentis la movantajn vidaĵojn, aŭtojn, homojn. Vere lerta prezentado! Tom ankaŭ alportis multajn librojn por la aprobo kaj aĉetado de la konferencanoj.

Pro malbona vetero, la programo planita de naturalisto Wre Chandler por dimanĉmateno ne okazis. Li intencis montri al ni la sovaĝajn florojn, arbojn kaj birdojn. Wre cetere bone kaj zorge planis la semajnfinojn kaj ni ŝuldas al li senrezervan laŭdon kaj dankon. — Les Scott.

**Viktorio:** Kvindek Esperantistoj partoprenis semajnfinan konferencon (1-3-a de Nov.) en Morwell, inter ili ankaŭ S-ino Thea v.d. Boogaard (Adelaide) kaj S-ro George Clarke, apotekisto el Orrooroo, S.A.

Ĉiuj konferencanoj loĝis en la moderna kaj komforta Latrobe Valley Hotelo, tuj apud la stacidomo, kie vendredvespere (1/11) okazis la malfermo flanke de Konsilanto Peter Hudson. Nome de la gastigantoj, S-ro Bill Wybenga, bonvenigis la ĉeestantojn. Salutarolis S-ro Jack Fallu (Oakleigh Grupo), S-ino A. Paling (Malvern Grupo) kaj S-ro H. Koppel (Melbourne E-Societo). Sekvis kantado de S-ino kaj F-ino Maddern kaj vesper-manĝeto.

Sabate (2/11) konferencanoj kunvenis en la gimnazio. S-ino A. Paling preparis kaj S-ro J. Menzies prezidis Esperanto-demandkonkurson ("Kviz"). Ĉeestantoj dividigis en 2 teamojn kaj la rezultaj poentaroj estis egalaj. S-ino Fay Koppel, per literatura seminario, ekzercigis la ĉeestantaron. Posttagmeze konferencanoj estis gastoj de la Stata Elektra Komisiono kaj vizitis la surfacan minejon, la elektro-fabrikon kaj la briket-fabrikon. Per varia programo la konferencanoj pasigis la vesperon denove en la gimnazio. S-ro George Clarke, kiu, nur per privata studado en tre mallonga tempo, akiris jam elstaran scipovon de la lingvo, priskribis sian nunan hejmurbon Orrooroo kaj ties ĉirkaŭaĵojn. F-ino A. Hearn montris neordinarajn bildojn pri Svislando kaj Aŭstrio. S-ro Bob Reed, sekretario de la Oakleigh grupo, prezentis bone preparitan filmon kun komentario, pri vizitoj al Anglujo kaj Kanado.

Dimanĉmatene, en la gimnazio, anoj de la Oakleigh grupo prezentis skeĉojn. S-ino Paling (Malvern grupo) prelegis pri la uzo de la refleksivo kaj Ann Hearn donis pensinstigan disertacion pri



"Bonŝanco, malbonŝanco, kiu scias?" Bufeda lunĉo en la Latrobe Valley Hotelo konkludis la programon. Loreto Kelly kaj Mary Malone ravis per muziko kaj kantado. Posttagmeze, konferencanĝoj vizitis la historian muzeon en Moe.

La Federacio deziras danki Ges-rojn W. Wybenga kaj S-ron I. T. Maddern, pro la granda laboro organizi la konferencan kaj la grupon de Ges-roj H. Schepers pro ties kontribuo al la distrado.

**Kvinslando:** Je la 5-a kaj 6-a de Oktobro la Esperanto-Federacio de Kvinslando konferencis ĉe la "Sea Horse" Motelo, Mermaid Beach. Sabate, S-ino D. Sinclair prezidis la afer-kunvenon. Raportis la kasisto kaj la klub-delegitoj. Vespere okazis amuzvespero, kun teatraĵoj, kantoj kaj muziko. Dankojn meritas Frank McDonnel, S-ro Ross kaj la Brizbana Klubo pro ĝuplena vespero.

Dimanĉe, S-ino W. Greenhalgh instruis al ni "Kiel fari propran panon." Desley Davies parolis pri sia loĝloko Rockhampton kaj Gaye Phillips prelegis pri la "Akacio", la ŝtata floro de Kvinslando, S-ro Ross parolis pri Mildura kaj distribuis fotografaĵojn de Mildura. Bongusta lunĉo de kradrostita bifstekoj kun salato konkludis tre sukcesan konferencon.

Oni decidis okazigi la jarkunvenon en februaro ĉe Redcliffe kaj konferencon ĉe Maryborough je 3-5-a de majo.

kie oni torturis ribelemajn malliberulojn devenas de la fakto ke la aŭtoro mem, komunisto, trasuferis ok jarojn en Buchenwald. Informilo de la eldonisto sciigas, ke ankaŭ la historio pri la savo de la malgranda, pola infano, Stefan, baziĝas sur la vero.

Pri teruraĵoj oni legas, sed ankaŭ pri la triumfo de homa solidareco.

La traduko estas ĝenerale klara kaj flulegebla, sed neologismoj abundas. La plejmulto tamen troveblas en P.I.V. Kelkfoje la tradukaĵo impresas neglate, ekz:

"Estis la arestitaj arestuloj" (p.340) "Estus estinte pli ĝuste paroli kun vi ĝustatempe" (p. 159).

Kelkaj esprimoj estas dubsencaj: "li amis lin, raŭke", p. 200 "Li cerbumadis antaŭ sin", (p. 268). Aliaj ŝajne estas eraraj. "La momento estis kritika" (kriza) p. 241, "Nevidebla, ĉieprezenta (ĉiea) forto" p. 231 "kofro" Ĉu pli ĝuste "valizo"? "kazinio" Ĉu "kantino"?

El la nemultaj preseraroj la plej grava troviĝas sur paĝo. 325 de kie la unua linio transglitis ĝis la sekvanta paĝo.

Belega, forta bindaĵo, klara preso, atentokapta enhavo kaj prezo modesta faras ĉi tiun volumon havinda.

Jus atingis nin la novaĵo el Orienta Germanujo ke la libro "Nuda inter Lupoj" post nur ok monatoj, elĉerpiĝis ĉe la eldonejo. Estas unika fenomeno en la esperantista libromarkato ke libro kun sufiĉe alta eldonkvanto (8000 ekzempleroj) tiel rapide forvendiĝis. La romano estas ankoraŭ havebla ĉe la A.E.A. Libro-Servo (S-ro Tom Elliott).

La eldonejo "Edition Leipzig", post tiu granda sukceso, nun konsideras aperigon de alia germana romano.

Preskaŭ preta ankaŭ estas la manuskripto por granda vortaro Germana-Esperanto kun proks. 30,000 vortoj. Aŭtoro estas la profesia filologo kaj leksikologo D-ro E. D. Krause.

**GRAVA ATINGAĴO:** La Eŭropa Ekonomia Komunumo jam decidis eldoni revuon en la internacia lingvo: "Eŭropa Dokumentaro." Ĉiu lojala Esperantisto devus pruvi la forton de nia movado per abono al tiu revuo. Ni ne preterlasu ĉi tiun okazon. Sendu \$2.70 al S-ro K. G. Linton, 11 Poplar Street, South Caulfield 3162.

#### Kanado — ĉu norda kromlando ?

La grandega teritorio okupata de Kanado donas al enmigrinto specialan ideon pri la valoro de "vera" grandeco, ĉar la lando havas kiel limojn tri diversajn marojn: la Pacifiko, la Atlantiko

## RECENZOJ

**NUDA INTER LUPOJ:** Bruno Apitz. El la germana tradukis Dro Karl Schulze. Lingve kontrolis Jerzy Grum. 477 teksto-paĝoj 12 x 19 cm. tuttote bindita, Edition Leipzig. Aŭstralia prezo \$3.60. Havebla ĉe A.E.A. Libro-Servo (S-ro T. Elliott).

Ĉi tiu streĉe interesa romano pri la koncentrejo Buchenwald aperis en 1958, furore vendiĝis kaj intertempe estas tradukita en 27 lingvojn.

En la lastaj monatoj de la Dua Mondmilito trijara infano sekrete alvenas en la ĝiskreve homŝtopita koncentrejo en la kofro de novealveninto. La tasko ŝirmi la etulon kontraŭ la nazioj signifas novajn danĝerojn por la rezista grupo, kiu ĝis nun sukcesis kaŝe labori prepare al eventuala "trarompo".

La konsterner klara bildigo de la vivo en la koncentrejo kaj la horora "bunkro"

kaj la Norda Maro. En la suda parto de la ŝtato sin trovas la industrioj, la plej multo de la popolamaso; en la norda parto la solaj loĝantoj estas la fiŝistoj kaj ĉasistoj, kiuj portas al la lando multe da riĉaĵoj.

Post la fino de la Franca-Brita militado nur en la Kebekia provinco oni konservis la uzon de la franca lingvo, kiu laŭgrade formis dialektojn lokajn. Inter la laboristaj sindikatoj kaj la mastraro okazis bataloj, kiuj portas al formiĝo de organizaĵoj rilatantaj pli al financa profito ol al politikaj aranĝoj, eble pro la influo de ideoj alvenintaj el la Uniĝintaj Amerikaj Ŝtatoj. La Norda parto, kvankam tre riĉa, ankoraŭ kaj se la evoluo nuntempa en Siberio montras bonan rezulton, eble Kanado sekvas la ekzemplon de Rusujo.

(El "Sennacieca Revuo" N-ro 102 recenzis C. J. C.)

## Gramatike-

### DA

Laŭ peto ricevita, mi traktas tiun vorton, kies uzado ne estas ĉiam bone komprenata. DA estas esence prepozicio, per kiu oni kunligas esprimon kun kvanto aŭ mezuron kun la nedifinita substantivo, kiu rilatas al ĝi. Jen kelkaj ekzemploj de ties ĝusta uzado:

- (1) Donu al mi kilogramon da pomoj.
- (2) De la tablo ŝi prenis pecon da ŝtofo.
- (3) Liveru la definitan nombron da brikoj.
- (4) En la ĉambro mi trovis multe da libroj.
- (5) Iom da malŝato troviĝas en lia sinteno.

Rimarku ke la kvanta aŭ mezura vorto devas esti aŭ substantivo aŭ adverbo. Post vortoj, kiuj neniel esprimas kvanton aŭ mezuron, oni neniam uzas "da":

- (6) Tio signifas por mi grandan perdono de tempo.
- (7) La manko de mono estis por li tre malagraba.
- (8) Tiu speco de floro estas tre bela.

Rimarku ke en la supraj ekzemploj la vorto antaŭ la prepozicio ne estas kvanto aŭ mezuro. En la sekvantaj kazoj, eĉ ĉe kvanta aŭ mezura esprimo, oni NE uzas "da", sed "de" aŭ "el", ĉar la uzo de la artikolo ŝanĝas la nedifinitan naturon de la substantivo.

(9) Peco de la viando, kiun li kuiris, kuŝis sur la tablo.

(10) Multo el la kolekto restis en la biblioteko.

Ni neniam uzu "da" antaŭ "tiu", "tio", "mia", "via", "nia", "mi", "vi", "ni", "ĉiu", "tuta".

(11) Bonvolu vendi al mi duonmetron de tiu ŝtofo.

(12) Ĉiuhore kreskas la nombro de niaj partianoj.

(13) Li loĝis tie la lastajn du jarojn de sia vivo.

(14) Tiom el ili ĉeestis la kunvenon, ke la ĉambro estis plena.

(15) Partoprenis la bankedon granda nombro el ĉiuj kongresanoj.

Neniam uzu "da" post frakcioj:

(16) Li aĉetis duonon de torto.

(17) Mi atendas vin ne pli longe ol dum kvarono de horo.

En la esprimo: "bukedo de rozoj" ni komprenas, ke ĝi estas "roza bukedo", sed en la esprimo "bukedo da rozoj" la "bukedo" estas mezuro pri rozoj. La unua esprimo respondas la demandon: "Kia bukedo?", sed la dua respondas la demandon: "Kiom da?"

—K. G. Linton.

### La "Senlima" Grupo

En St. Lucia antaŭurbo de Brisbane, ekzistas Esperanto-Klubo nomita "Senlima Grupo". Ni ricevis demandojn el kio konsistas la "senlimeco" de tiu grupo. Eble iu klubano povos klarigi.

### Poŝtaj Kodnumeroj

Unu el la kialoj por enkonduko de poŝtaj kodnumeroj estas la fakto, ke en ĉiu lando estas multaj lokoj kun la sama nomo kaj estas malfacile diferencigi ilin. Ekzemple en Usono ekzistas 15 Berlinoj kaj ni trovas tiun nomon ankaŭ en San Salvador kaj aliaj landoj. Laŭ onidiroj ekzistas 35 "Berlinoj" en la mondo.

Okaze de la 25-a datreveno de la hinda sendependiĝo la hinda poŝto enkondukis poŝtan kodon PIN (Postal Index Number Code). La hinda poŝto havas proks. 125.000 poŝtstaciojn kaj la multeco de la lingvoj kaj skribmanieroj multe malfaciligas la laboron de hindaj poŝtistoj.

Hieraŭ vespere Johano Smith en najbara strato ekbruligis alumeton por kontroli, ĉu li ankoraŭ havas benzinon en sia ujo. Benzino ja enestis. La enterigo okazos merkrede je la deka.

# NEWS - DIGEST

**ESPERANTO HONOUR:** Dr. L. L. Zamenhof will be honoured by the National Bank of Poland next year. He has been selected to appear in the Polish coin series: "The Great Poles".

The founder of Esperanto will be featured on the 100 Zloty piece.

This is the first time that he has appeared on a national coinage. Older readers may remember Dr. Zamenhof on the "Stelo-moneroj" (star money) of the International League.

At present rates, the silver Zamenhof 100 Zloty coin will be worth Australian \$3.80 approx.

**GOLD DIGGERS:** Still on the subject of coins. Ninety young Esperantists from ten countries struck gold last August in Kaliakra in Bulgaria.

They were there to found an "International Esperanto Archeological Brigade". They dug for seven hours and in the process unearthed seven gold coins from the Fifth Century. The organisers say they are going back again next year.

**DEMOCRACY OF LATIN:** The Franciscans in Rome put out a magazine called "Fraternitas". It is written in Latin and recently gave space to two stories about Esperanto.

**CHRISTIANS' AGAPE:** Catholics and Protestants from seventeen countries met for the 3rd International Conference of Christian Esperantists in Hamburg this year. It incorporated the 35th Congress of IKUE (Catholic) and the 26th of KELI (Protestant).

The participants sent a resolution to the World Council of Churches urging the use of Esperanto at the Council's Jakarta meeting next year.

**ESPERANTISTS GO UNDERGROUND:** New Year in Budapest and the Esperantists will go underground. It's the occasion of the 4th Esperantists' Winter Fair. Running from December 29th to January 2nd, the Fair will include a visit to the Grottos of Budapest and other watering places.

**A SHOW OF CARDS:** The visiting cards of eminent Esperantists are on show now at the International Esper-

anto Museum in Vienna. Located in the Hofburg palace, it's just across the road from the world-famous Spanish Riding School.

Museum director, Dr. Walter Hube, says the exhibition will run until December 31st. It includes several cards of the Zamenhofs, one of de Beaufront (of Ido fame) and one of Father Schleyer (the inventor of Volapük).

**ROOM TO SPARE:** Five goes into three at zero cost. Not a conundrum of the "New Maths" but a gesture from the city fathers of Le Chaux-de-Fonds. These Swiss aldermen have just made a three room lodging available to the Esperanto Cultural Centre there. A" at no charge, and it accommodates five people.

**TEN YEARS OF TALK:** Switzerland's Shortwave Radio Service celebrates ten years of transmissions in the international language. Beginning in 1964, the Swiss broadcasts can now be heard four times a week.

**VISITING RAILWAYMEN:** The report of the annual meeting of the German Esperanto Railwaymen's Association is a "beaut". Held in Bamberg, West Germany, it drew 120 Esperantist railway folk from Austria, Belgium, Denmark, France, Holland, Spain, Switzerland and Yugoslavia.

In three days they had bus trips, held press conferences and exhibitions, tasted local lagers and danced until 2 a.m. They put on a folklore show, had a slide talk . . . and still managed to get through the official business.

A meeting highlight was Armin Grötzner's declamation of Goethe's "Der Erlkönig" from an Esperanto translation by the president, Joachim Giessner. Giessner is also president of IFEF - the international body. News Digest takes off its hat to them!

**MAKING TRACKS:** Esperanto railwaymen, their wives and families will be making tracks from Italy in February.

The International Railwaymen's Esperanto Association will hold a Ski Week at the foot of the Dolomites at Plan Val Gardena.

It is their sixteenth such get-together and starts on February 15th.

**NEWS DIGEST:** Worldwide sources are used for this review. Acknowledgements this issue to: PP, IEMW, HdE.